


EL Popola ĈINIO

Vivu la Granda Gvidanto Prezidanto Maŭ



Kamarado Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko. Kamarado Maŭ Zedong genie, kreive kaj plenamplekse heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismon, kaj levis ĝin al tute nova stadio. La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo de la epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo kaj socialismo iras al venko en la tuta mondo.

— *Komuniko de la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*

Prezidanto Maŭ en konferenco de reprezentantoj de malriĉ-kamparanaj grupoj de ok gubernioj de okcidenta Gianghi kaj suda Fugian en 1933

Prezidanto Maŭ babilanta kun kamparanoj de Janggialing, Jan-an







Prezidanto Maŭ faris la politikan raporton *Pri Koalicia Registaro* en la Sepa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, 1945.



Prezidanto Maŭ dum verkado en Jan-an, 1946



Prezidanto Maŭ proklamis la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko sur la pordego Tian-anmen en la 1-a de oktobro, 1949.

Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Lin kaj ĉefministro Ĝoŭ revuis sur la pordego Tian-anmen armeon de la granda proleta kultura revolucio en 1966.



Vortoj de Prezidanto Maŭ pri Popola Milito

REVOLUCIOJ KAJ REVOLUCIAJ MILITOJ ESTAS NEEVITEBLAJ EN KLASA SOCIO

Milito, kiu ekzistas ekde la apero de privata propraĵo kaj klasoj, estas la plej alta formo de batalo por solvi kontraŭdirojn, kiuj troviĝas en certa stadio de disvolvo, inter klasoj, nacioj, landoj aŭ politikaj grupoj.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

En klasa socio revolucioj kaj revoluciaj militoj estas neeviteblaj kaj sen ili la salto en socia disvolviĝo ne povas plenumiĝi, la reakcia reganta klaso ne povas esti renversita kaj tiel la popolo ne povas akiri ŝtatpotencon.

"Pri Kontraŭdiro" (aŭgusto 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La militoj en la historio estas dividitaj en du specojn: justaj kaj maljustaj. Ĉiuj progresemaj militoj estas justaj, dum ĉiuj militoj, kiuj malhelpas progreson, estas maljustaj. Ni komunistoj oponas ĉiujn maljustajn militojn, kiuj malhelpas progreson, sed ni ne oponas progresemajn, justajn militojn. Rilate al la lastaj, ni komunistoj ne nur ne oponas, sed eĉ aktive partoprenas ilin.

"Pri Longdaŭra Milito" (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Militon, tiun monstron de reciproka buĉado inter homoj, la progreso de homa socio fine eliminos, cetere en ne tre malproksima estonteco. Sed sin trovas nur unu rimedo por ĝin elimini, t. e. opozicii militon per milito, opozicii kontraŭrevolucian militon per revolucia milito, opozicii nacian kontraŭrevolucian militon per nacia revolucia milito kaj opozicii kontraŭrevolucian klasan militon per revolucia klasa milito.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

EL LA PAFILO VENAS ŜTATPOTENCO

La centra tasko kaj plej alta formo de revolucio estas kapti ŝtatpotencon per armita forto kaj solvi problemon per milito. Tiu ĉi marksism-leninisma principo de revolucio validas universale, tiel por Ĉinio kiel por ĉiuj aliaj landoj, tute senescepte.

"Problemoj de Milito kaj Strategio" (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ĉiu komunisto devas kompreni tiun ĉi veron: "El la pafilo venas ŝtatpotenco".

"Problemoj de Milito kaj Strategio" (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Rigardate el la vidpunkto de marksisma doktrino pri la ŝtato, la armeo estas la ĉefa konsistiga parto de ŝtata potenco. Kiu volas kapti la ŝtatan potencon kaj teni ĝin, tiu devas havi fortan armeon. Iuj mokas nin kiel pledantojn de la teorio de "ĉiopoveco de milito". Jes, ni estas pledantoj de la ĉiopoveco de revolucia milito; tio ne estas malbona, sed estas bona kaj marksisma. La pafiloj de la Rusa Komunista Partio kreis socialismon. Ni kreos demokratian respublikon. Sperto de la klasbatalo en la epoko de imperiismo instruas nin, ke nur per la forto de la pafilo la laborista klaso kaj la laborantaj amasoj povas venki la armitajn burĝaron kaj bienulojn. En tiu ĉi senco ni povas diri, ke nur per pafiloj la tuta mondo povas esti transformita.

"Problemoj de Milito kaj Strategio" (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Sen armita batalo, nek la proletaro, nek la popolo, nek la Komunista Partio havus ian pozicion en Ĉinio, kaj estus neebla triumfo de la revolucio. En la dek ok jaroj [depost la fondiĝo de la Partio], la disvolviĝo, firmiĝo kaj bolŝevikiĝo de nia partio iris en revoluciaj militoj; sen armita batalo ne estus la hodiaŭa Komunista Partio. Kamaradoj en la tuta Partio ne devas forgesi tiun sperton, kiun ni ricevis kontraŭ sango.

"Inaŭguraj Vortoj por *La Komunisto*" (4 oktobro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

IMPERIISMO KAJ ĈIUJ REAKCIULOJ ESTAS PAPERAJ TIGROJ

Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj. En aspekto la reakciuloj estas timindaj, sed fakte ili ne havas forton eksterordinaran. Rigardate el longperioda vidpunkto, vere potenca forto apartenas ne al la reakciuloj, sed al la popolo.

"Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong" (aŭgusto 1946), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Kiel ĉio en la mondo havas duoblan naturon (t. e. la leĝo de unueco de kontraŭoj), tiel ankaŭ imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj havas duoblan naturon, ili estas veraj tigroj kaj ankaŭ paperaj tigroj. En la historio, antaŭ ol sia preno de la regpotenco kaj en periodo da tempo post tio, la sklavposedantaro, la feŭda bienularo kaj la burĝaro estis vivplenaj, estis revoluciuloj, estis progresemuloj, estis veraj tigroj. En sekvinta periodo da tempo, ĉar iliaj kontraŭaj flankoj: la sklavaro, kamparanaro kaj proletaro paŝon post paŝo kreskis en forto kaj batalis kontraŭ ili pli kaj pli intense, ili do paŝon post paŝo turniĝis en la malon, en reakciulojn, en postiĝintojn, en paperajn tigrojn kaj fine estis aŭ estos renversitaj de la popolo. La klasoj reakciaj, postiĝintaj kaj putriĝintaj, ankoraŭ havas tian duoblan naturon eĉ en sia lasta vivmorta batalo kontraŭ la popolo. Unuflanke, ili estas veraj tigroj, homojn manĝantaj, milionojn, dekmilionojn da homoj manĝantaj. La afero de la popola batalado trapasis periodon de malfaciloj kaj penoj, kaj survoje estiĝis multaj zigzagoj. Por forigi la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo en Ĉinio, la ĉina popolo elspezis tempon de pli ol cent jaroj, oferis ĉirkaŭ kelkdek milionojn da homvivoj kaj nur tiam akiris la venkon de 1949. Vidu, ĉu ili ne estis vivaj tigroj, feraj tigroj kaj veraj tigroj? Tamen ili fine turniĝis en paperajn tigrojn, mortajn tigrojn kaj fabkazeajn tigrojn. Tio estas historiaj faktoj.

Ĉu oni ne vidis kaj aŭdis tion? Ja miloj kaj dekmiloj! Miloj kaj dekmiloj! Tial laŭesence, laŭ longperioda vidpunkto kaj laŭ strategia vidpunkto oni nepre devas rigardi la imperiismon kaj ĉiujn reakciulojn paperaj tigroj kiel ili fakte estas. Sur tio ni devas formi nian strategian penson. Aliflanke, ili estas vivaj, feraj kaj veraj tigroj, ili povas manĝi homojn. Sur tio ni devas formi nian manovran penson kaj taktikan penson.

Parolado ĉe la Vuĉang-kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (1 decembro 1958), citita en la klariga noto de "Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong", *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Subfosado, malsukceso, denove subfosado, denove malsukceso, kaj tiel ĝis pereo — jen estas la logiko de imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj tra la mondo en rilato al la afero de la popolo, kaj ili neniam iros kontraŭ tiu ĉi logiko. Tio estas leĝo marksisma. Kiam ni diras: "Imperiismo estas feroca", tio signifas ke ĝia naturo estas neŝanĝebla, la imperiistoj neniam volos formeti siajn buĉistajn tranĉilojn, kaj ili neniam fariĝos budhoj, ĝis sia pereo.

Batalo, malsukceso, denove batalo, denove malsukceso, denove batalo, kaj tiel ĝis venko — jen estas la logiko de la popolo, kaj ankaŭ ĝi neniam iros kontraŭ tiu ĉi logiko. Tio estas alia leĝo marksisma. La revolucio de la rusa popolo iris laŭ tiu ĉi leĝo kaj ankaŭ la revolucio de la ĉina popolo iras laŭ tiu ĉi leĝo.

"Forĵetu Iluziojn, Prepariĝu por Batalo!" (14 aŭgusto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popoloj de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, ne timu malfacilojn kaj marŝu antaŭen unuj sekvante aliajn. Do la mondo nepre apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj.

"Deklaro por Subteni la Popolon de Kongolando (Leopoldvilo) kontraŭ Usona Agreso" (28 novembro 1964), *Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn.*

LA DECIDA FAKTORO PRI VENKO DE MILITO ESTAS HOMOJ SED NE OBJEKTOJ

La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion.

"Pri Koalicia Registaro" (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Armiloj estas grava faktoro en milito, sed ne la decida faktoro; tio, kio decidas, estas homoj sed ne objektoj. La konkuro de fortoj estas ne nur konkuro de militaj kaj ekonomiaj fortoj, sed ankaŭ tiu de la forto kaj animo de homoj. Militaj kaj ekonomiaj fortoj estas necese manipulataj de homoj.

"Pri Longdaŭra Milito" (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La plej riĉa fonto de povo por fari militon kuŝas en la popolamasoj. Ke Japanio kuraĝas tirani nin, tio okazas ĉefe pro la neorganiziteco de la ĉinaj popolamasoj. Kiam tiu ĉi manko estos forigita, la japanaj agresantoj estos ĉirkaŭataj de nia jam stariĝinta kelkcentmiliona popolo, kvazaŭ sovaĝa bovo kureganta en ringon de flamoj; nia nura ekkrio teruros ĝin, kaj ĝi estos certe brulmortigita.

"Pri Longdaŭra Milito" (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Prenu la kazon de Ĉinio, tio, sur kio ni nin apogas, estas nur milio plus fusiloj, sed la historio fine pruvos, ke la milio plus fusiloj estas pli forta ol aeroplanoj plus tankoj de Ĉiang Kajŝek. Kvankam ankoraŭ multaj malfaciloj sin trovas antaŭ la ĉina popolo, kaj ili longe spertos suferojn sub la kunigita atako de la usona imperiismo kaj la ĉina reakciularo, tamen fine venos la tago, kiam la reakciuloj fiaskos kaj ni venkos. La kaŭzo estas nenio alia ol tio, ke la reakciuloj reprezentas reakcion kaj ni reprezentas progreson.

"Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong" (aŭgusto 1946), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

LA REVOLUCIA MILITO ESTAS MILITO DE LA AMASOJ

La revolucia milito estas milito de la amasoj; ĝi povas esti farata nur per mobilizo de la amasoj kaj dank' al ilia apogo.

"Zorgu la Vivon de la Amasoj, Priatentu Metodojn de Laboro" (27 januaro 1934), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Kio estas efektiva fera bastiono? Ĝi estas la amasoj, amasoj el milionoj kaj milionoj da homoj, kiuj kore kaj sincere subtenas la revolucion. Tio estas efektiva fera bastiono, nefrakasebla, absolute ne frakasebla per kia ajn forto. La kontraŭrevolucio ne povas nin frakasi, sed ni frakasos la kontraŭrevolucion. Unuigante milionojn kaj milionojn da popolanoj ĉirkaŭ la revolucia registaro kaj disvastigante nian revolucian militon, ni ja povos ekstermi ĉion kontraŭrevolucian kaj transpreni la tutan Ĉinion.

"Zorgu la Vivon de la Amasoj, Priatentu Metodojn de Laboro" (27 januaro 1934), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Konsiderante la revolucian militon laŭ vidpunkto de tuteco, la operacioj de la popolaj gerilanoj kaj tiuj de la ĉefaj fortoj de la Ruĝa Armeo kompletigas unu la alian kvazaŭ la dekstra kaj maldekstra brakoj de homo, se ni havus nur la ĉefajn fortojn de la Ruĝa Armeo sen la popolaj gerilanoj, ni estus kvazaŭ generalo kun sola brako.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Krome, tiu ĉi armeo estas potenca ankaŭ pro tio, ke ĝi havas la popolajn memdefendajn trupojn kaj la milicon — la vastajn armitajn organizojn de la amasoj — batalantajn en kunagado kun ĝi. En la Liberigitaj Regionoj de Ĉinio ĉiuj viroj kaj virinoj, junaj kaj mezaĝaj, estas organizitaj en la popolaj kontraŭjapanaj memdefendaj trupoj sur la bazo de memvolo kaj demokratio kaj sen forlaso de sia produkta laboro. La elitanoj de la memdefendaj trupoj, escepte de tiuj kiuj aliĝis al la armeo aŭ la gerilaj taĉmentoj, organiziĝis en la milico. Sen la kunagado de tiuj armitaj fortoj de la amasoj estas neeble venki la malamikon.

"Pri Koalicia Registaro" (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Cetere, tiu ĉi armeo estas potenca ankaŭ pro tio, ke ĝi sin dividas en du partojn, la ĉefajn fortojn kaj la lokajn fortojn; la unuaj povas plenumi batalan taskon en iu ajn regiono kiam estas necese kaj la tasko de la lastaj estas difinita por defendo de siaj lokoj kaj atako kontraŭ la tiea malamiko en kunago kun la milico kaj la memdefendaj trupoj. Tiu ĉi labordivido akiris la tutkoran subtenon de la popolo. Sen tiu ĉi ĝusta labordivido — ekzemple, se oni atentas nur pri la rolo de la ĉefaj fortoj kaj neglektas tiun de la lokaj fortoj — ankaŭ estas neeble venki la malamikon sub la kondiĉoj de la Liberigitaj Regionoj de Ĉinio. Sub la lokaj fortoj, estas organizitaj multaj armitaj laborgrupoj, kiuj estas bone trejnitaj kaj sekve pli bone kvalifitaj por militaj, politikaj kaj amasaj laboroj; ili penetras en la plej profundajn areojn post la malamikaj frontlinioj, batas la malamikon kaj mobilizas la amasojn por kontraŭjapana batalo, tiel subtenante la frontajn militajn operaciojn de la diversaj liberigitaj regionoj. En ĉio ĉi tio ili jam atingis grandajn sukcesojn.

"Pri Koalicia Registaro" (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La imperiistoj tiel nin tiranas, ke ni devas trakti ilin serioze. Ni devas ne nur havi potencan regulan armeon, sed ankaŭ organizi milicajn diviziojn en granda skalo. Tio povas malfaciligi al la imperiistoj moviĝi eĉ unu colon en nia lando en la okazo de ilia invado.

Parolo kun Raportisto de la Hinhua-a Novaĵ-agentejo (29 septembro 1958).

FONDI BAZLOKOJN EN LA KAMPARO KAJ SIEĜI LA URBOJN PER LA KAMPARO

La armita batalo de la Komunista Partio de Ĉinio estas nenio alia ol kamparana milito sub la gvido de la proletaro.

"Inaŭguraj Vortoj por *La Komunisto*" (4 oktobro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La Kontraŭjapana Rezistmilito estas esence kamparana milito.

"Pri Nova Demokratio" (januaro 1940), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ĉar la fortaj imperiistoj kaj iliaj reakciaj kunliganoj en Ĉinio ĉiam longe okupas la ĉefajn urbojn de Ĉinio, se la revoluciaj fortoj ne volas kompromisi kun la imperiistoj kaj iliaj lakeoj, sed persisti en la luktado, kaj se ili intencas akumuli kaj hardi sian forton kaj eviti decidajn batalojn kontraŭ la fortaj malamikoj antaŭ ol ili estas kolektintaj sufiĉan forton, ili devas, do, ŝanĝi la postrestintajn kamparojn en progresintajn, fortikajn bazlokojn, en milite, politike, ekonomie kaj kulture grandajn revoluciajn bastionojn, de kie ili povas batali kontraŭ la kruelaj malamikoj, kiuj utiligas la urbojn por ataki la kamparajn regionojn, kaj de kie ili povas iom post iom akiri en longdaŭra batalado la plenan venkon de la revolucio.

"La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio" (decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Kio do estas la bazlokoj de gerila milito? Ili estas la strategiaj bazlokoj sur kiuj la gerilaj fortoj sin apogas en plenumado de siaj strategiaj taskoj kaj por atingi la celon konservi kaj disvolvi sin mem kaj ekstermi kaj forpeli la malamikon. Sen tiaj strategiaj bazlokoj, oni havos neniun apogilon en plenumo de ĉiaj strategiaj taskoj aŭ en efektivigo de la celo de milito.

"Strategiaj Problemoj en Gerila Milito kontraŭ Japanio" (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La longdaŭra revolucia luktado entreprenata en la revoluciaj bazlokoj estas ĉefe la kamparana gerila milito sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. Tial estas eraro neglekti la starigon de revoluciaj bazlokoj en la kamparaj regionoj, la entreprenadon de peniga laboro inter la kamparanoj kaj la praktikadon de gerila milito.

"La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio" (decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La emfazo de la laboro en kamparaj bazlokoj ne signifas ke oni povas forlasi la laboron en la urboj kaj en la vastaj kamparaj regionoj ankoraŭ sub la regado de la malamikoj; kontraŭe, sen la laboro en la urboj kaj aliaj kamparaj regionoj, la kamparaj bazlokoj estos izolitaj kaj la revolucio suferos malvenkon. Cetere, la fina celo de la revolucio estas kapti la urbojn, kiuj servas kiel la ĉefa bazo de la malamikoj, kaj tiu celo ne povos esti atingita sen sufiĉa laboro en la urboj.

"La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio" (decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

De 1927 ĝis nun la centro de gravito de nia laboro estis en la kamparoj, kolekti fortojn en la kamparoj, sieĝi la urbojn per la kamparoj kaj poste preni la urbojn.

"Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio" (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

LA POPOLA LIBERIGA ARMEO ESTAS ARMITA KOLEKTIVO PLENUMANTA REVOLUCIAJN POLITIKAJN TASKOJN

Sen popola armeo la popolo havas nenion.

"Pri Koalicia Registaro" (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Nia principo estas tio, ke la Partio komandas la pafilon, kaj la pafilo devas neniam esti permesata komandi la Partion.

"Problemoj de Milito kaj Strategio" (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Tiu ĉi armeo estas potenca, ĉar ĉiuj ĝiaj membroj havas memkonscian disciplinemon; ili kolektiĝis kaj batalas ne por la privataj interesoj de malmultaj homoj aŭ malvasta grupo, sed por la interesoj de la vastaj popolamasoj kaj la tuta nacio. Firme stari kun la ĉina popolo kaj tutkore, plenanime servi al la ĉina popolo estas la sola celo de tiu ĉi armeo.

"Pri Koalicia Registaro" (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La ĉina Ruĝa Armeo estas armita kolektivo por efektivigi la politikajn taskojn de la revolucio. Precipe nun, la Ruĝa Armeo certe ne devas limigi sin sole en militado; krom militi por neniigi la militan forton de la malamiko, ĝi devas preni sur sin ankaŭ la gravajn taskojn propagandi inter la amasoj, organizi la amasojn, armi ilin, helpi ilin establi revolucian regpotencon kaj starigi partiajn organizojn. La Ruĝa Armeo militas ne nur por militi sed ankaŭ por propagandi inter la amasoj, organizi ilin, armi ilin kaj helpi ilin

establi revolucian regpotencon. Sen tiuj celoj, milito perdas sian signifon kaj la Ruĝa Armeo perdas la signifon de sia ekzisto.

"Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio" (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Alia tre gravega kaj okulfrapa trajto de la Okavoja Armeo estas ĝia politika laboro, kiu estas gvidata de tri fundamentaj principoj, nome: Unue, la principo de unueco de la oficiroj kaj la soldatoj, kiu signifas elimini feŭdismon en la armeo, malpermesi batadon kaj insultadon, starigi konsciencan disciplinemon kaj dividi inter si la dolĉojn kaj maldolĉojn — rezulte de tio la tuta armeo estas bone unuigita. Due, la principo de unueco de la armeo kaj la popolo, kiu signifas teni la disciplinon kiu malpermesas eĉ plej malgrandan atencon al la interesoj de la popolo, fari propagandon inter la amasoj, ilin organizi kaj armi, malpezigi iliajn financajn ŝarĝojn kaj subpremi la naciperfidulojn, kiuj malutilas al la armeo kaj la popolo — rezulte de tio la armeo estas bone unuigita kun la popolo kaj ĉie bonvenigata. Trie, la principo de diserigo de la malamikaj trupoj kaj malsevere trakti la militkaptitojn. Nia venko dependas ne nur de niaj militaj operacioj sed ankaŭ de la diserigo de la malamikaj trupoj.

"Intervjuo kun la Brita Ĵurnalisto James Bertram" (25 oktobro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La Popola Liberiga Armeo ĉiam estas batalanta trupo. Eĉ post la venko tra la tuta lando, dum la historia periodo en kiu la klasoj ankoraŭ ne malaperos enlande kaj la imperiisma sistemo ankoraŭ ekzistos en la mondo, nia armeo restos batalanta trupo. Pri tiu ĉi punkto devas troviĝi neniu ajn miskompreno aŭ ŝanceliĝo.

"Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio" (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La Popola Liberiga Armeo devas esti granda lernejo. En tiu ĉi granda lernejo, oni devas lerni politikon, militajn aferojn kaj kulturon, kaj ankaŭ povas entrepreni agrokulturan kaj flankokupan produkton kaj funkciigi iujn mezgrandajn kaj malgrandajn fabrikojn por produkti iujn el siaj bezonaĵoj kaj fabrikaĵojn por fari egalvaloran interŝanĝon kun la ŝtato. Tiu ĉi granda lernejo povas krome fari amasan laboron kaj partopreni la socialisman edukan movadon en la fabrikoj kaj la kamparo; post la fino de tiu movado, ĝi povas ĉiam trovi amasan laboron por ĉiam unuigi sin kun la popolo; kaj ĝi devas ankaŭ partopreni en ĉiu tempo la batalon de kultura revolucio por kritiki la burĝaron. Tiamaniere la milita afero povas kombiniĝi kun la lerno, kun la agrogkulturo, kun la industrio kaj kun la amasa laboro. Kompreneble, oni devas bone aranĝi la aferon kaj distingi la ĉefan okupon de la subordigitaj

kaj ĉiu trupo povas samtempe okupiĝi nur pri unu aŭ du el la tri taskoj: agrokulturo, industrio kaj la amasa laboro, sed ne pri ili ĉiuj. Tiamaniere, la milionoj da armeanoj povos ludi tre gravan rolon.

"Letero al Kamarado Lin Biaŭ", el la ĉefartikolo de *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*) je la unua de aŭgusto, 1966: "La Tuta Lando Devas Fariĝi Granda Lernejo de la Penso de Maŭ Zedong".

LA STRATEGIO KAJ TAKTIKOJ DE POPOLA MILITO

Vi batalas laŭ via maniero kaj ni laŭ la nia; ni batalas kiam ni povas venki kaj fortiriĝas kiam ni ne povas.

El la verko de kamarado Lin Biaŭ *Vivu la Venko de Popola Milito* (septembro, 1965)

(Aldono)

Kamarado Maŭ Zedong donis majstran resumon de la stragegio kaj taktikoj de popola milito kiel jene: Vi batalas laŭ via maniero kaj ni laŭ la nia; ni batalas kiam ni povas venki kaj fortiriĝas kiam ni ne povas.

Tio signifas ke vi apogas vin sur modernaj armiloj kaj ni apogas nin sur la popolamasoj kun alta revolucia konscio; vi disvolvas plene vian superecon kaj ni la nian; vi havas vian manieron de batalo kaj ni havas la nian. Kiam vi batalas kontraŭ ni, ni ne lasas vin tion fari, nek eĉ nin trovi. Kiam ni batalas kontraŭ vi, ni ne lasas vin forkuri, kaj ni trafas kaj forglutas vin. Kiam ni povas forgluti vin, ni vin forglutas; kaj kiam ni ne povas vin forgluti, ni ne lasas vin forgluti nin. Se oni ne batalas, kiam oni povas venki, tio estas oportunismo; kaj se oni batalas senkonsidere kiam ne estas ebleco de venko, tio estas aventurismo. Batalo estas la baza punkto, sur kiu staras ĉiuj niaj strategio kaj taktikoj. Ni rekonas necesecon de fortiriĝo, antaŭ ĉio sub la kondiĉo de la rekono de la neceseco de batalo. Ĉiu fortiriĝo estas por batalo, por fine ekstermi plene la malamikon. Tiaj strategio kaj taktikoj povas esti aplikataj nur de tiuj kiuj sin apogas sur la vastaj popolamasoj. Aplikante tiajn strategion kaj taktikojn, oni povas plene disvolvi la superecon de popola milito. Kian ajn superecon la malamiko havas en la teknika ekipaĵo kaj kian ajn metodon ĝi aplikas kontraŭ ni, ĝi povas nur troviĝi en pasiva pozicio esti batata, kaj la iniciativo ĉiam restas en niaj manoj.

Lin Biaŭ: *Vivu la Venko de Popola Milito* (septembro 1965)

Nia strategio estas "meti unu kontraŭ dek" kaj nia taktiko estas "meti dek kontraŭ unu" — tio ĉi estas unu el niaj fundamentaj principoj por venki la malamikon.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La niaj estas gerilaj taktikoj. Ili konsistas ĉefe el la jenaj punktoj:

"Dividu niajn fortojn por veki la amasojn, koncentru niajn fortojn por trakti la malamikon."

"Kiam la malamiko antaŭenpuŝiĝas, ni retiriĝas; kiam la malamiko kampadas, ni ĝin ĝenas; kiam la malamiko lacas, ni ekatakas; kiam la malamiko retiriĝas, ni persekutas."

"Alprenu la politikon de ondeca antaŭenpuŝiĝo por stabilaj bazlokoj; persekutate de potenca malamiko, alprenu la politikon de rondira moviĝado."

"Veku grandegan nombron da amasoj en tre mallonga tempo kaj per tre bonaj metodoj."

Ĉi tiuj taktikoj similas al manipulado de reto; ni devas esti ĉiam pretaj ĝin elĵeti aŭ kuntiri. Ni ĝin elĵetas por gajni amasojn kaj ĝin kuntiras por trakti la malamikon.

"Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon" (5 januaro 1930),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, vol. I.

Niaj militaj principoj estas:

(1) Bati unue la malamikajn fortojn disajn kaj izolajn, kaj poste la koncentrigitajn kaj potencajn.

(2) Preni unue la malgrandajn urbojn, mezgrandajn urbojn kaj vastajn kamparojn, kaj poste grandajn urbojn.

(3) Celi ĉefe ekstermon de aktiva forto de la malamiko, sed ne konservon aŭ prenon de urboj kaj lokoj. La konservo aŭ preno de urboj kaj lokoj estas rezulto de la ekstermo de malamika aktiva forto, kaj ofte iu urbo aŭ loko povas esti definitive konservata aŭ prenita nur post plurfoja ripetado de transpreno.

(4) Koncentrigi en ĉiu batalo absolute superan forton (duoble, trioble, kvaroble kaj iufoje eĉ kvinoble aŭ sesoble kiom la malamika), sieĝi de ĉiuj flankoj la malamikon kaj strebi al ĝia kompleta ekstermo, lasante neniun parton el ĝi forkuri el la reto. En specialaj cirkonstancoj, apliki la metodon doni al la malamiko frakasan baton, t. e. koncentrigi nian tutan forton por ataki la fronton kaj unu aŭ ambaŭ alojn de la malamiko, celante ekstermi unu parton de ĝi kaj frakasi alian, por ke niaj trupoj povu rapide translokiĝi por eksterme bati aliajn malamikajn fortojn. Strebi al evito de konsuma batalado en kiu la gajno ne kovras la perdon aŭ la gajno nur egalas al la perdo. Tiamaniere, en la tuto ni troviĝas en malsupera situacio (rilate al kvanto), sed en ĉiu parto, en ĉiu konkreta kampanjo, ni estas en absoluta supereco, kio garantias do al ni la venkon en la kampanjo. Kun la paso de la tempo, ni fariĝos superaj en la tuto, kaj fine ekstermos ĉiujn malamikojn.

(5) Ne entrepreni batalon senpreparan, nek batalon sen certeco pri ĝia venko; strebi al bona prepariĝo en ĉiu batalo, strebi al certeco pri venko en komparo de niaj kondiĉoj kun tiuj de la malamiko.

(6) Disvolvi nian batalstilon — kuraĝo en batalo, maltimo al sinofero, maltimo al laciĝo kaj kontinua batalado (t. e. entrepreni senripoze sinsekvajn batalojn dum mallonga tempo).

(7) Strebi al ekstermo de la malamiko en movaj operacioj. Samtempe doni atenton al la taktikoj de pozicia atako kaj preni fortikigitajn punktojn kaj urbojn de la malamiko.

(8) Koncerne al atako de urboj, preni senŝanceliĝe ĉiujn fortikigitajn punktojn kaj urbojn de la malamiko malforte defendatajn. Preni en oportuna okazo ĉiujn fortikigitajn punktojn kaj urbojn de la malamiko defendatajn per mezgrada forto, se cirkonstancoj permesas. Kaj por preni la fortikigitajn punktojn kaj urbojn forte defendatajn de la malamiko atendi ĝis tiam, kiam la kondiĉoj estas maturaj.

(9) Replenigi niajn fortojn per ĉiuj armiloj kaj plejparto de la personaro kiujn ni kaptis de la malamiko. La ĉefa fonto de homaj kaj materiaj fortoj de nia armeo sin trovas en la fronto.

(10) Bone utiligi la intervalon inter du kampanjoj por ripozi, fari ideologian edukadon kaj trejnadon en niaj trupoj. La periodo de ripozo, ideologia edukado kaj trejnado ĝenerale ne devas esti tro longa, por laŭeble ne lasi al la malamiko tempon por spiri.

Ĉi tiuj estas la ĉefaj metodoj, per kiuj la Popola Liberiga Armeo venkis Ĉiang Kajŝek. Ili rezultiĝis el la hardado de la Popola Liberiga Armeo dum ĝia longdaŭra militado kontraŭ la en- kaj ekster-landaj malamikoj kaj tute konvenas al nia nuna situacio.... Niaj strategio kaj taktikoj sin bazas sur popola milito; neniu armeo kontraŭpopola povas ilin uzi.

"La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj" (25 decembro 1947),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, vol. IV.

NIA ĈEFA METODO ESTAS LERNI MILITI EN MILITO

La leĝoj de milito estas problemo, kiun ĉiu ajn komandanto de milito nepre devas studi kaj solvi.

La leĝoj de revolucia milito estas problemo, kiun ĉiu ajn komandanto de revolucia milito nepre devas studi kaj solvi.

La leĝoj de la ĉina revolucia milito estas problemo, kiun ĉiu ajn komandanto de la ĉina revolucia milito nepre devas studi kaj solvi.

Nun ni kondukas militon, nia milito estas revolucia milito, kaj nia revolucia milito iras en tiu ĉi duonkolonia kaj duonfeŭda lando Ĉinio. Tial, ni devas studi ne nur la ĝeneralajn leĝojn de milito, sed ankaŭ la specifajn leĝojn de revolucia milito, kaj ankaŭ la eĉ pli specifajn leĝojn de la revolucia milito en Ĉinio.

Por ĉiu estas klare, ke kiam oni faras ion ajn, se oni ne komprenas ĝiajn cirkonstancojn, ĝian naturon kaj ĝiajn rilatojn kun aliaj aferoj, oni ne povas scii la leĝojn ĝin regantajn, ne scias kiel ĝin fari kaj ne povas bone ĝin fari.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ĝustaj aranĝoj de komandanto devenas de liaj ĝustaj decidoj, liaj ĝustaj decidoj devenas de liaj ĝustaj juĝoj, kaj liaj ĝustaj juĝoj devenas de detala kaj necesa rekognosko kaj de sistema medito pri la diversaj materialoj kolektitaj dum rekognosko. La komandanto aplikas ĉiujn eblajn kaj necesajn rekognoskajn rimedojn, meditas pri la akiritaj informoj pri la malamika situacio, forigante la senvalorajn kaj prenante la esencajn, forigante la falsajn kaj konservante la verajn, procedante de ĉi tiu al tiu kaj de la supraĵo al la interno; kaj tiam li alprenas la kondiĉojn de sia propra flanko en la kalkulo kaj faras komparon kaj studas la rilatojn inter ambaŭ flankoj, kaj tiel formas siajn juĝojn, faras decidon kaj ellaboras siajn planojn. Jen estas la kompleta procezo de konado de situacio, kiun milita strategiisto trapasas antaŭ ol li ellaboras ĉiun strategian, kampanjan aŭ batalan planon.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Sendube, venkon aŭ malvenkon en milito decidas ĉefe la militaj, politikaj, ekonomiaj kaj naturaj kondiĉoj de ambaŭ flankoj. Sed ne nur tiuj. Ĝin decidas ankaŭ la subjektiva kapablo de ambaŭ flankoj en direktado de la milito. Por gajni militon, milita strategiisto ne povas transpasi la limojn altruditajn de materiaj kondiĉoj, tamen li povas kaj devas klopodi por gajni la militon interne de tiuj limoj. La scenejo de agado por milita strategiisto estas konstruita sur objektivaj materiaj kondiĉoj, tamen sur tiu ĉi scenejo li povas direkti la prezentadon de multaj dramoj plenaj de sono kaj koloro, potenco kaj imponeco.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Librolegado estas lerno, ankaŭ aplikado estas lerno kaj eĉ pli grava speco de lerno. Nia ĉefa metodo estas lerni militi en milito. Ankaŭ persono, kiu ne trovis ŝancon viziti lernejon, povas lerni militi, tio estas, lerni en milito. Revolucia milito estas afero de popolamasoj; oni ofte faras ĝin ne post ellerno, sed lernas post ekfaro, ĉar faro per si mem estas lerno.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Noto de la Redakcio

Memore de la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, ni publikigas vortojn de Prezidanto Maŭ pri popola milito.

La teorio de Prezidanto Maŭ pri popola milito estas grava konsistiga parto de la penso de Maŭ Zedong — marksism-leninismo de nuna epoko.

La penso de Maŭ Zedong estas la orientilo por ĉiuj subpremataj popoloj kaj nacioj en ilia batalo por liberiĝo en la nuna epoko. Plej gravas, ke ni armu nin per la teorio de kamarado Maŭ Zedong pri popola milito, frakasu la malnovan ŝtatmaŝinon per la pafilo, faligu la imperiismon kaj ĝiajn lakeojn per la pafilo kaj transformu la tutan mondon per la pafilo.

Post kiam la proletaro deprenis la regpotencon, dum la tuta historia periodo de socialismo, ĉiam ekzistas batalo inter la proletaro strebanta por firmigi la proletan diktaturon kaj la burĝaro strebanta por renversi la proletan diktaturon. Por renversi la proletan diktaturon, la burĝaro ĉiam plenenergie klopodas kapti la pafilon pere de siaj reprezentantoj en la Partio. Serioza leciono estis tio, ke la reviziisma kliko de Ĥruŝĉov uzurpis la gvidantecon de la armeo kaj efektivigis kontraŭrevolucian ŝtatrenverson en Sovetunio. Por efektivigi kapitalisman restaŭron en nia lando, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon entreprenis frenezajn komplotojn en la pasintaj 17 jaroj por uzurpi la gvidantecon de la armeo, en koluzio kun la grandaj intriguloj, karieristoj kaj militaristoj Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking, vane intencante turni nian popolan armeon en instrumenton por ilia kontraŭrevolucia restaŭro. Imperiismo kun Usono kiel la estro vane intencas lanĉi agreson kontraŭ la socialismaj landoj kaj entrepreni aktivadojn por ilin renversi. Tial ankaŭ la revoluciaj amasoj de la socialismaj landoj nepre devas serioze lerni la teorion de Prezidanto Maŭ pri popola milito, bone mastri tiun ĉi plej akran ideologian armilon por frakasi la intrigojn de kapitalisma restaŭro kaj firmigi la proletan diktaturon, ĉiam esti singardemaj kontraŭ armita agreso fare de imperiismo kaj ĝiaj komplicoj, kaj garantii, ke la pafilo estas firme tenata en la manoj de la proletaro por preventi reviziistojn uzurpi la armean gvidantecon kaj ŝanĝi la naturon de la proleta armeo. Tio ĉi estas la plej grava ĉenero por preventi kapitalisman restaŭron.

En la senprecedenca granda proleta kultura revolucio, la Ĉina Popola Liberiga Armeo, armita per la penso de Maŭ Zedong, ludas la grandan rolon de kolono por la proleta diktaturo kaj faris novan meritoplenan kontribuon; kaj samtempe ĝi ankaŭ ricevis novan edukon, hardadon kaj provadon en la ŝtormoj kaj ondoj de la granda revolucio. La interveno de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en la grandan proletan kulturan revolucion en civilaj organizoj estas la plej nova disvolviĝo de la teorio de nia granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ pri la konsturo de la proleta revolucia armeo.

La Penso de Maŭ Zedong Lumigas al Nia Partio la Vojon de Triumfa Antaŭenmarŝo

— Celebre al la 46-a Datreveno de Fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio

Ĉefartikolo de la Gazeto *Honqi* (*Ruĝa Flago*), N-ro. 11, 1967

46 jaroj jam forpasis ekde la fondiĝo de la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio. Kun senkompara fiero, ni celebras tiun ĉi brilan festotagon en la tempo, kiam la granda proleta kultura revolucio akiris grandajn venkojn.

Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la Komunista Partio de Ĉinio per heroa batalado, sangverŝado kaj oferoj transformis la malriĉan kaj subevoluintan, duonfeŭdan kaj duonkolonian, malnovan Ĉinion plenan de vundoj kaj furunkoj en grandan prosperan kaj vivplenan socialisman landon. Alte tenante la grandan standardon de proleta revolucio kaj tiun de internaciismo en la batalo kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj, nia partio defendas marksism-leninismon, forte subtenas la revoluciajn movadojn de la diverslandaj popoloj kaj tiel fariĝis ĉefa apogilo de la internacia komunisma movado.

Kial la Komunista Partio de Ĉinio povis akiri tiel grandajn venkojn? La kaŭzo kuŝas en tio, ke nia partio estas partio fondita kaj kulturita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ mem kaj starigita laŭ la revolucia teorio kaj revolucia stilo de la penso de Maŭ Zedong.

La penso de Maŭ Zedong markas novan etapon de la disvolviĝo de marksismo. En nia epoko, devio de la penso de Maŭ Zedong signifas defundamentan devion de marksism-leninismo, kaj en tia kazo estas neeble starigi veran marksism-leninisman politikan partion. Estas precize la penso de Maŭ Zedong, kiu lumigas al nia partio la vojon de triumfa antaŭenmarŝo. Ĉiuj venkoj de nia partio estas grandaj venkoj de la penso de Maŭ Zedong.

En la etapo de la demokratia revolucio, Prezidanto Maŭ kritikis dekstran oportunismon kaj "maldekstran" oportunismon kaj elhakis la vojon por la ĉina revolucio, kombinante marksism-leninismon kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, nia partio alte tenis la grandan standardon de armita batalo, sieĝis la urbojn deire de la kamparo, fine venkis la japanan imperiismon, usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn, la reakciulojn de Ĉiang Kajŝek-kliko, post jardekoj de sanga militado, kaj starigis ŝtaton de la proleta diktaturo. **"La disvolviĝo, firmiĝo kaj bolŝevikiĝo de nia partio iris en revoluciaj militoj; sen armita batalo ne estus la hodiaŭa Komunista Partio."**

Post la venko de la demokratia revolucio, la dekstraj oportunistoj en la Partio disvastigis diversspecajn absurdaĵojn kaj klopodis haltigi la revolucion kaj praktiki kapitalismon. En tiu ĉi kriza momento, Prezidanto Maŭ reĝustigis la direkton, kritikis la dekstran oportunisman linion kaj gvidis nian partion turni la demokra-

tian revolucion en la socialisman sen ia halto. En la mallonga tempo de kelkaj jaroj, kvincent milionoj da kamparanoj estis kondukitaj sur la larĝan vojon de socialisma kolektivigo kaj la socialisma transformado de kapitalismaj industrio kaj komerco kaj de metiindustrio estis fundamente efektivigita.

En Sovetunio, sursceniĝis la renegata kliko de Ĥruŝĉov, la Komunista Partio de Sovetunio kreita de Lenin mem fariĝis reviziisma partio, kaj la unua socialisma ŝtato fariĝis ŝtato de la burĝa diktaturo. Tia afero okazis ankaŭ en kelkaj aliaj socialismaj landoj.

Post kiam la socialisma transformo de la posedsistemo de produktaj rimedoj estis ĝenerale plenumita, aperis ankaŭ en nia partio subfluo de la restaŭro de kapitalismo. Kiamaniere nia ŝtato povas eviti ŝanĝon de sia koloro? Kiamaniere nia partio povas eviti turniĝon en reviziisman partion? Tiuj estis la plej gravaj kaj plej zorgataj problemoj elmetitaj al ni de la proletaro kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo. La granda Komunista Partio de Ĉinio kapablas respondi kaj solvi tiujn problemojn, ĉar ni havas la genian gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong.

Ĝuste kiam la maro ruliĝas en tumulto, herooj elmontras sian veran kuraĝon. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ science resumis la sperton de klasa batalo en la socialisma socio de nia lando, la historian sperton de la internacia proleta diktaturo kaj precipe la doloregan lecionon de la uzurpado de la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato fare de la reviziisma kliko de Ĥruŝĉov, kaj elmetis tutan serion da teorioj kaj politikoj por preventi la kolorŝanĝon de niaj partio kaj ŝtato.

Prezidanto Maŭ plenamplekse, sisteme kaj science eksplikis la teorion pri klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo en socialisma socio. Li montris: **"En tiu ĉi historia etapo de socialismo ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo, ekzistas la batalo inter la du vojoj — socialisma kaj kapitalisma, kaj ekzistas la danĝero de kapitalisma restaŭro. Ni nepre devas koni la longdaŭrecon kaj komplekson de tia batalo. Ni nepre devas vigligi nian singardemon. Estas necese konduki socialisman edukon. Ni nepre devas ĝuste kompreni kaj trakti la problemojn de klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo, ĝuste distingi kaj trakti la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj kaj tiujn interne de la popolo. Alie, socialisma lando kia la nia iros al la kontraŭa flanko kaj degeneros, kaj aperos restaŭro."**

Por preventi la uzurpon de la gvidanteco de la Partio fare de reviziismo kaj la kapitalisman restaŭron, Prezidanto Maŭ admonis, ke estas necese disvolvi profunde kaj plenamplekse klasan batalon en la tuta Partio kaj la tuta lando kaj disvolvi la tri grandajn revoluciajn movadojn (de klasbatalo, batalo por produkto kaj scienca eksperimentado), ke estas necese konduki la socialisman edukan movadon kaj reorganizi la revolucian klasan vicaron por rebati la furiozan atakon de kapitalismo kaj feŭdaj fortoj, kaj ke estas necese kulturi kaj elbaki milionojn kaj milionojn da daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro en la ŝtormoj kaj ondegoj de klasa batalo.

En la lastaj kelkaj jaroj Prezidanto Maŭ plie disvolvis la teorion de revoluciado sub la kondiĉoj de la proleta diktaturo kaj montris, ke sub la proleta diktaturo la ĉefa objekto de la revolucio estas plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. La teorio, linio, principoj kaj politikoj ellaboritaj de Prezidanto Maŭ por la granda proleta kultura revolucio kaj serio da aliaj verkoj kaj direktivoj de Prezidanto Maŭ estas mejloŝtono en la disvolviĝo de marksismo, signanta, ke marksismo jam disvolviĝis al tute nova etapo — la etapo de la penso de Maŭ Zedong.

La granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ estas granda revolucio, kiu celas solvi la problemon de prevento de la turniĝo de la proleta diktaturo en la burĝan, de prevento de la degenero de la proleta politika partio en la politikan partion de reviziismo.

La plej ĉefa karakteriza trajto de klasa batalo sub la kondiĉoj de la proleta diktaturo estas tio, ke la klasaj malamikoj energie klopodas uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la registaro pere de plenmano da potenctenantoj, kiuj enŝteliĝis en nian partion kaj iras la kapitalisman vojon, kaj pere de ili turni la proletan

diktaturon en la burĝan kaj transformi la komunistan partion en partion reviziismán. La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas la plej danĝeraj malamikoj. Por preventi la kolorŝanĝon de niaj ŝtato kaj partio, la sola ebla vojo estas komenci la grandan proletan kulturan revolucion por faligi la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, ĝisfunde elimini ilian malutilegan influon el la Partio kaj ŝtataj institucioj, plenenergie disrompi la ideologion de la burĝaro kaj starigi tiun de la proletaro kaj certigi en la tuta Partio la absolutan aŭtoritatecon de la penso de Maŭ Zedong. Nur dank' al la disvolvo de amasa movado de la granda proleta kultura revolucio, nia partio povas disvolviĝi, plifortiĝi kaj firmiĝi en la nova etapo de socialisma revolucio. Tio estas granda vero.

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kiun la vastaj revoluciaj amasoj senmaskigis en la granda proleta kultura revolucio, estas ĝuste tia persono, kiu konstante oponas la grandan ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kaj plenforte klopodas turni nian partion en partion reviziisman, en partion burĝan.

Dum la jaroj, kiam ardis la Kontraŭjapana Rezistmilito, tiu plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon parolis nek pri armita batalo, nek pri kapto de regpotenco, sed faris malplenan babiladon pri "memkulturado" de kompartianoj. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, li publike distrumpetis la parlamentan vojon, instigante nian partion transdoni sian armeon al Kuomintango kaj fariĝi "ŝtataj oficistoj" en la parlamento kaj la reakcia registaro de Kuomintango. Se ni estus tiel agintaj, nia partio estus degenerinta en reviziisman partion de Thorez, Togliatti kaj similaj kaj fariĝinta ilo en la manoj de la burĝaro.

Post la tutlanda venko tiu plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon senskrupule disvastigis la teorion, ke "ekspluatado havas siajn meritojn", kriaĉis, ke "oni lasu la kapitalistojn ekzisti kaj disvolviĝi dekojn da jaroj", pledis por la plenforta disvolvo de kulaka ekonomio de la tipo de "tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu ĉaro", vane intencante establi kapitalisman socion en Ĉinio. Por efektivigi tiun reakcian politikan linion, li senhonte postulis, ke kompartianoj la unuaj dungu laboristojn kaj faru ekspluatadon, kaj diris tiajn sensencaĵojn: "Tiuj, kiuj faras ekspluaton, ankoraŭ povas resti socialistoj", kompartianoj fariĝintaj kulakoj "povas konservi sian membrecon en la Partio", "estas nenio timinda, se en nordorienta Ĉinio estas dekmil partianoj-kulakoj" kaj "la partiaj reguloj kaj partia konstitucio permesas individuan mastrumadon kaj dungadon de laboristoj, kaj malpermeso de ekspluatado estas dogmismo".

Tio estas perfido al marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong de la kapo ĝis la piedoj. En la programo de nia partio, tio estas klare difinita, ke "la Komunista Partio de Ĉinio estas la avangardo de la ĉina laborista klaso", ke ĝia celo estas "ĝisfunde likvidi la ekspluatan sistemon", kaj "efektivigi komunismon" en Ĉinio. Se kulakoj kaj aliaj ekspluatantoj povus fariĝi niaj partianoj, kaj partianoj la unuaj farus ekspluatadon, kiel diris la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, ĉu nia partio ne fariĝus partio de kulakoj kaj la ekspluataj klasoj? Neniam troviĝis proleta politika partio, kies "partiaj reguloj kaj partia konstitucio" permesas al ties membroj dungi laboristojn kaj ekspluati. Nur la "partiaj reguloj kaj partia konstitucio" de burĝaj politikaj partioj povas permesi tion.

Post kiam la socialisma transformado de la posedsistemo de produktaj rimedoj en nia lando estis fundamente plenumita, tiu plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon senskrupule predikis pri estingiĝo de klasbatalo dirante, ke "enlande la ĉefa klasbatalo estas jam fundamente finita", kaj ke "la problemo kiu venkos kiun inter socialismo kaj kapitalismo nun estas jam solvita". Same kiel Ĥruŝĉov, li intencis transformi la Komunistan Partion en "partion tutpopolan". Li pledis por tiri aron da burĝaj reprezentantoj en la Partion kaj eĉ publike diris, ke "estus pli bone, se aliĝus al la Partio" kapitalistoj. Li diris ankaŭ, ke "la plej grava tasko de la ŝtato estas organizi la socian vivon", kaj ke "la ĉefa tasko de la Partio estas kiel eble plej rapide disvolvi produktajn fortojn".

"Tutpopola partio" estas pura trompo. Same kiel la ŝtato, politika partio estas ilo de klasbatalo. Tiel longe kiel ekzistas la komunista partio, ĝi ne povas esti de la tuta popolo. La tiel nomata "tutpopola partio" estas efektive centprocente burĝa partio. La centra tasko de la komunista partio povas esti nur entrepreni klasbatalon kaj efektivigi kaj plifortigi la proletan diktaturon. Kiu ne faras tion, ne estas vera komunista partio. Nei la klasan naturon de la ŝtato kaj tiun de la socio sed kriaĉi pri "organizado de socia vivo" aŭ "disvolvo de produktaj fortoj" estas senescepte trompa artifiko de la malnova reviziismo. Tiuj ideoj de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas varo de la sama speco kiel tiuj distrumpetitaj de Ĥruŝĉov, ke "la problemoj de ekonomio kaj produktado... okupas la centran lokon en la agado de la partiaj organizoj kaj okupas la ĉefan lokon en ilia tuta laboro". Se ni agus tiel, kiel li diris, nia marksism-leninisma partio certe estus fariĝonta reviziisma partio kiel en Sovetunio, kaj la tuta Ĉinio estus ŝanĝonta sian koloron.

Dum la granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, ni senmaskigis kaj faligis la plej grandan enpartian potenctenanton irantan la kapitalisman vojon, detruis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de li praktikatan kaj frakasis lian intrigon de turno de la proleta diktaturo en la burĝan kaj ŝanĝo de nia partio en la reviziisman. Tio estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong, granda venko de la partia konstruado orientata de la penso de Maŭ Zedong.

Nia partio havas kuraĝon kaj bravan spiriton por komenci la grandan proletan kulturan revolucion kaj eltenis la rigoran provon de tiu ĉi granda movado. Tio elokvente pruvas, ke nia partio estas la plej forta kaj plej altnivela marksism-leninisma partio.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"La substituo de la malnova per la nova estas universala kaj por eterne nerezistebla leĝo en la universo."** Pere de la granda proleta kultura revolucio, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas eliminita, kaj la vastaj amasoj de partianoj estas harditaj en la arda revolucia fajro, kaj, samtempe, nova freŝa sango estas aldonita en nian partion, tiel ke nia partio fariĝis pli sana, pli vigla kaj pli riĉa je batalpovo. Reordigo de la Partio en la amasa movado de la granda proleta kultura revolucio signas novan eraon en la konstruado de proleta politika partio.

La granda proleta kultura revolucio purigis la proletan stabon kaj ege plifortigis la partian gvidadon. La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon diris, ke la granda proleta kultura revolucio signifas "forĵeton de la partia gvidado". Tio estas entute kalumnio. La granda proleta kultura revolucio estas efektiviĝanta sub la rekta gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Tio estas la plej forta kaj plej granda partia gvidado. La tiel nomata "partia gvidado" de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon signifas, ke tiuj estu ili, kiuj faras ordonojn kaj komandojn. Tio estas absolute nepermesebla! La granda proleta kultura revolucio ĝuste celas deoficigi ilin, depreni ilian potencon kaj faligi ilian "gvidadon".

La granda proleta kultura revolucio pruvas, ke la vastaj amasoj de la membroj de nia partio estas bonaj aŭ kompare bonaj. Da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj enŝteliĝis en la Partion, estas nur plenmano. La vastaj amasoj de la partiaj membroj decideme aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, staras ĉe la flanko de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj batalas kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Tio estas la ĉefa fluo kaj la plej fundamenta fakto.

En celebrado al la 46-a datreveno de la fondiĝo de la Partio, la tuta Partio kaj la tutlanda popolo devas varme respondi al la alvoko de kamarado Lin Biaŭ, la intima batalamiko de Prezidanto Maŭ, kaj levi novan altan tajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Kamarado Lin Biaŭ plej alte tenas la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, plej bone studas kaj plej bone aplikas la verkojn de Prezidanto Maŭ. De dekoj da jaroj, kamarado Lin Biaŭ ĉiam plej fidele, plej firme kaj plej komplete efektivigas la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ. La metodo elmetita de kamarado Lin Biaŭ studi la verkojn de Prezidanto Maŭ kun deman-

doj, studi kaj apliki ilin kreive, kombini studon kun apliko, studi unue kion oni urĝe bezonas por rikolti tuj rezultojn, kaj peni plej energie en aplikado de ĉio studita estas pruvita efika kaj universale aplikebla kaj devas esti plie disvastigata tra la tuta lando. En la flamanta fajro de la granda proleta kultura revolucio, ĉiu kompartiano devas remuldi sin per la penso de Maŭ Zedong, energie rompi la burĝan mondkoncepton kaj starigi la proletan mondkoncepton, energie detrui egoismon kaj starigi kolektivismon kaj starigi en sia menso la absolutan aŭtoritatecon de la penso de Maŭ Zedong. Ni devas decideme plenumi kaj efektivigi ĉion, kio konformas al la penso de Maŭ Zedong, kaj decideme bojkoti kaj oponi ĉion, kio devias de la penso de Maŭ Zedong, kaj forĵeti kaj frakasi komplete la bienulan kaj burĝan sklavismon distrumpetitan de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Proletaj revoluciuloj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la Partio, devas elmeti al si severajn postulojn, preni la penson de Maŭ Zedong kiel sian orientilon en ĉiu okazo, senĉese remuldi sian ideologion, konstante fari progreson kaj strebi al aliĝo al la vicaro de la Komunista Partio de Ĉinio gvidata de Prezidanto Maŭ.

En celebrado al la 46-a datreveno de la fondiĝo de la Partio, ĉiu membro de la Partio devas pli bone kompreni kaj posedi la teoriojn kaj politikojn elmetitajn de Prezidanto Maŭ rilate al la granda proleta kultura revolucio, modeste lerni de la amasoj, intime ligiĝi kun ili kaj konduki kune kun ili la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino. Estas necese firme teni la ĝeneralan direkton de la batalo, ĝisfunde kritiki la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, elimini ilian venenan influon sur ĉiuj frontoj; estas necese aktive akceli la grandan unuiĝon de la proletaj revoluciuloj kaj la revolucian "triflankan kombiniĝon", bone plenumi la taskojn de batalo, kritiko kaj reformo en la propra institucio; estas necese observi la proletan revolucian disciplinon kaj serioze efektivigi la principon **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton".** En ĉiuj ĉi tiuj flankoj, la membroj de la Partio devas ludi la rolon de pioniro kaj starigi ekzemplojn. Partianoj, kiuj estas trompitaj de la burĝa reakcia linio kaj venenitaj de la libro *Memkulturo* kaj aliĝis al konservativaj organizoj, devas rapide reveni al la flanko de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĉerpi lecionon el tio kaj klopodi fariĝi kompartianoj indaj je la nomo.

En celebrado al la 46-a datreveno de la fondiĝo de la Partio, ĉiu membro de la Partio devas gravuri la instruojn de Prezidanto Maŭ en sian kapon, ĉiam teni la stilon de simplega vivo kaj energia penado de la Partio kaj singardi kontraŭ la atakoj de la sukertegitaj obusoj de la burĝaro. Inter la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon senmaskigitaj en la granda kultura revolucio, troviĝas iuj, kiuj degeneris ĝuste pro tio, ke ili ne povis rezisti la korodon de la burĝa ideologio. La renversiĝo de l' ĉaro antaŭa estas averto por la ĉaroj postaj. Precipe tiuj membroj de la Partio, kiuj prenis sur sin la gvidan laboron en revoluciaj komitatoj de diversaj niveloj kaj en revoluciaj amasaj organizoj, nepre devas vigligi sian singardemon, ĉar post enpotenciĝo ilia pozicio ŝanĝiĝis, kaj ili estas elmetitaj al nova rigora provado kaj konstanta atakado de la sukertegitaj obusoj de la burĝa ideologio.

Ni sentas senkomparan fieron pro tio, ke ni havas la plej grandan kaj genian gvidanton kia Prezidanto Maŭ. Kamarado Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto de nuna epoko. De 46 jaroj li gvidas nian partion venki malamikojn kaj eviti rifojn unun post la alia, kaj li konstruis nian partion en tute maturan marksism-leninisman partion. Tio estas la plej alta honoro por la tuta Partio kaj la plej granda feliĉo por la tuta Partio kaj la tutlanda popolo, ke nia partio havas tian grandan gvidanton kia Prezidanto Maŭ. Ni sentas senkomparan fieron pro tio, ke ni estas membroj de la granda Komunista Partio de Ĉinio. Ĉiu membro de la Partio devas laŭvalore gardi tiun ĉi honoran titolon, ne vanigi la esperojn, kiujn Prezidanto Maŭ metis sur nin, fari novajn kontribuojn al la popolo, kaj fariĝi vera kompartiano.

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Vivu la granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!

La Proletaro Nepre Devas Firme Teni la Pafilon

— Memore al la 40-a Datreveno de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo

LA 1-a de aŭgusto en la kuranta jaro estis la 40-a datreveno de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo. En la bonega situacio de sukcesa antaŭenpuŝiĝo de la granda proleta kultura revolucio, la ĉina popolo celebris kun fiero la naskiĝtagon de sia armeo kaj rememoris la gloran historion de batalado kaj venkado de la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo.

La Ĉina Popola Liberiga Armeo estas granda armeo persone fondita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj rekte komandata de kamarado Lin Biaŭ; ĝi estas senkompara en la mondo kaj plej potenca revolucia armeo armita per la penso de Maŭ Zedong kaj vere tenata en la manoj de la popolo.

Dum 40 jaroj sub la gvido de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ, la Ĉina Popola Liberiga Armeo kreskis de malgranda al granda, de malforta al potenca, kaj tra peniga batalado kaj heroa vivoferado, frakasis kvin grandskalajn "sieĝekstermojn" fare de la Ĉiang Kajŝek-a reakciularo, sukcese kondukis la mondfaman Longan Marŝon de 25,000 lioj, venkis la arogantajn japanajn agresantojn, ekstermis la okmilionan reakcian armeon de Kuomintango armitan de la usona imperiismo, kaj en la milito kontraŭ la usona agreso kaj por helpo al Koreio, batalis kune kun la korea popolo kaj venkis la agresan armeon el trupoj de 16 landoj kunmetitan de la plej besteca usona imperiismo, faris glorajn kontribuojn en militoj por la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo. La granda Ĉina Popola Liberiga Armeo estas bela revolucia floro, kreskigita de irigaciado per la varma sango de sennombraj revoluciaj martiroj; ĝi estas fiero kaj honoro de la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo. Ĝi estas ne nur bazoŝtono por la proleta diktaturo de nia lando, sed ankaŭ forta kaj firma subtenanto de la revolucia batalo de la tutmondaj popoloj.

En aŭgusto de 1927, sub la direkto de la penso de Maŭ Zedong, la Nanĉanga Leviĝo de 1-a Aŭgusto pafis la unuan salvon kontraŭ la kuomintanga reakciularo, post la kompleta perfido de Kuomintango al la revolucio kaj sub la kondiĉoj de la venko de la ĝusta linio reprezentata de Prezidanto Maŭ super la dekstra oportunisma linio de Ĉen Duhiu. En septembro, surbaze de la kamparana movado en Hunan-provinco, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone gvidis kamparanojn fari ribelon, lanĉis la Aŭtunrikoltan Leviĝon kun granda historia signifo kaj fondis la bazlokon sur Ginggang-montaro. Kaj per tio la ĉina popolo komencis armitan batalon sub la gvido de ĝusta linio kaj ekhavis popolan armeon de tute nova tipo.

La Aŭtunrikolta Leviĝo kaj la granda militiro al Ginggang-montaro havas epokfaran signifon en la ĉina revolucia historio kaj la historio de konstruo de nia armeo. Per tio malfermiĝis la revolucia vojo por la proleta avangardo profundiĝi en la kamparon, gvidi la kamparanojn en konduko de armita batalo, fondi bazlokojn en la kamparo, sieĝi la urbojn per la kamparo kaj kapti la regpotencon tra la tuta lando.

La brila penso de Prezidanto Maŭ pri sieĝo de la urboj per la kamparo kaj armita kapto de la regpotenco estas genia disvolvo

de marksism-leninismo. Ĝi ne nur malfermis la unike ĝustan vojon por gajni tutlandan venkon por la ĉina popolo, sed ankaŭ montris al la proletaro kaj la subpremataj popoloj de la tuta mondo la larĝan ŝoseon por batalakiri veran liberiĝon.

Prezidanto Maŭ diris: **"Armeo estas la ĉefa konsistiganta parto de ŝtata potenco. Kiu volas kapti la ŝtatan potencon kaj teni ĝin, tiu devas havi fortan armeon."** La ekspluatanta klaso ĉiam sin apogas sur perforto por tenadi sian regadon kaj kruele ekspluati kaj prirabi la popolon. Kiam la ekspluatata klaso provas iom rezisti, ĝi tuj ricevas sangan subpremon fare de la reakcia armeo. Ĉar la reakciuloj tenas en siaj manoj glavojn, do ankaŭ la revolucia popolo nepre devas preni glavojn. La plej alta formo de klasbatalo estas milito. Ne ekprenante pafilojn, ne oponante la kontraŭrevolucian armon per revolucia armo, la popolo ne povas liberiĝi. Sen popola armeo, ĉiuj rezistoj de la popolo ne havas esperon de venko. Eĉ se foje certaj sukcesoj estas akiritaj provizore, ili ĉiuj tamen disŝaŭmiĝos, kiam la malamiko nur komencos armitan subpremon.

La plej granda krimo de la reviziistoj estas ĝuste tio, ke ili oponas, ke la popolo faru armitan batalon kaj ke la proletaro tenu pafilojn. Kiel la malnovaj reviziistoj Bernstein kaj Kautsky, tiel same agas la modernaj reviziistoj Ĥruŝĉov, Thorez, Togliatti, Dange kaj Namboodiripad kaj similaj.

La plej granda ĉina enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kiel ĉiuj kontraŭrevoluciaj reviziistoj, ĉiam oponas armitan batalon, pledas por la parlamenta vojo kaj energie aktivas por kapitulacismo. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, li senhonte laŭdis Ĉiang Kajŝek kiel "la revolucian standardon" kaj pledis por transdono de la popola armeo al la "nacia registaro" de Ĉiang Kajŝek, por ke tiu ĉi ĝin "gvidu". Post la venko de la Rezistmilito, li publike pledis por transdono de la popola armeo al la kuomintanga reakciularo.

Prezidanto Maŭ ĝisfunde kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de forlaso de la popola armeo kaj armita batalo. Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo persistis en la vojo de armita batalo, akiris la venkon de la demokratia revolucio kaj fondis la grandan ŝtaton de la proleta diktaturo.

En la longdaŭra revolucia milito, Prezidanto Maŭ kreis la plej kompletan, plej sciencan kaj plej grandan teorion pri milito. En la rezolucio de la Gutian-a Konferenco kaj serio da aliaj militaj verkoj, Prezidanto Maŭ ellaboris vere proletan militan linion. Tio ĉi estas la plej alta montpinto de marksismleninisma milita penso. Tio ĉi estas la plej potenca armilo de la revoluciaj popoloj de la mondo por venki imperiismon kaj ĉiujn klasajn malamikojn.

Prezidanto Maŭ diris: **"Nur per pafiloj la tuta mondo povas esti transformita."** Tio ĉi estas resumo de la sperto gajnita de la proletaro de Ĉinio kaj la mondo per sia sango. Tio ĉi estas universala vero de marksismleninismo. Tiu ĉi vero estas ĉiutage pli bone mastrata de la proletaro kaj la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo. La revoluciaj popoloj en multaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko nun leviĝas kaj forpelas oportunismajn gvidantojn. Ili kuraĝe levas pafilojn, fondas popolajn armeojn, kondukas armitajn batalojn, ribelegas kontraŭ imperiismo estrata de Usono kaj ĉiuj reakciuloj kaj kontraŭ la moderna reviziismo kun la gvidanta kliko de la Sovetunia Kompartio kiel la centro, kaj kondukas grandan heroan kaj obstinan batalon kontraŭ la malnova mondo.

Dum la tuta periodo de socialismo, klasbatalo koncentre manifestiĝas en la batalo inter la burĝaro por sia restariĝo kaj la proletaro kontraŭ ties restariĝo. Por efektivigi restaŭron, la burĝaro certe klopodas kapti la armeon kaj la pafilojn. Por firmigi sian proletan diktaturon kaj frakasi la konspiron de la burĝaro por restariĝo, ankaŭ la proletaro devas firme teni la pafilojn kaj firme teni la armeon. Por tre longa periodo post kapto de ŝtatpotenco, la proletaro ankoraŭ alfrontas la danĝeron perdi la ŝtatpotencon; simile, post fondo de la armeo, ĝi ankoraŭ alfrontas la danĝeron perdi la armeon. Se la armeo estas perdita kaj ĝia gvidanteco estas uzurpita de malbonaj elementoj, do ĉio batalakirita de

la proletaro kaj la laboranta popolo tute perdiĝos. Ja serioza leciono estas la uzurpo de la armea gvidanteco kaj la kontraŭrevolucia ŝtatrenverso en Sovetunio faritaj de la reviziisma kliko de Ĥruŝĉov.

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas la ĉefa reprezentanto de la fortoj por restarigo de kapitalismo. Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking estis liaj agentoj en la armeo. Peng Dehuaj estas granda konspirulo, granda karieristo kaj granda militaristo. En la pasintaj dekoj da jaroj, li ĉiam staris sur la reakcia pozicio de la burĝaro kaj oponis Prezidanton Maŭ. En la pasintaj bataloj inter la du linioj, li senescepte staris sur la flanko de oportunismo kaj oponis la ĝustan linion de Prezidanto Maŭ. En 1953, li, Gaŭ Gang kaj Ĵaŭ Ŝuŝi kune formis kontraŭpartian Peng-Gaŭ-Ĵaŭ-aliancon. En 1959, li estis la ĉefo de la kontraŭpartia kliko malkaŝita ĉe la Luŝan-a Konferenco de la Partio. Ankaŭ Luo Ĵujking estas burĝa konspirulo kaj karieristo. Tiel frue kiel en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito li jam agis en koluzio kun Peng Dehuaj kaj Peng Ĝen en opono kontraŭ Prezidanto Maŭ, obstine plenumis la kapitulacisman linion de Vang Ming kaj senhonte laŭdis la komunan malamikon de la popolo Ĉiang Kajŝek kiel la "plej altan ĉefkomandanton" en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Post la venko tra la tuta lando, ili pliintimigis sian koluzian interrilaton en plenenergia klopodo por kapti la pafilojn kaj antaŭenpuŝis burĝan linion en militaj aferoj kun la vana intenco fari la popolan armeon instrumento por kontraŭrevolucia restaŭro.

La penso de Maŭ Zedong estas la animo de nia armeo, ĝia ĉiamvenka kompaso kaj fundamenta garantio pri tio, ke nia armeo neniam ŝanĝos sian naturon. Por ŝanĝi la proletan naturon de nia armeo kaj uzurpi ĝian gvidantecon, Peng Dehuaj, Luo Ĵujking k. s. unue direktis sian lancpinton kontraŭ la penso de Maŭ Zedong. En sia malica atakado Peng Dehuaj diris, ke "la verkoj de Prezidanto Maŭ povas servi nur kiel referenco sed ne gvidilo en direktado de militado kaj en trejnado de trupoj". Luo Ĵujking deliris, ke rigardi la vortojn de Prezidanto Maŭ kiel la plej altan instrukcion "ne konformas al la reĝimo de nia ŝtato". Li ankaŭ senskrupule kolportis la *Memkulturon* de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, distrumpetante ke tiu ĉi libro estas "kombino de marksism-leninismo kun la praktiko de la ĉina revolucio", kaj postulis ke la kadroj kaj batalantoj de la tuta armeo "bone ĝin studu".

La sinteno al la penso de Maŭ Zedong estas akvodivida montkresto inter marksism-leninismo kaj kontraŭrevolucia reviziismo. Ĉiuj venkoj de nia partio kaj nia armeo estas grandaj venkoj de la penso de Maŭ Zedong. La 40-jara sperto de nia armeo montris al ni, ke oni nepre faros erarojn kaj suferos repuŝiĝojn kaj fiaskojn, se oni devios de la gvido de la penso de Maŭ Zedong. La armeo estas klasbatala instrumento. Se ĝi ne akceptas la gvidon de la penso de la proletaro, do ĝi estos gvidata de la penso de la burĝaro. Peng Dehuaj, Luo Ĵujking kaj similaj plenenergie oponis la penson de Maŭ Zedong ĝuste pro tio, ke ili volas gvidi nian armeon per la burĝa penso kaj la reviziisma *Memkulturo* kaj ŝanĝi nian armeon en armeon burĝan.

Por ŝanĝi la proletan naturon de nia armeo kaj uzurpi la gvidantecon de la armeo, Peng Dehuaj, Luo Ĵujking kaj aliaj kontraŭrevoluciaj reviziistoj plenenergie oponis kontraŭ elstarigo de proleta politiko kaj kolportis kolekton da reviziismaj varoj enportitaj el eksterlando, kaj plene sin dediĉis al burĝa regulecigo kaj opono kontraŭ la proleta revoluciigo. Ili metis militan teknikon en la unuan lokon kaj neigis, ke politik-ideologia laboro estas la plej grava faktoro en determino de batalforto. Peng Dehuaj diris adsurde, ke "la fundamenta kriterio en determino de la batalforto de nia armeo estos de nun la grado de atingo de la trupoj en milita trejnado kaj la grado de atingo de la diversrangaj kadroj en lernado de milita scienco". Per "granda konkurso de batalteknikо" Luo Ĵujking forpuŝis politikon kaj dissemis serion da absurdaj eklektikismaj t. e. oportunismaj argumentoj por oponi la direktivon de kamarado Lin Biaŭ pri elstarigo de politiko kaj la kvar unua-oj.[1]

Ke milita tekniko estas la fundamenta kriterio por determini la batalforton de iu armeo estas de la kapo ĝis la piedoj burĝa vidpunkto pri militaj aferoj. En kio kuŝas

la plej granda batalforto de nia armeo? Ĉu en aviadiloj, kanonoj aŭ atombomboj? Ne, tute ne. La plej granda batalforto de nia armeo kuŝas en la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, en la revoluciaj batalantoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj havantaj altan politikan konscion. Oponi elstarigon de proleta politiko kaj meti militan teknikon sur la unuan lokon ja signifas elstarigon de burĝa politiko. Fakte, Peng Dehuaj, Luo Ĵujking k. s. ĉiam oponis proletan politikon kaj elstarigis reakcian burĝan politikon. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Peng Dehuaj jam senbride predikadis pri la burĝa reakcia politika vidpunkto de "libero, egaleco kaj homaramo". En sia verko *Politika Laboro en la Kontraŭjapanaj Armeoj* Luo Ĵujking tute ne parolas pri klasbatalo kaj la kapto de ŝtatpotenco fare de la proletaro, sed filece sintenante al la malamiko de la popolo, li eĉ prenis la vortojn de Ĉiang Kajŝek pri "saĝeco, humaneco, braveco" kaj "lojaleco kaj bonkoreco" kiel la fundamentan enhavon por la politika laboro en la armeoj. Tio, kion li kaj similaj distrumpetis, estis nenio alia ol la reakcia politiko de Kuomintango.

Subtenate de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking kulturis siajn privatajn fortojn en la armeo, starigis sian personan prestiĝon, varbis transkurintojn kaj akceptis perfidulojn, formis sektojn por ĉasi privatajn profitojn, tenis kontraŭleĝajn rilatojn kun fremdlandoj kaj konspiris uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la armeo. Peng Dehuaj kolektis plenmanon da demonoj kaj diabloj, nome malamika-klasaj elementoj, spekulistoj, kontraŭrevoluciuloj, neremulditaj malnovaj oficiroj, kiuj enŝteliĝis en la Partion, kaj formis kontraŭpartian klikon kaj kontraŭrevolucian "militan klubon". Luo Ĵujking formis kontraŭpartian konspiran klikon en koluzio kun aliaj kontraŭrevoluciuloj inkluzive de Peng Ĝen, Lu Dingji kaj Jang Ŝangkun. Koruptante per promocioj kaj promesoj pri favordono, ili kolektis ĉirkaŭ si unujn por depuŝi aliajn. Ili faris ĉiajn eblajn malbonojn. Plenenergie ili klopodis starigi reakcian burĝan sendependan reĝlandon interne de la armeo. Tiu plenmano da personoj kovis ĉian intrigon kaj faris sian plejeblon por oponi nian grandan gvidanton kaj grandan ĉefkomandanton Prezidanto Maŭ kaj kamaradon Lin Biaŭ, kiu ĉiam alte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong.

Unuvorte, la enarmeaj agentoj de la ĉina Ĥruŝĉov Peng Dehuaj, Luo Ĵujking kaj similaj klopodis plenenergie por reformi nian armeon kaj uzurpi ĝian gvidantecon per kolekto da varoj de kontraŭrevolucia reviziismo kaj la burĝaro. Se ili atingus la celon de sia intrigo kaj kaptus la pafilojn en siajn manojn, ŝanĝiĝus la koloro de nia ŝtato, pereus nia partio, nia lando kaj niaj vivoj.

Kamarado Lin Biaŭ faris ekstreme elstaran kontribuon en la batalo por konstrui nian armeon en revolucian armeon eksterordinare proletecan kaj eksterordinare bataleman kaj en la batalo kontraŭ la konspirado uzurpi la gvidantecon de la armeo fare de la burĝaj reprezentantoj Peng Dehuaj, Luo Ĵujking k. s.

Kamarado Lin Biaŭ estas la plej intima batalamiko kaj plej bona lernanto de Prezidanto Maŭ. Kamarado Lin Biaŭ studas kaj aplikas la verkojn de Prezidanto Maŭ plej bone kaj lia kompreno pri la penso de Maŭ Zedong estas plej profunda. De la pasintaj dekoj da jaroj, li ĉiam plej fidele, plej firme kaj plej ĝisfunde plenumas kaj defendas la proletan revolucian linion kaj ideojn de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj. En ĉiu batalo inter la du linioj, li senescepte staris klare kaj firme ĉe la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ. En siaj verkoj, kiaj *Marŝu Antaŭen per Grandaj Paŝoj Alte Tenante la Ruĝajn Standardojn de la Ĝenerala Linio de la Partio kaj de la Ideoj de Maŭ Zedong pri Militaj Aferoj* kaj *Vivu la Venko de Popola Milito*, kaj en serio da paroladoj, kamarado Lin Biaŭ sisteme klarigis kaj kreive elvolvis la ideojn de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj.

De post kiam kamarado Lin Biaŭ prenis sur sin la respondecon pri la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de la Partio, li kreive elmetis la ideon de "kvar unua-oj" kaj alvokis por forte disvolvi la "triok"-stilon,[2] "la tri grandajn demokratiojn"[3] kaj la kampanjon por "rotoj kun kvar bonoj"[4]. La "Rezolucio pri Plifortigo de la Politik-ideologia Laboro en la Armeo", ellaborita

kaj alprenita de la plivastigita kunsido de la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK en 1960 laŭ la ideoj de kamarado Lin Biaŭ, heredis kaj disvolvis la tradicion de la Gutian-a Konferenco. Kamarado Lin Biaŭ faris la grandan alvokon al ĉiuj komandantoj kaj batalantoj "Studu la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn instruojn, agu laŭ liaj instrukcioj kaj estu liaj bonaj batalantoj"; la elmetitaj de li principo kaj metodo de studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ studi kun demandoj, studi kaj apliki ilin kreive, kombini studon kun apliko, studi unue kion oni urĝe bezonas por rikolti tuj rezultojn kaj peni plej energie pri aplikado de ĉio studita, donis fortegan stimulon al la tuta armeo kaj la tuta popolo en mastrado de la penso de Maŭ Zedong kaj al ilia ideologia revoluciigo. La serio da gravaj paŝoj proponitaj de kamarado Lin Biaŭ por konservi la proletan naturon de nia armeo levis la konstruadon de nia armeo al nova etapo.

Prezidanto Maŭ montris: **"La kvar unua-oj estas bonaj; tio ĉi estas invento. De kiam kamarado Lin Biaŭ elmetis la kvar unua-ojn kaj la 'tri-ok'-stilon, la ideologi-politika laboro kaj la milita laboro de la Liberiga Armeo tre multe disvolviĝis, kaj fariĝis pli konkretaj kaj samtempe leviĝis al pli alta teoria nivelo ol en la pasinteco."**

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj metante proletan politikon sur elstaran lokon, kamarado Lin Biaŭ ĝisfunde malkaŝis kaj kritikis la burĝajn ideojn de Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking pri militaj aferoj kaj firme batalis kontraŭ ilia komploto uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la armeo. Por preventi restaŭron de kapitalismo, kamarado Lin Biaŭ donis apartan emfazon pri la grava signifo de ideologia batalo kaj la tenado de la armeo en la manoj de la proletaro. Li montris: "La plumo kaj la pafilo — jen la du iloj, sur kiuj oni devas sin apogi por kapti regpotencon." "En ŝtatrenversaj aktivadoj, ankaŭ la burĝaro donas la unuan lokon al ideologio por konfuzi unue la homojn ideologie. Alia paŝo estas akiri armeon, kapti la pafilojn. Kunordigante la kulturan kaj militan fronton, ili klopodas teni por si la publikan opinion kaj ankaŭ kapti la pafilojn, kaj per tio ili povas lanĉi kontraŭrevolucian ŝtatrenverson." Tio ĉi estas tre grava tezo. En la granda proleta kultura revolucio, ni nepre malkaŝos la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj ilin faligos kaj senkreditigos en politiko kaj ideologio.

En la granda proleta kultura revolucio, la vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj de la Liberiga Armeo, senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj al la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj plenaj de entuziasmo, tutkore kaj plenanime faras la laboron de subteno al la vastaj amasoj de maldekstruloj, al industrio kaj al agrikulturo kaj la laboron de milita kontrolado kaj milit-politika trejnado. Ili faris novajn grandajn kontribuojn al la popolo.

La Popola Liberiga Armeo kaj la vastaj revoluciaj amasoj devas aktive respondi al la batala alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **subteni la armeon kaj ami la popolon.** La plia plifortigo de la unuiĝo inter la armeo kaj la popolo sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong estas grava garantio por la ĝisfunda venko de la granda proleta kultura revolucio.

Vivu la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo!

Vivu la venko de la granda proleta kultura revolucio!

Vivu la granda Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Vivu nia granda gvidanto kaj granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ!

---

1. La kvar unua-oj: La faktoro de homo estu en la unua loko, la politika laboro estu en la unua loko, la ideologia laboro estu en la unua loko kaj la vivaj pensoj estu en la unua loko.

2. La "tri-ok"-stilo: Prezidanto Maŭ resumis la bonan stilon de la Ĉina Popola Liberiga Armeo per tri punktoj kaj ok ideografiaĵoj, kaj kutime oni ĝin nomas mallonge la "tri-ok"-stilo. La tri punktoj estas: firma kaj korekta politika direkto, penema kaj modesta laborstilo kaj elaste flekseblaj strategio kaj taktikoj. La ok ideografiaĵoj signifas: unuiĝo, strečiteco, seriozeco kaj vigleco.

3. La tri grandaj demokratioj: La Ĉina Popola Liberiga Armeo efektivigas interne de la armeo politikan demokration, ekonomian demokration kaj militan demokration, kaj realigas, pere de demokratia movado sub la gvido de koncentro, la tri grandajn celojn: altgradan unuiĝon en politiko, plibonigon de ĉiutaga vivo kaj plialtigon de tekniko kaj taktiko en militaj aferoj.

4. Kvar bonoj: Bono en politika kaj ideologia laboro, bono en "tri-ok"-stilo, bono en milita trejnado kaj bono en prizorgo de ĉiutaga vivo.



Eldoniĝis la Albumo "Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro"

POR kontentigi la ardan deziron de la revoluciaj popoloj de la tuta Ĉinio kaj la ceteraj landoj, kiuj tage kaj nokte sopiradas vidi la kreinton kaj fleganton de la Komunista Partio de Ĉinio, nian plej estimatan kaj amatan grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, finpresiĝis unuafoje en nia lando glimbrila albumo *Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro*, je la 1-a de julio, kiam nia tuta lando ĝoje celebris la brilan feston de la 46-a datreveno de la naskiĝo de la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio. Kaj tiu albumo komencis disvendiĝi tiutage en Pekino.

La albumo enhavas fotojn montritajn en la ekspozicio en Pekino kun la sama titolo "Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro". Ĝi estas preparita kaj finpresita de la revoluciaj laborantoj kaj laboristoj de la Asocio de Ĉinaj Revoluciaj Fotografoj, la Popola Belarta Eldonejo kaj la preseja rondo en la mallonga tempo de nur kvardek kelkaj tagoj. Ĝi fidele registris la grandan praktikon de Prezidanto Maŭ, la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko, kiu vivas en komuna spiro kaj dividas la saman sorton kun la proletaj revoluciuloj kaj tutkore kaj plenanime subtenas la revolucian amasan movadon en la senprecedenca granda proleta kultura revolucio iniciatita kaj gvidata de li mem. Same kiel la samtitola ekspozicio, ĝi estas brila epopeo pri la granda proleta kultura revolucio de nia lando kaj sublima himno al la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La albumo *Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro*, bindita aŭ broŝurigita, kun la formato 23 x 26 cm., enhavas 50 fotojn en nigro kaj blanko kaj 10 fotojn en koloroj. La kovrilo surhavas bildon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, vigle kaj ridetante mansvinganta al la revoluciaj amasoj dum revuado de la granda armeo de kultura revolucio. Sub tiu bildo brilas la oraj vortoj "Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro". Sur la frontispico presiĝis manskribaĵo de kamarado Lin Biaŭ, la intima batalamiko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: "Vivu, vivu, longe vivu nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!"



Batalantoj de la albana popola armeo lernas verkon de Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ, la Tutmonda Popolo Amas Vin!

Isabel Centellas, amiko el Peruo, diris: "Mi opinias, ke Maŭ Zedong estas ne nur la plej granda gvidanto de la ĉina popolo, sed ankaŭ la plej granda gvidanto de la tutmonda popolo." Tiuj vortoj esprimas la elkoran senton de amo al Prezidanto Maŭ de la revoluciaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko! Maŭ Zedong — la Lenin de la nuna epoko! Maŭ Zedong — la neniam subironta ruĝa suno en la koro de la tutmonda popolo! Ĉie sur la terglobo estas aŭdeblaj tiuj vortoj en sama voĉo inter la revoluciaj popoloj.

BRODADO DE FLAGO POR PREZIDANTO MAŬ

En la komenco de la kuranta jaro niaj studentoj en Albanio estis revenontaj al la patrio por partopreni la grandan kulturan revolucion. Antaŭ la ekvojaĝo, la tuta studentaro decidis fari broditan flagon por la plej plej ruĝa suno en nia koro Prezidanto Maŭ kun dezirespriimo de senlime longa vivo al la granda gvidanto. Informiĝinte pri tio, laboristino de iu metia kooperativo de Albanio venis al la loĝejo de niaj studentoj por brodi la flagon kune kun la studentoj dum sia dimanĉa libertempo. Kiam la studentoj esprimis al ŝi dankon, ŝi emocie diris: "Tio ne estas helpo de mia flanko. Mi venas nur por enbrodi en la flagon la senliman amon al Prezidanto Maŭ de ni albana popolo por ke la flago transportu tion al Prezidanto Maŭ!" Ankaŭ multaj albanaj gestudentoj partoprenis la brodadon de la flago malgraŭ sia okupiteco en lernado. Iu

studentino brodis aparte zorge kaj atente. Ĉiujn nekontentige faritajn kudrerojn ŝi tuj malkudris por atingi plej bonan rezulton. Kiam aliaj demandis, kial ŝi brodis tiel atente, ŝi respondis: "Ĉar mi volas, ke ĉiu kudrero de la brodaĵo plej bone fiksu al la flago la amon al Prezidanto Maŭ de ni albana popolo." Fininte sian laboron de brodado, iu studento kun ĝojo diris: "Hodiaŭ estas por mi la plej feliĉa tago, ĉar mi brodis la flagon por Prezidanto Maŭ." Dum la brodado niaj studentoj diris al iu albana studento: "La de vi brodata parto de la ĉina ideografiaĵo 'Vi' en la frazo 'Senlime longan vivon al Vi'! per si mem signifas 'koron'." Aŭdinte tion li ruĝiĝis pro ĝojo kaj diris: "Ni ja ĝuste amas Prezidanton Maŭ el la tuta koro!"

PLEJ FELIĈA HOMO

Frumatene, kiam la Fremdlingva Librejo en Hanojo ankoraŭ ne malfermis sian pordon, antaŭ ĝi homoj jam staris en longa vico por aĉeti la trezoran libron. Iuj el ili estis laboristoj, kiuj ĵus finis sian noktan deĵoron kaj venis grupe al la librejo anstataŭ iri hejmen. Ĝia vendejo sur Trangtien strato elvendis en 2 horoj ĉirkaŭ mil ekzemplerojn de la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*.

Iu laboristo, kiu ĵus alvenis al Hanojo de Laŭkaj fore de centoj da kilometroj per trajno kaj informiĝis pri tio ke la Fremdlingva Librejo vendas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*, tuj rapidis tien por aĉeti ses ekzemplerojn. Li ĝoje diris al la apudestarantoj: "Nun mi estas la plej feliĉa homo. Reveninte al Laŭkaj mi disdonos la libron al miaj parencoj kaj amikoj kiel plej valoran donacon, por ke ili studu ĝin, armu per ĝi sian cerbon, intensigu la produktan laboron kaj ĝisfunde venku la usonajn agresantojn."

PENTRAĴOJ DE AFRIKA KNABO

Benatallah, 12-jara alĝeria knabo, kiu loĝas en iu oazo proksima al la urbeto Djelfa en la granda dezerto Saharo, sendis antaŭ nelonge al la ĉina ambasadorejo en Alĝerio unu leteron kaj ses pentraĵojn por esprimi sian senliman amon al Prezidanto Maŭ.

El la ses bildoj la unua estas profilo de Prezidanto Maŭ kun disradianta brilo. Sube estas skribite: "Prezidanto Maŭ! Vi estas neniam subironta suno!" Sur la dua estas portreto de Prezidanto Maŭ en armeana kostumo kun la skribo sube: "Vivu Prezidanto Maŭ Zedong! Senlime longan vivon al Prezidanto Maŭ Zedong!" Sur la tria estas

La vjetnama popolo, staranta sur la plejfronto de batalo kontraŭ la usona imperiismo, arde amas Prezidanton Maŭ. Jen popolano en Hanojo skribas "Vivu Prezidanto Maŭ" en la ĉina kaj vjetnama lingvoj.



Somaliaj gejunuloj fervore studas vortojn de Prezidanto Maŭ.





Maliaj laboristoj konkuras por ricevi portreton de Prezidanto Maŭ.

pentrita ore brilanta libro *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kun skribo "Vivu la penso de Maŭ Zedong!" La kvara montras la pordegon Tian-anmen kun flirtantaj ruĝaj flagoj. Estas klare videblaj la du grandegaj sloganoj en ĉinaj ideografiaĵoj: "Vivu la Ĉina Popola Respubliko!" kaj "Vivu la granda unuiĝo de la tutmonda popolo!" Sur la kvina bildo estas pentrita la emblemo de la Ĉina Popola Respubliko. La lasta montras al ni ĉifonan flagon de "steloj kaj strioj" de Usono. Sur la flago estas granda × kaj du pikantaj ponardoj. Sube estas la vortoj "For la usonan imperiismon!"

SENLIME LONGAN VIVON AL PREZIDANTO MAŬ

Iufoje, niaj studentoj en Kubo estis transloĝiĝantaj. Por ke la enkadrigita portreto de Prezidanto Maŭ ne difektiĝu, ili firme tenis la portreton en la sino. Vidinte tion, la kuba ŝoforo tuj varme transprenis ĝin kaj diris kun profunda amo: "Prezidanto Maŭ estas gvidanto ne nur via, sed ankaŭ de la tutmondaj revoluciaj popoloj!" Li respekte metis la portreton en sian stirejon kaj diris: "Bone! Jen, mi povas vidi Prezidanton Maŭ dum stirado!"

Iun tagon, kelkaj niaj studentoj iris sur strato. Aŭto kuris preter ili. Vidinte ke la studentoj portas sur siaj brustoj ore brilantajn insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ, la laboristoj sur la aŭto tuj petis haltigi la aŭton. Sed la ŝoforo ne aŭdis. Kaj la laboristoj spite al danĝero saltis de sur la aŭto kaj venis al niaj studentoj. Komprenante la intencon de la laboristoj, la studentoj donacis al ili siajn insignojn. La laboristoj tuj alte levis la insignojn kaj poste fiksis ilin dece sur siajn ĉapojn. Pli poste, kiam tiuj laboristoj eksciis ke niaj studentoj revenos al la patrio, ili venis adiaŭi la studentojn kun larme malsekaj okuloj. Ili esprimis al la studentoj sian varman amon al Prezidanto Maŭ kaj deziris senlime longan vivon al Prezidanto Maŭ!

"VIVU LENIN! VIVU MAŬ ZEDONG!"

Iun tagon, sur la internacia vagonaro al Pekino, iu sovetunia laboristo, kiu veturis al Ĉinio kiel turisto, ŝtele eniris en la ĉambron de ĉina vagonservanto kaj diris al li: "Mi elkore amas Lenin, Stalin kaj Prezidanton Maŭ. La nigraj manoj de Ĥruŝĉov k.s. ne povas kovri la brilon de la penso de Maŭ Zedong." Tion dirante li malfermis sian superveston kaj montris al la vagonservanto sian medalon de la Granda Patria Milito sur la ĉemizo. Li diris: "Ni ne forgesos nian gloran revolucian tradicion; iam estonte Sovetunio certe fariĝos tia kia nun estas Ĉinio!"

Alia amiko sovetunia, suriringe la vagonon, tuj pruntis de ĉina interpretisto *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*, eklegis ĝin sola enfermite kaj dum sep-ok horoj ne forlasis sian kupeon. Sciiĝinte, ke li ne manĝis, la vagonservanto alportis manĝon en lian kupeon. La sovetunia amiko firme prenis lian manon kaj kun emocio diris: "Ĉiam interligiĝas koro kun koro la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio!" Li levis la pugnon, kaj diris mallaŭte sed decide: "Vivu Lenin! Vivu Maŭ Zedong!"

Komplete kaj Senrezerve Respondeci al la Popolo

POSTTAGMEZE de la 26-a de junio, nigraj nuboj amasiĝis super Hajnan-insulo kaŭzante sufokan varmon. Kun vigla gardemo la aviadistoj de iu aera trupo de la mararmeo restis sur sia batalposteno. "Por servi al la popolo, ŝvitado estas nenio!" diris Vang Ĝuŝu, la vicestro de aviada brigado, deĵoranta batalprete. "La naturo agas laŭ sia humoro, kaj mi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ," diris Lju Giliang, aviadisto de la kolega aviadilo de la unua. "Komplete kaj senrezerve respondeci al la popolo" estis ilia komuna deziro.

Eksonis unuaklasa alarmo por batalo. La vestadon per kontraŭprema kostumo kaj flugkasko, almeton de pistolo ktp. Vang kaj Lju finis en palpebrumo. Tuj kiam leviĝis verda 'signalpafaĵo, paro da "arĝentaj hirundoj" sinpafis al la ĉielo kaj malaperis inter la nuboj, levante sin en altan spacon. Laŭ ordono de la komandejo, ili sin ĵetis en la direkto al la invadanta malamika aviadilo. En tiu ĉi momento, malbonega estis la vetero super Hajnan-insulo, kaj iuj el la nubamasoj estas kelkmil metrojn dikaj. Precipe, la pluvoportajn nubamasojn kun elektro la aviadiloj absolute ne povas enflugi ĉiuokaze. Kiom malfacila estis la tasko trovi la etan malamikan aviadilon en la tiel komplikita vasteco! Vang Ĝuŝu havis nur unu ideon: Mi devas respondeci al la popolo kaj ne lasi la invadantan aviadilon eskapi punon de la popolo. Pli granda malfacilo estis por Lju Giliang, kiu lin sekvis, ĉar Lju ankoraŭ ne havis la sperton flugi en tia densa vico tra nuboj. Kiam li firme stiris la aviadilon, li kuraĝigis sin per la instrukcio de Prezidanto Maŭ: **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon."** Tiel la du aviadistoj decidis sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ por kapti la flugantan piraton en la maro de nuboj. Post detala serĉado, Vang fine rimarkis inter du monto-similaj, nigraj nubmasivoj grizan makuleton en grandeco de muŝo. Li estis certa, ke tio estas aviadilo, kaj tuj raportis al la komandejo. En la sama tempo li direktis sian aviadilon post tiun trovitan aviadilon. Kiam li povis distingi la usonan piratan aviadilon, li tuj raportis al la komandejo: "Unu F-4C." Kaj revene la komandejo instrukciis: "Klopodu plenforte ekstermi nepre la malamikon". Vang rapide proksimiĝis kaj alkroĉiĝis al ĝi, ne lasante ĝin eĉ unu paŝon deflankiĝi. Mallongiĝis rapide la distanco, kaj la lumringo de la celilo jam ĝin encirkligis. Ĉu jam pafi? Ne! Vang ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Prefere rompi unu el liaj fingroj ol vundi ĉiujn dek."** Plenvapore li stiris la aviadilon antaŭen. La ombro en la lumringo fariĝis pli kaj pli granda. Tiam li ekpremis siajn dentojn kaj samtempe ankaŭ la elektran butonon. Sinsekvo da fajreruĝaj spurkugloj pafiĝis al la malantaŭa parto de la malamika aviadilo. Tuj leviĝis densa fumo de ĝia vosto. Tiutempe Vang Ĝuŝu jam forflugis de super ĝi. Al la komandejo li raportis: "La malamika aviadilo fumas!" "Persekutu!" estis la ordono de la komandejo. Tiutempe, Lju Giliang en la kolega aviadilo jam bone celis la malamikan aviadilon. Vidante ke la fumanta malamika aviadilo ankoraŭ ne falis, li solide regalis ĝin per alia serio de kugloj, tiel ke la korpo kaj vosto de la malamika aviadilo disiĝis en partoj kaj falis kun densa fumo.

Post la batalo, la kamaradoj are gratuladis Vang Ĝuŝu kaj Lju Giliang pro ilia sukceso en la unua batalo frakasi la piratan aviadilon de la usona imperiismo, kiu invadis nian teritorian aeron, kaj laŭdis ilian novan kontribuon al la defendado de la patrio kaj la granda proleta kultura revolucio.

Kiam oni petis ilin prezenti la sperton de tiu venka aerbatalo, ili diris nur: "Firme aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj komplete kaj senrezerve respondeci al la popolo estis la radika garantio de tiu venko."



Vang Ĝuŝu (la dua demaldekstre) kaj piloto Lju Giliang (la tria demaldekstre) interŝanĝas kun siaj batalkamaradoj sian sperton en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj resumas sian batalsperton.

La Armeo kaj la Popolo Interligiĝas Koro kun Koro

La revoluciaj amasoj kaj la multnombraj komandantoj kaj batalantoj de PLA en Vuhan-regiono varme respondas al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "la popolo subtenu sian armeon kaj la armeo amu sian popolon" kaj firme decidis bone unuiĝi kaj kune batali por faligi kaj senkreditigi la ĉinan Ĥruŝĉov senŝanceliĝe.



Revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Kvina Kingdaŭ-a Fabriko de Plastaĵoj donacas al la Popola Liberiga Armeo mozaikaĵon kun ĉinaj ideografiaĵoj "Vivu Prezidanto Maŭ", kiun ili aranĝis per insignoj kun portreto de Prezidanto Maŭ, de ili propramane faritaj.




Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "firme teni la revolucion kaj stimuli la produktadon", parto de la PLA-trupo garnizonanta en Ŝanhi-provinco aktive subtenas agrokulturon kaj helpis Daĝajbrigadon plenumi la unuastadian konstruan taskon de ĝia akvokonserva plano.





La Popola Liberiga Armeo kaj la revolucia popolamaso kunligiĝas ĉiam koro kun koro. Jen batalantoj de PLA subtenanta la maldekstrulojn en Kingdaŭ interŝanĝas sperton en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kun komunumanino-aktivulino en lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ.



La Popola Liberiga Armeo ofte sendas siajn anojn al milicaj taĉmentoj por ilin helpi en trejnado kaj plifortigi la kunan defendon fare de la armeo kaj la popolo.

JONG GIN:

Vej Ĝongji—Modela Popolamanto kaj Subtenanto de Maldekstruloj

APERIS alia heroo de la epoko de Maŭ Zedong sur la sudorienta mardefenda fronto de nia lando. Lia nomo estas Vej Ĝongji.

Li estis plotonestro de la Ĉina Popola Liberiga Armeo sur la fronto de Fugian-provinco. En subtenado al la maldekstruloj kaj milita trejnado, li glore oferis sian vivon por sekurigi la vivon de sia proleta revolucia batalamiko.

SINDEDIĈO AL LA REVOLUCIO

Estis la 23-a de majo. Sur Longhaj-ebenaĵo ĉe la mardefenda fronto en Fugian, la verda maro de rizplantoj promesis rikolton de granda abundeco.

Taĉmento da milicanoj, kiuj havis antaŭ si la ruĝan flagon de Milica Bataliono ĉe Administracio por Dragado de Giulong-rivero, marŝis brave al Ŝidoŭ-monto alte staranta ĉe la bordo de la Orienta Maro.

Inter ili estis la PLA-batalanto Vej Ĝongji.

Antaŭ kvin tagoj, li alvenis laŭ ordono al tiu ĉi organizo por plenumi la taskon de subteno al maldekstruloj kaj milita trejnado. Ekironte li esprimis sian decidemon al Hong Ŝaŭhu, estro de la partia grupo: "Estas inde eĉ oferi mian vivon por subteni proletajn revoluciajn batalamikojn kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino." Tial en mallonga tempo de kvin tagoj, li jam starigis profundan klasan amikecon kun la proletaj revoluciuloj. Kaj tiuj lernis de liaj modelaj agoj la bonajn tradiciojn de PLA pri alta tenado de la granda standardo de la penso de Maŭ Zedong, elstarigo de la politiko de la proletaro, kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ, persistado ĉe la principoj de la "kvar unua-oj" kaj disvolvo de la kondutstilo de "tri kaj ok" (tri ĉefaj reguloj de disciplino kaj ok punktoj de atentigo). En la granda proleta kultura revolucio, li firme tenis la ĉefan direkton de batalo. En trejnado de milicanoj ili firme tenis en la memoro la instruon de Prezidanto Maŭ **"el la pafilo venas ŝtatpotenco"**, kaj instigis la milicanojn sin ekzerci decideme kaj pene pri batalarto por defendi la marteritorion kaj la grandan proletan kulturan revolucion.

Tiun tagon, la objekto de trejnado estis ĵeto de grenado.

Kun profunda malamo kontraŭ la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek, la milicanoj, unu post alia, ĵetis grenadon al la difinita celo. En la trejnejo regis atmosfero de streĉa batalo.

Subite okazis io neatendita. La milicano nomata Ĉeng Guanda delasis la grenadon pro malatento dum forĵeto. Siblanta kun fumo, la grenado falis sur la teron je distanco de nur 1.7 metroj de la dekstra flanko de la ŝirmejo. Konfuzite, la sensperta milicano, kiu unuafoje faris tiun ekzercon, saltis el la ŝirmejo por kuri maldekstren al la montdeklivo, tiel ke lia tuta korpo estis metita en la efikan sferon de la grenado. En tiu ĉi kriza momento, Vej Ĝongji, tiu proleta revolucia batalanto, kaŭranta ĉe maldekstra flanko de la ŝirmejo kaj jam glate direktinta 38 milicanojn en ĵetado de grenado, senhezite elsaltis. Li rapide implikfaligis Ĉeng Guanda per brako kaj ŝirmis tiun ĉi per sia propra korpo. Jen jam eksplodis la grenado. La milicano estis savita dank' al Vej Ĝongji, kies korpo baris alflugantajn grenadfragmentojn. Sed Vej mem tuj svenis pro vundiĝoj ĉe la postkranio, nuko kaj dorso. Dum 58 horoj la hospitalo luktis por lin savi, sed ne sukcesis; li fine mortis glore pro tro seriozaj vundiĝoj. Per sia heroa ago, kamarado Vej Ĝongji plenumis la promeson kiun li faris dum li vivis: "Estas inde eĉ oferi mian vivon por subteni la proletajn revoluciulojn."

LIGIĜO KUN LA REVOLUCIA AMASO KORO KUN KORO

Ekde la disvolviĝo de la granda proleta kultura revolucio en nia lando, Vej Ĝongji agis laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: **"tutkore kaj tutanime servi al la popolo, neniam disiĝi de la amasoj."** En ĉiu momento lia koro batis samtakte kun tiuj de la revoluciaj amasoj, li amas kion ili amas kaj malamas kion ili malamas.

Kiam la junaj revoluciuloj ruĝaj gvardianoj de la ĉefurbo marŝis el siaj lernejoj al la socio kaj sur la stratojn por rompi la "kvar malnovaojn" de la ekspluataj klasoj, starigi la "kvar novaojn" de la proleta klaso kaj ribeli kontraŭ la malnova mondo, ĉiuj ĉi tiuj novaĵoj alportis al li grandan ĝojon. Precipe kiam venis la informo, ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ revuis la ruĝajn gvardianojn de la ĉefurbo en la 18-a de aŭgusto, lastjare, ekbolis la sango tra lia tuta korpo kaj li tuj iniciatis inter siaj batalamikoj por skribi leteron al la ruĝaj gvardianoj de Pekino en la nomo de la mardefendaj batalantoj. Li diris: "Prezidanto Maŭ ligiĝas kun la revoluciaj amasoj, koro kun koro, ankaŭ ni devas esti tiaj!" En la letero plena de revolucia pasio, la batalantoj de la tuta plotono skribis:

Batalu, karaj batalamikoj! Kvankam distanco de miloj da lioj kuŝas inter ni, tamen niaj koroj ligiĝas strikte kun la viaj, kaj ni firme subtenas vin kiel via potenca apogilo kaj ĉiam batalos kaj venkos kune kun vi...

Sur la koverto ili aldonis sonoran kaj fortan sloganon: "Vivu la proleta revolucia spirito de la ruĝaj gvardianoj!"

La koro de Vej Ĝongji jam flugis al Pekino, al la junaj ruĝaj gvardianoj... Noktiĝis kaj endormiĝis ĉiuj liaj batalamikoj. Sed li pro ekscitiĝo ne povis endormiĝi turniĝante tien reen en la lito. Li lumigis la elektran torĉon kaj skribis laŭdkanton pri la junaj revoluciuloj jene:

Jen ruĝa gvardiano, vere brave,
Li pensi, agi kaj ribeli ja kuraĝas;
Glavmonton kaj fajrmaron li ensturmas
Sentime kun ruĝa flago ĉe antaŭe!

Post nelonge, li informiĝis ke taĉmento de ruĝaj gvardianoj trapasos la ŝoseon antaŭ la kazerno. Tiam estis varmega somero; tuj li pretigis kun la batalamikoj multajn sitelojn da bolinta akvo kaj vektoportis ilin al vojrando por sensoifigi la junajn ruĝajn gvardianojn. Unu taso da malvarma bolinta akvo, unu letero aŭ unu poemo ja estis plena de revolucia pasio kiun Vej Ĝongji kaj liaj amikoj havis por subteni varme la novaĵon, ruĝan gvardion!

Post kiam la artikolo *Ĉu Patriotismo aŭ Naciperfidismo?* estis publikigita en la *Popola Ĵurnalo*, Vej Ĝongji preskaŭ eksplodis de indigno. En sia artikolo li skribis: "La radiko de la kaŭzo, kial la riĉuloj estis riĉaj kaj la malriĉuloj estis malriĉaj en la malnova socio, kuŝis ĝuste en ekspluatado. En la malnova socio, miaj plejaĝa kaj juna fratoj malsatmortis pro kruela ekspluatado de bienuloj. Ankoraŭ suferas de ekspluato vastaj laborantaj popoloj en la mondo. Tio estas fakto de ĉiuj videbla. Sed la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon miksis nigron kun blanko, kaj distordis historiajn faktojn vane provante restarigi kapitalismon. Li estas pseŭdorevoluciulo, kontraŭrevoluciulo kaj la Ĥruŝĉov de Ĉinio en la plena senco de tiuj vortoj." En plotona kunsido por ĵurnalo-legado, en kritika kunveno kaj dum helpado al la loka amaso por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, li uzis iliajn personajn travivaĵojn plenajn de sango kaj larmoj, historiajn faktojn de la hejmloko kaj la aktualajn farojn, furioze plenumitajn de klasaj

malamikoj por klasa restarigo en la vilaĝo, por plene refuti la "teorion pri laŭleĝeco de ekspluato" kaj "teorion pri estingiĝo de klasbatalo" kiujn pledis la plej granda potenctenanto iranta la kapitalisman vojon en Ĉinio.

En la kunveno por kritiki la kontraŭrevolucian kaj reviziisman nigran libron *Memkulturo*, li diris kun granda indigno: "Ĉi tiu nigra *Memkulturo* estas centpocenta venenega herbo kontraŭ la penso de Maŭ Zedong. Ĝi plene silentas pri klasbatalo, pri la fundamenta problemo de la revolucio kaj pri diktaturo de la proletaro, sed dissemas pure trompajn dirojn, kiaj memekzameno de la propraj kulpoj post fermita pordo, memflegado de virto kaj karaktero, kombino de individuaj interesoj kun tiuj de la kolektivo kaj filozofio de vivkonservo. Ni komunistoj kaj revoluciaj batalantoj absolute ne devas lasi nin esti trompitaj. Ni nepre devas preni la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, por ĝisfunde kritiki ilin kaj elimini iliajn venenajn influojn."

Ĉiu vorto kaj ĉiu frazo de Vej Ĝongji esprimis la firman decidon de la centmilionojn nombranta revolucia amaso ekstermi nepre ĉiujn malutilajn vermojn ĝisfunde, tute kaj komplete. Kvazaŭ kugloj de venĝo pafitaj al la brusto de la malamiko, ili verdiktis morton al la plenmano da potenctenantoj kiuj iras la kapitalisman vojon.

FIRMA SEKVADO DE LA VOJO MONTRITA DE PREZIDANTO MAŬ

Senlime fidela al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, Vej Ĝongji ligiĝas kun la revoluciaj amasoj koro kun koro. Kien li iras, tie li propagandas la penson de Maŭ Zedong. Li ĉiam prenis la laboron helpi al la amasoj mastri la penson de Maŭ Zedong kaj antaŭeniri laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kiel sian plej grandan kaj plej bazan taskon.

En decembro de la lasta jaro, Vej Ĝongji estis transpostenigita kune kun sia plotono al la insulo Humejĝoŭ malsupre de Giulong-rivero por plenumi la taskon fari kampojn per digo kaj defendi la teritorian maron kaj la grandan proletan kulturan revolucion.

En februaro ĉijare, en la decidiga momento, kiam tondris tamburo por printempa plugado, iuj komunumanoj el la tria produkta grupo de Ĵenhe-brigado de Zini-komunumo, Longhaj-gubernio, sur ĉi tiu malgranda insulo fariĝis malinklinaj al sia agrokultura produktado kaŭze de la ekonomiisma fivento kiun levis plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

Iun vesperon, Vej Ĝongji venis kun kelkaj batalantoj al la sidejo de la tria produkta grupo. Tie li vidis sur la muro okulfrapan liston de laborpoentoj, kiun li silente rigardis starante dum kelkaj minutoj. En la kapo li pripensis la jenan problemon: Kio komandas en tiu ĉi produkta grupo? Politiko aŭ laborpoento? Senprokraste li faris vastan kontakton kun la komunumanoj kaj rapide trovis ke ĉi tiu estas postiĝinta grupo, ĉe kiu la politika atmosfero estas maldensa, ke reduktiĝis ĝia produkta kvanto lastjare pro natura katastrofo, kaj ke nunjare sub la ekonomiisma vento levita de la enpartiaj potenctenantoj, iuj komunumanoj intencas forlasi la insulon por ĉasi profiton el persona kromokupo. Konsiderante tiun ĉi realan staton, li decidis armi la komunumanojn per la penso de Maŭ Zedong kaj kredis ke, se la komunumanoj nur posedos la penson de Maŭ Zedong, ili certe povos uzi ĝin kiel orientilon por ĉion komandi, movi kaj reformi, kaj ilia postiĝinteco povos esti tuj forskuita. Tial li asignis al tri batalantoj la taskon organiziĝi en propagandan grupon de la penso de Maŭ Zedong por helpi la komunumanojn studi verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj li mem iris fari ideologiajn laborojn al la funkciuloj de la produkta grupo kaj helpi al ili studi kaj apliki kreive verkojn de Prezidanto Maŭ.

Iun vesperon, li faris intiman konversacion kun Lian Jaĝi, ĵus elektita funkciulo de la produkta grupo, kiu ne havis sperton en gvida laboro kaj ĉiam estis kaptita de la sento de malkuraĝo, tuj kiam li renkontis malfacilon.

Eksciinte tion, Vej Ĝongji admonis lin kun zorgemo: "Maljuna Lian, ni malriĉaj kamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj komunistoj ne devas pensi nur pri niaj personaj gajnoj aŭ perdoj, forgesante la kolektivon kaj popolon." Li eksidis kaj malfermis la verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*, kaj ĝin legis kun eksplikadoj. Pri multo li parolis ĝis malfrua nokto: de Ĝang Side kaj Norman Bethune ĝis Lej Feng, Vang Gie kaj Giaŭ Julu; de Ginggang-monto, la lulilo de la ĉina revolucio, ĝis la revolucio de la mondo; de armita batalo ĝis la granda proleta kultura revolucio.

Post la aŭskultado ŝaŭmis al Lian Jaĝi la penso en la fundo de lia kapo. Li turniĝadis en la lito kaj ne povis endormiĝi. Pensante pri la instruo de Prezidanto Maŭ, la devo de komunisto kaj la komisio, kiun konfidis al li la klasaj fratoj, li leviĝis, eklumigis la lampon, malfermis la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj ripetade legis la tre gravan instruon: **"Kio estas laboro? Laboro estas batalo..."** Ju pli li legis, des pli

heliĝis lia koro, kaj li fine faris firman decidon aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, agi laŭ liaj instrukcioj kaj gvidi kuraĝe la produktajn laborojn de la printempa plugado.

Sub la helpado de batalantoj de la plotono, alta tajdo de studado de la verko de Prezidanto Maŭ leviĝis ankaŭ inter la anoj de la produkta grupo.

Armite per la penso de Maŭ Zedong, la komunumanoj kaj funkciuloj donis fortan rebaton al la nova kontraŭatako farita de la reakcia linio de la burĝaro en la formo de ekonomiismo, kaj defendis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ.

En tiu ĉi grava momento de ŝanĝiĝo, estis publikigita la *Letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio al la Malriĉaj Kamparanoj kaj Malsuperaj Mez-kamparanoj kaj Diversnivelaj Funkciuloj de la Kamparaj Popolaj Komunumoj de la Tuta Lando*. Profitante ĉi tiun bonan okazon, Vej Ĝongji plenforte propagandis ĝin, donante al la komunumanoj kaj funkciuloj pli grandan kuraĝigon.

"Prezidanto Maŭ ligiĝas kun ni malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj koro kun koro, kaj lia alvoko al ni **'teni la revolucion kaj stimuli la produkton'** estas la plej granda konfido al ni." Tiuj vortoj fariĝis por la anoj de la tria produkta grupo slogano de revolucia agado. La komunumanoj ekkomprenis ke oni devas sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ sinapogi sur la propraj fortoj kaj iri firme la vojon de socialismo.

INDA BATALANTO DE PREZIDANTO MAŬ

Senlime fidela al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, Vej Ĝongji kreive studis kaj kreive aplikis liajn verkojn kaj senĉese rompis sian egoisman penson starigante la kolektivisman. Ĝuste kiel li mem diris: "Se ni pasie amas Prezidanton Maŭ, ni devas studi centpocente la librojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti centpocente liajn vortojn, agi centpocente laŭ liaj instrukcioj kaj esti centpocente lia bona batalanto."

Vej Ĝongji naskiĝis en la familio de malriĉa kamparano en Fuking-gubernio, Fugian-provinco. En la jaro 1960, kiam li estis 18-jara, li aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Sub la forta influo de la densa politika atmosfero de kreiva studado kaj kreiva aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la trupo, li rigardis tiun studadon kiel nemalhaveblan gravan aferon en ĉiu tago. Li uzis kiel armilon la "tri malnovajn artikolojn" por konscie reformi siajn neproletajn pensojn. Sur la frontispico de tiu ĉi trezora libro, li skribis la jenajn vortojn: "Studu ĉiutage 1' tri malnovajn artikolojn, ĵetu ĉiujn egoismajn pensojn malproksimen; studu kontinue 1' tri malnovajn artikolojn, restu firme 1' volo de revoluci' ĝisfine; studu por ĉiame 1' tri malnovajn artikolojn, frue realigu la socion komunisman." Li konstante rigardis sin laŭ la vidpunkto "dividi unu en du", prenante sin unuflanke kiel movforton de la revolucio kaj aliflanke ankaŭ kiel objekton de la revolucio. Tute egale, ĉu en la plotona kunveno, en la parti-grupa kunveno aŭ en la kunveno pri apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, li ĉiam la unua eksponis siajn pensojn por senindulge kontraŭbatali sian egoismon. Li diris: "Oni devas ĉiam dividi unu en du rilate al si mem kaj daŭre rimarki siajn proprajn malfortaĵojn por ilin senĉese venki." Li diris plie: "En la kapo de revolucia batalanto ne devas esti eĉ ero da malutila herbo. Se ekzistas tia, ĝi devas esti tuj forigita per la penso de Maŭ Zedong." Tiamaniere Vej Ĝongji elfosis iom post iom la burĝan ideologion en la procezo de sinrevoluciigo kaj almetis la proletan; kaj sub la nutrado de la granda penso de Maŭ Zedong, li kreskis tre rapide en proletan batalanton kun alta politika konscio. Kiam li servis kiel batalanto, li estis titolita en sinsekvaj jaroj kiel "batalanto de kvin bonoj" kaj akceptita kiel membro de la Komunista Partio de Ĉinio. Kiam li fariĝis funkciulo, li estis bona funkciulo. Kiam li partoprenis en la movado de "kvar purigoj" de la loko, li estis "trupano de kvin bonoj".

Vej Ĝongji starigis al si la revolucian vivkoncepton "vivi pro la revolucio, kiam oni vivas; morti pro la revolucio, kiam oni mortas; kaj lukti ĝis la fino kiam oni spiron ankoraŭ havas." Li senlime amis, senlime kredis kaj senlime adoris Prezidanton Maŭ, lian penson kaj lian revolucian linion kaj fine per siaj agoj praktikis kion li skribis en sia taglibro montrante sian fidelecon al nia plej estimata kaj amata granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ: "Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Mi garantias al vi, ke mi faros ĉion, kion vi diros. Se vi ordonos min al monto de glavoj, mi tuj suriros la glavmonton; se vi ordonos min al maro de fajro, mi tuj eniros la fajrmaron. Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Mi revolucios por ĉiam sekvante vin! Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Mi sekvos vin por ĉiam sensânceliĝe! Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Permesu al mi deziri al vi senlime longan vivon!"

Senmorta estas la martiro Vej Ĝongji, granda batalanto por komunismo!

Riĉa Tritika Rikolto en Ĝajli

Riĉan rikolton denove akiris en la kuranta jaro sur siaj 180 hektaroj da tritikaj kampoj Ĝajli-brigado de Songĝuang-komunumo en Tonghian, antaŭurbo de Pekino. Montriĝis pliprodukto de pli ol 18 procentoj de la produktkvanto de la pasinta jaro, kiu estis la rekorda jaro en la historio de tiu brigado.

La malriĉ-kamparanoj, malsuperaj mez-kamparanoj kaj funkciuloj de Ĝajli, kiuj estas ĉiam fidelaj al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, disvolvis decideme batalon kontraŭ plenmano da potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon kaj repuŝis la furiozan atakon de la klasaj malamikoj. Ili detruis plene la egoismon en sia kapo per la penso de Maŭ Zedong kaj akcelis la revoluciigon de sia ideologio. Ili firme tenis la revolucion, forte stimulis la produkton, kaj fosis kanalon en la revolucia spirito de la Malsaĝa Avo kiu translokigis montojn. En la daŭro de nur 20 tagoj ili sukcesis fini la laboron de pli ol 50,000 kubmetroj da tero, kiu ordinare bezonas unu monaton kaj duonon. Tiamaniere la kampoj ambaŭborde de la kanalo estis irigaciataj per la akvo de Ĉaŭbaj-rivero, kaj la tritikoj ne soifis malgraŭ la longa sekeco.


Tute nova situacio de duobla venko de la revolucio kaj produkto aperis en Ĝajli. Tie la granda proleta kultura revolucio jam alportis abundajn kaj belegajn fruktojn.

La armeanoj kaj kamparanoj kune rikoltas tritikon.





La komunumanoj studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* ĉe rando de la kampo.





Konstant
Deng Va

La malgranda elektra ventolilo funkcias rapide kaj kontentige.







La komunumanoj portas hejmen tritikon.


3

Alia riĉa rikolto



a komitatano de la Pekina Revolucia Komitato
ntian falĉas tritikon kun komunumanoj en Ĝajli.






Sunumo de tritiko

Bonega Situacio en Nia Industria Produkto

KIAM la granda proleta kultura revolucio iris en la altan tajdon de revolucia amasa kritiko al la plenmano da enpartiaj plej grandaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj iliaj agentoj sur diversaj batalfrontoj, la laborista klaso de nia lando firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produkton en heroismo. Multaj fabrikoj sukcesis plenumi, antaŭplenumi aŭ superplenumi la produktan planon de la unua duonjaro. Senĉese aperis novaj produktaĵoj kun progresintaj niveloj.

GRANDA DISVOLVIĜO DE INDUSTRIA PRODUKTO EN ŜANHAJO

Decideme respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, la ŝanhajaj proletaj revoluciuloj sur industria fronto firme tenas la ĉefan direkton de batalo dum la granda kultura revolucio, unuiĝas kun la plejparto de la amasoj kaj ĉiam kondukas sian lancpinton al la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ili plenforte frakasas la reviziisman linion praktikitan de la lastaj en iliaj fabrikoj kaj starigas la proletan revolucian linion reprezentatan de Prezidanto Maŭ. Ili ankaŭ rompas la skolastikon kiu katenas la kreemon de la amaso kaj starigadas novajn revoluciajn regularojn kaj sistemojn. Universale leviĝis la socialisma aktiveco de la grandnombraj laboristoj kaj oficistoj, kaj ĉiam pli kreskas la produkto de la tuta urbo. En la unua duono de la kuranta jaro, la industria produktvaloro estas pli multa ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro, kaj la produktkvantoj de ĉefaj fabrikaĵoj, kiuj estas strikte ligitaj kun la socialisma konstruado, kiel ekzemple precizaj ilmaŝinoj, man-traktoroj kun po 7 ĉevalpovoj, traktoraj partoj, kotonŝtofo, insekto-mortigiloj, plastaĵoj, papero kaj presinko, kaj aliaj produktaĵoj kiel ekzemple brakhorloĝo kaj radioricevilo ĉiuj kreskis relative multe kompare kun tiuj en la sama periodo de la pasinta jaro. La kvalito de la produktaĵoj estas stabila kaj de iuj fabrikaĵoj cetere pliboniĝis. Krome, multaj gravaj novaj produktaĵoj urĝe bezonataj en la konstruado de nia lando estas sukcese fabrikitaj post provado.



En la alta tajdo de amasa kritikado, la ŝanhajaj proletaj revoluciuloj kaj firme tenas la revolucion kaj stimulas la produktadon. La vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj de la Tria Ŝtal-uzino de Ŝanhajo superplenumis la ĉefajn produktajn taskojn de la dua sezono. Jen laboristoj laboras sub alta temperaturo.

GRANDMEZURA KRESKO DE INDUSTRIA PRODUKTVALORO EN KINGDAŬ

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj firme praktikante la grandan politikon de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, la kingdaŭaj proletaj revoluciuloj kaj aliaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la industria kaj komunika frontoj superplenumis je 4% la ŝtatan planon de la unua duonjaro dum la profunda disvolviĝo de amasa kritiko kaj granda batalo kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

Laŭ la statistiko, la industria produktvaloro de la tuta urbo en la unua duono de la nuna jaro plimultiĝis je pli ol 22% ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Tiu kresko estas la plej grandmezura en tiuj ĉi kelkaj jaroj. La produktkvantoj de 58 ĉefaj fabrikaĵoj kreskis en diversaj gradoj, la kvalito de la plejparto el la ĉefaj fabrikaĵoj stabile altiĝis, kaj ia redukto de la produktkosto kaj konsumado de krudaj kaj aliaj materialoj estas atingita. Tiuj sukcesoj en la unua duonjaro metis fidindan bazon por garantii plenumon aŭ superplenumon de la ŝtata plano de la tuta jaro.


VIGLA LEVIĜO DE INDUSTRIA PRODUKTO EN HARBIN

La proletaj revoluciuloj de Harbin prenis sur sin la du gravajn taskojn de revolucio kaj produkto kun alta devkonscio de mastro, post kiam ili reprenis la partian, administran, financan kaj kulturan potencojn el la manoj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la komenco de la nuna jaro. Ili ĉiam metas la revolucion sur la unuan lokon, prenas la amasan kritikon kiel levilon de ĉiuj laboroj kaj komandas la produkton per la penso de Maŭ Zedong. Surbaze de la akcelita ideologia revoluciigo de laboristoj kaj oficistoj, multaj fabrikoj kaj entreprenoj senbalastigis sian strukturon, reduktis neproduktajn personojn, energie frakasis reviziismajn sistemojn en administrado kaj starigis novajn revoluciajn sistemojn. La spirita fizionomio de la multnombraj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj fariĝis tute nova kaj la produkto kreskis kun ĉiu tago. En la unua duonjaro, pli ol 300 fabrikoj en Harbin antaŭplenumis aŭ superplenumis la ŝtatan produktan planon kaj la produktkvanto de fabrikaĵoj kreskis relative multe kompare kun tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Nun, la multnombraj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de diversaj fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj en Harbin estas streĉantaj plene sian energion kaj strebantaj forte antaŭen por garantii la superplenumadon de la jara produkta plano.

ALTPRECIZA UNIVERSALA CILINDRA FROTUMMAŜINO FABRIKITA EN PEKINO

Disvolvante la revolucian spiriton de kuraĝo en kreado, la proletaj revoluciuloj de la Pekina Dua Il-maŝina Fabriko sukcesis mem projekti kaj fabriki altprecizan universalan cilindran frotummaŝinon kun ĉina karaktero kaj progresinta nivelo en la mondo kaj provizas la nacidefendan industrion kaj tiun de precizaj maŝinoj per nova altkvalita ekipaĵo.

La laborefiko de tiu maŝino superas tiun de importitaj maŝinoj de la sama tipo. La glateco de ekstera aŭ interna rondsurfaco prilaborita de ĝi povas atingi stabile la 14-an gradon — la plej altan normon de la mondo. La ŝtata ekspertizo konfirmis ĝian plenan konformon al la normo postulata de la projekto.




Revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino sukcesis produkti novan specon de altpreciza universala cilindra frotumilmaŝimo kun avangarda teknologia nivelo de la mondo.

La projekto kaj fabriko de tiu maŝino estas brila atingo de la granda proleta kultura revolucio. Antaŭ tiu revolucio, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la nomita fabriko sufokis la saĝon kaj talenton de la revoluciaj amasoj kaj permesis al ili en fabrikado de maŝinoj nur imiti modelojn de fremdlandaj produktoj. En la granda kultura revolucio, uzante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, la proletaj revoluciuloj de tiu fabriko decideme batalis kontraŭ la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj persiste iras sian propran vojon. Ili faris profundajn kaj detalajn enketon kaj esploron ĉe dekoj da fabrikoj kaj klientoj en Ŝanhajo, Ŝenjang k. a. lokoj kaj ankaŭ kune esploris kun la laboristoj de sia fabriko super la bluplanoj. Finfine ili sukcesis projekti kaj fabriki tiun novan frotummaŝinon.

SINSEKVAJ NOVAJ REKORDOJ EN LA LOKOMOTIVA KAJ VAGONA FABRIKO "LA 7-A DE FEBRUARO"

Post la transpreno de la potenco de la fabriko, en la heroa spirito **"ni bone kapablas ne nur detrui la malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui la novan"**, la proletaj revoluciuloj de la Pekina Lokomotiva kaj Vagona Fabriko "La 7-a de Februaro", unu el la plej grandaj riparejoj de lokomotivoj kaj vagonoj en nia lando, gvidis la laboristojn kaj oficistojn firme teni la revolucion kaj forte stimuli la produkton kaj sukcese plenumis la ŝtatan planon de la unua duonjaro. Komence de aprilo ĉijare, en la daŭro de tri monatoj, ili kontinue kreadis plej altajn rekordojn de sia fabriko en ĝenerala riparo de lokomotivo kaj ŝarĝvagono. En junio, inter 21 lokomotivoj riparitaj de tiu fabriko, 15 sukcesis post ununura provo. Tio estas nova rekordo en la historio de tiu fabriko.

Liaŭjuan-a Kemi-fabriko en Ŝanhajo impete stimulas sian produktadon en la alta tajdo de amasa kritikado kaj faris novajn kontribuojn.



ĈAŬJANG:

La Revolucio kaj Produkto de Kingdaŭ-a Prestinkturejo en Plena Vigleco

LA Ŝtata Kingdaŭ-a Prestinkturejo estas malnova entrepreno havanta historion de kvindek jaroj. Ĝiaj laboristoj havas gloran tradicion de heroa batalo kontraŭ la japanaj agresantoj kaj burokrata burĝaro de Kuomintango. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la fabriko revenis en la manojn de la popolo. Post serio da socialismaj transformoj, la produkto fluge progresis. Antaŭe ĝi prestinkturis nur kotonajn teksaĵojn, kaj nun ĝi povas prilabori senescepte ankaŭ teksaĵojn el silko, artefaritaj kaj kemiaj fibroj k. c. Anstataŭ produkti sole por enlandaj konsumantoj, ĝi nun produktas ĉefe por eksporti kaj havas klientojn en kvardek tri landoj kaj regionoj. En la Printempa Foiro de Eksportaj Varoj en Kantono ĉijare, tiu ĉi fabriko elmontris ducent dek unu novajn specojn de produktaĵo. Pli grandan junecan vivforton ĝi manifestas, ekde la granda proleta kultura revolucio.

En tiu senprecedenca, granda proleta kultura revolucio de nia lando, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la proletaj revoluciuloj de la Ŝtata Kingdaŭ-a Prestinkturejo transprenis la potencon de la plenmano da potenctenantoj en la fabrika Partia Komitato irantaj la kapitalisman vojon en la 21-a de januaro, ĉijare, kaj tiel fariĝis la mastroj de la fabriko. La prestinkturejo vere ricevis novan vivon. La proletaj revoluciuloj ripetade kaj ripetade hurais: Vivu la venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ! Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!

Post kiam la proletaj revoluciuloj ektenis la potencon, aktive respondante al la grandaj alvokoj de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** kaj **"estu ŝparemaj en revolucio"**, ili plue disvolvis la amasan movadon de "ĉiutaga" studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj disvolvis amasan kritikadon, amasan bataladon kontraŭ la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj iliaj agentoj en la fabriko, uzante la penson de Maŭ Zedong kiel orientilon. Dank' al la batalado la revolucia entuziasmo de la vasta amaso estas ekscitita, kaj la disvolviĝo de la produktado estas akcelita. Ĉie en la fabriko regas prospereco. La tuta fabriko antaŭtempe plenumis je dekses tagoj kaj superplenumis je 10.33% la ŝtatan planon de la unua duonjaro, kun kresko de 21.51% en produkto kompare kun la sama periodo de la lasta jaro. La labor-produktivo en la unua duonjaro ankaŭ altiĝis je 36.45% kompare kun tiu de la sama periodo de la lasta jaro.



Tinkturisto formulas recepton.

MALFERMO DE NOVA VOJO POR ALTA PRODUKTO

La proletaj revoluciuloj de la prestinkturejo decideme kritikis la estintan reviziismán linion de funkciigo de entrepreno sole dank' al malmultaj specialistoj, faras en la produktado "popolan militon" kaj tiel malfermis al si novan vojon por krei altan produkton.

Estis sensacia novaĵo por la fabriko ke laboristoj de la presa laborejo mem preskribis teknologian recepton. Antaŭe la teknikistoj faris la recepton plejparte en sia oficĉambro kun la helpo de teknika literaturo, kaj ĝia precizeco variis nur de 60% ĝis 70%. La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la fabriko, tamen, ĝin prenis kiel "konstitucion", kaj per la reviziisma t. n. "teknologia disciplino" rezervis la rajton de modifo de la teknologio de presado ekskluzive al la teknikistoj. La preslaboristoj devis produkti nur laŭ la recepto kaj ne rajtis ĝin modifi. Tiu reviziisma "teknologia disciplino" tiel forte katenis la aktivecon de laboristoj en produktado ke laborforto kaj materialoj estis multe malŝparitaj. Dum longa tempo, la produkta kvanto de ĉiu deĵoro restis malalta. Sed alta estis la kosto de produkto, kaj cetere ankaŭ la kvalito ne povis atingi la normon de la ŝtato. Laŭ la bezonoj de disvolvado de la produkto kaj urĝa deziro de la revolucia amaso de laboristoj, la revolucia gvida kadro de la triflanka kombiniĝo, kamarado Kin Piĝen (antaŭe vicestro de la fabriko) elmetis la revolucian proponon rajtigi la laboristojn preskribi la teknologian recepton. De tiam la preslaboristoj liberiĝis de la jugo de reviziisma "teknologia disciplino", rompis la blindan kredon al "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj" kaj disvolvis sian propran saĝon kaj inteligenton. Por pli rapide mastri la leĝojn de teknologia recepto, ili ripetade studis la verkojn *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* kaj *Pri Praktiko*, kombinis la revolucian spiriton kun scienca sinteno, kolektis kaj notis teknologiajn materialojn el sia propra praktiko, kiuj estas pli precizaj kaj pli fidindaj.


La maljuna laboristo Ĉu Juanking, kiu havas laboraĝon de pli ol dudek jaroj, scipovas apenaŭ legi, tamen, la recepto de li preskribita atingis la precizecon de pli ol 90%. Kaj la precizeco de la presa recepto preskribita de iuj metilernantoj ankaŭ superis 80%. La preslaboristoj prave diras: "Nun ni fariĝis mastroj en la vera senco de la vorto." Havante la povon de aktiveco en la produkta laboro de presado, la laboristoj sukcesis okulfrape altigi la efikecon de la maŝinoj, grandmezure kreskis la produkta kvanto, kaj tiu de unu maŝino en ĉiu deĵortempo kreskis de 7,500 jardoj da poreksporta katuno antaŭe ĝis 13,080 jardoj. La superflua kolorkaĉo restinta post presado ankaŭ reduktiĝis al kvarono aŭ kvinono. Efike oni eliminis malŝparajn fenomenojn, kaj grandaj kvantoj da tinkturiloj kaj kemiaĵoj estas ŝparitaj por la ŝtato. La preskosto de teksaĵo el artefarita kotono, ekzemple, reduktiĝis je 25%.

Post la frakaso de la reviziisma rutino en teknologia projektado, ankaŭ la penso de inĝenieroj kaj teknikistoj estas liberigita. Ili iras el sia ĉambro kaj venas al la maŝinoj, kie ili kaj laboras kaj direktas la laboristojn formante kun ili kvazaŭ kuntorditan ŝnuron. Ilia antaŭa laborstilo de



Laboristo prilaboras ŝtofon per enlande produktita dutavola glaceiga maŝino.

Prestinkturisto preparas kolorkaĉon per la kontinue-produkta maŝino projektita de la laboristoj 'mem.



sinapartigo de la amaso kaj de la praktiko jam estas ŝanĝita. Lastatempe, la inĝenieroj, teknikistoj kaj laboristoj kune eksperimentas aktive por uzi la enlande produktitajn tinkturilojn anstataŭ la importitaj kaj tiel malfermi vastan terenon de ilia uzado. Praktiko de la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento pli strikte ligis la laboristojn kaj teknikistojn kaj starigis inter ambaŭ novan revolucian amikecon.

GRANDA FRUKTO DE TEKNIKA RENOVIGO

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, por konstante **"fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn"** en sia laboro, la proletaj revoluciuloj de la prestinkturejo energie disvolvas kampanjon de sciencaj eksperimentoj kaj teknikaj renovigoj, mobilizante la amasojn kaj apogante sin sur ilin. En ĉiu laborejo la amaso estas organizita por fari facilajn kaj simplajn renovigojn, tiel ke la tuta fabriko estas envolvita en alia varma tajdo de teknika renovigo, en kiu ĉiu kontribuas per novaj ideoj kaj persona partopreno en provado. En la unua duono de la kuranta jaro, oni efektivigis 116 renovigojn kaj multe kontribuis en la superplenumo de la produkta plano.

EN SERVO AL LA LABORANTA POPOLO

Projektado de desegnaĵoj estas grava konsistiga parto en la produkto de katuno, Antaŭe, la



Artistinoj ellaboras novajn desegnojn por prestinkturo.

enpartiaj potenctenantoj de la fabriko irantaj la kapitalisman vojon ĉiam rezistis kaj oponis kontraŭ la servigo de la projekto de desegnaĵoj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj al la politiko de la proletaro, tiel ke la desegnaĵoj konsistis ĉefe el figuroj de floroj, birdoj, fiŝoj, insektoj, dandoj, belulinoj ktp. Eĉ cirkloj kaj punktoj formis temojn de desegnoj.

Nelonge antaŭ la granda kultura revolucio, la desegnistoj de la fabriko kolektive kreis grandan desegnaĵon titolitan *Kanto pri Oŭjang Haj* por prikanti la heroon, kiun la oficistoj kaj laboristoj de la fabriko opiniis nova provo de socialisma karaktero en la projektado de desegnaĵoj. La enpartiaj potenctenantoj de la fabriko irantaj la kapitalisman vojon, tamen, inversigante pravon kaj malpravon kaj konfuzante nigron kun blanko, obstine sekvis la reakcian linion de la burĝaro, ĝin akuzis kiel "venenan herbon" kaj strangolis la revolucian kreemon de la desegnistoj en ĝia lulilo.

Post la transpreno de la potenco de la fabriko fare de la proletaj revoluciuloj, ankaŭ la desegnistoj reakiris la rajton krei novaĵon por la revolucio. Kun la forta deziro fari la desegnaĵojn konformajn al la postulo de la vastaj popolamasoj, ili kreive studis kaj kreive aplikis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ekkonis ke **"Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj".** Ili plene disrompis la malnovajn regulojn kaj rutinojn kaj ŝanĝis sian malnovan laborstilon de sinapartigo de la klasbatalo kaj desegnado en fermita studio, tiel ke tute novan fizionomion ekhavis la projektoj de desegnaĵoj. Kun senlime profunda klasa sento al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la decidemo ĝismorte defendi la novan ruĝan reĝimon, ili sukcesis projekti la grandajn desegnaĵojn titolitajn *Vivu la Nova Ruĝa Reĝimo, Vivu la Ĉiamvenka Penso de Maŭ Zedong* k. a., kiuj ĝuis bonan akcepton de la revolucia amaso kaj de la Tutprovinca Kunveno por Elekti Desegnaĵojn kaj Difini Produktkvantojn. Kaj la produktkvantoj por la du nomitaj desegnoj estis la plej altaj en la tuta provinco. Ili ricevis laŭdojn ankaŭ en la Tutlanda Kunveno por Revoluciigo en Produkto kaj Disvendo kaj estis enlistigitaj kiel specoj de grandtipaj desegnoj por disvastigado tra la tuta lando. En la pasinteco, la sama desegna sekcio povis liveri por uzado nur 45 desegnaĵojn ĉiumonate, sed ĉijare ĝi povas liveri ĉiumonate 80, plej alte ĝis 120.

ŜPAREMO EN REVOLUCIO FARIĜIS MORO

La proletaj revoluciuloj de la Ŝtata Kingdaŭ-a Prestinkturejo plej bone aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ **"estu ŝparemaj en la revolucio".**

Ili metas la revolucion en komando super produkto, faras produktan laboron en spirito de revolucio kaj vaste disvolvas la amasan kampanjon por esti ŝparema en la revolucio. Oni uzas la instruojn de Prezidanto Maŭ **"estu ŝparemaj en la revolucio"** kaj **"konstruu la landon laboreme kaj ŝpareme"** kiel spegulon por kontroli sian agadon kaj elmontras siajn vidpunktojn por trovi la diferencojn kaj tiel korekti siajn pasintajn erarajn ideojn, ekzemple, "ŝparemo multe ĝenas, sed malmulte valoras" kaj "ŝparemo malhepas produktadon", kaj kritiki la sinjoridan agmanieron de malinklino al ekonomio. Fariĝis moro de la proletaj revoluciuloj de la tuta fabriko ŝpari ĉiun uncon da karbo, ĉiun guton da akvo, ĉiun kilovathoron da elektro, ĉiun gramon da tinkturilo kaj ĉiun colon da ŝtofo. La laboristoj de la tranĉista grupo en la finordiga kaj enpaka laborejo, kiuj atentas pri ŝparo en ĉiuj bagateloj kaj persistas en farado de ŝnuraj ligiloj dum siaj liberaj tempoj, liveris al la ŝtato pli ol 20,000 tiajn ligilojn bezonatajn en pakado. Dank' al la kunlaboro inter la laboristoj de la mekanika laborejo kaj la finordiga kaj enpaka laborejo, estas efektivigita la reformo de la movkomunika ekipaĵo de glaceiga maŝino, kaj tio ebligas ŝparon de 180 kilogramoj da lubrika oleo en ĉiu monato.

La revolucia laboristo Ĝang Huajking de la akvoŝpara grupo, kiu havas la "Malsaĝan Avon" en sia koro dank' al kreiva studo kaj kreiva apliko de la "tri malnovaj artikoloj", venkis multajn malfacilojn kune kun siaj samgrupanoj, kaj sukcesis klare ekscii post mallonga tempo la staton kaj kondiĉojn de la subteraj akvodefluiloj kaj kvanton de la uzita akvo de la fabriko, uzante malgrandajn lignopecojn, tablotenisajn pilkojn, kolorajn akvojn k. a. dum la esplorado de la linio de defluigaj akvotuboj kaj mezurado de la akvokvanto. Por pli racie pliigi la utiligon de la uzita akvo, ili klasigis ĝin en kelkajn tipojn, faris ĉ. cent provojn, akumulis el tio pli ol okcent konstataĵojn kaj fine sukcesis solvi la problemon de utiligado de la akvo jam uzita en prestinkturado.


Oni nomas kamaradon Ĝang Huajking "indiĝena specialisto", sed li mem diris: "Estas verkoj de Prezidanto Maŭ kiuj faris min pli saĝa." Kompare kun la sama periodo de la lasta jaro, la tuta fabriko ŝparis por la ŝtato en la unuaj ses monatoj de la kuranta jaro akvon je 211,500 tunoj (la akvo uzita por cent metroj da prestinkturita katuno reduktiĝis de 2.24 al 1.71 tunoj), elektroenergion je 300,690 kilovathoroj kaj karbon je 2,966 tunoj.

Sub la puŝado de la granda proleta kultura revolucio, la Ŝtata Kingdaŭ-a Prestinkturejo marŝas de venko al venko sur la vojo de socialismo.



Indiĝena specialisto Ĝang Huajking studas la "tri malnovajn artikolojn".

Revolucia gvidanta kadro Dong Lianŝun, kiu estis vicfabrikestro kaj jam partoprenis la triflankan gvidantaron, faras fizikan laboron kune kun laboristoj en la pakejo.





Alte tenante la standardon de amasa revolucia kritiko, membroj de Hongging-brigado solide kritikas la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Jen ili kunvenas por interŝanĝi sperton en kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

La Penso de Maŭ Zedong Heligas Hongging

HONG TAŬ

LA ŝtormo de la granda proleta kultura revolucio alruliĝas al Hongging, kiu estas ordinara akvoriĉa vilaĝo en la sudo de Jangzi-rivero, kaj la hejmloko de Gu Ataŭ, la aŭtorino de la artikolo *Vortoj de Prezidanto Maŭ Lumigas Mian Koron*, publikigita en nia gazeto n-ro 6.

En tiu ŝtormo, Hongging-brigado de Ŝahi-komunumo en Tajcang-gubernio, Giangsu-provinco, kiu estas fama pro sia kreiva studo kaj kreiva apliko de la "tri malnovaj artikoloj", sekvas proksime la grandan direktiliston Prezidanto Maŭ kaj fariĝis imitinda modelo en defendo kaj starigo de la penso de Maŭ Zedong.

BATALO EN DEFENDO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

La revoluciaj kamparanoj de Hongging ĉiam pasie persistas por kreive studi kaj kreive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ en la granda kultura revolucio. Ili diris: "Oni povas ĉesigi manĝon en iu tago, sed neniam la studon de la verkoj de Prezidanto Maŭ." Studi la verkojn de Prezidanto Maŭ jam fariĝis la unua bezono en ilia vivo. Sed la plenmano da plej grandaj potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon en nia lando tre timas tion, ke la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj studas kaj posedas la penson de

Maŭ Zedong. Ili malice kalumniis, ke la studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas ago de "trosimpligo" kaj "trivialigo". Ili narkotis kaj trompis la amasojn per la fifama nigra *Memkulturo*. La revoluciaj kamparanoj de Hongging absolute ne povas tion toleri. Ili konkure sin ĵetis en la grandan kritikan movadon por defendi la penson de Maŭ Zedong.

Gu Ataŭ, tiu maljuna malriĉkamparanino kaj aktiva studanto de la verkoj de Prezidanto Maŭ, bruliĝas de kolero kontraŭ la insidaj klasmalamikoj. Malgraŭ sia maljuneco kaj malforteco, spite al profunda nokto kaj longa vojo, ŝi aktive ĉeestis ĉiujn kritikajn kunvenojn senescepte. En tiuj kunvenoj ŝi rigore kritikis senhontajn diraĵojn de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon per siaj propraj travivaĵoj. Ŝi diris: "La *Memkulturo* atakas Prezidanton Maŭ, la ruĝan sunon en nia koro, kaj oponas kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, nia vivradiko; li meritas milfoje morton! Prezidanto Maŭ ĉiam estas kun ni, koro ligiĝinta kun koro, li estas vojgvidanto de ni malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Estis Prezidanto Maŭ, kiu gvidis nin forlasi la soltrunkan ponton de etkamparana ekonomio kaj suriri la ebenan vojegon de socialismo. Hodiaŭ, li persone gvidas nin disvolvi arde la grandan proletan kulturan revolucion por ke la ŝtala proleta ŝtato neniam ŝanĝu la koloron tra mil kaj mil generacioj. Sen ĝusta gvidado de Prezidanto Maŭ ne estus la venkoj de la revolucio. Ni malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj neniam disiĝos de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ni estos por tiuj, kiuj subtenas Prezidanton Maŭ, ni estos kontraŭ tiuj, kiuj oponas kontraŭ Prezidanto Maŭ!

Informiĝinte, ke iuj oponas kontraŭ Prezidanto Maŭ, juna komunumanino Ŝen Jujing, kiu estis kuracata en hospitalo, ne povis daŭre resti en ĝi kaj tuj revenis al Hongging. Kvankam ŝia suba korpoparto paraliziĝis, kaj ŝia maldekstra mano kripliĝis, tamen ŝi ankoraŭ obstine skribis dazibaŭ-ojn (opini-afiŝojn) kuŝante en la lito por kondamni per plumo la plej grandan enpartian potenctenanton irantan la kapitalisman vojon. Ŝi indigne refutis la absurdajn sensencaĵojn pri "flegado de virto kaj karaktero" predikataj de la *Memkulturo*. Ŝi diris: laŭ Prezidanto Maŭ, **"la daŭrigantoj de la proleta revolucia afero naskiĝas en amasaj luktoj kaj kreskas tra hardado en grandaj revoluciaj ŝtormoj"**. Sed la *Memkulturo* absurde asertas, ke "por progresi, oni devas multe peni por serioze fari memkulturadon". Tia "memkulturado" apartigita de revolucio kaj klasbatalo povas elkulturi nur parazitojn kaj reviziistojn. Ni absolute ne povas iri tiun vojon. Al la diabloj la ideisma "memkulturo"!

Li Hujcaj, batalionestro de milico, diris: "La historio de la revolucio de Ĉinio pruvis la grandan veron de Prezidanto Maŭ — **"el pafilo venas ŝtatpotenco"**. Nur kun pafilo la popolo povas kapti al si potencon. Sed la *Memkulturo* tutforte predikas "estingiĝon de klasbatalo", por ke ni forgesu klasbatalon, rifuzu revolucion kaj forĵetu pafilon kaj por ke la proleta diktaturo ŝanĝiĝu en la burĝan. Tio estas vana klopodo! La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon tutforte oponas kontraŭ revolucia milito kaj malamas la diktaturon de la proletaro, do ni devas nepre firme teni la pafilon por defendi la diktaturon de la proletaro.

En la granda kritika movado al la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon la revoluciaj kamparanoj de Hongging brave sturmas la malamikajn poziciojn kaj defendas la penson de Maŭ Zedong.



Gu Ataŭ studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉe kamprando.



Juna malriĉkamparanino Ŝen Jujing aktive partoprenas la revolucion spite al sia malsano. Ŝi gvidas sian tutan familion kaj aliajn komunumanojn studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj aktive partoprenas la amasan kritikadon.

FARI REVOLUCION EN LA FUNDO DE ANIMO

De la lastaj du jaroj la revoluciaj kamparanoj de Hongging plenenergie studas kaj aplikas la "tri malnovajn artikolojn", plene disrompas "egoismon" kaj starigas "kolektivismon", kaj faras revolucion en la fundo de animo. En la granda kultura revolucio ili plie levis la revolucion en la fundo de animo al nova nivelo.

Antaŭe, "laborpoentoj" estis la fokuso de batalo inter "egoismo" kaj "kolektivismo". La kamparanoj de Hongging mem faris komparon, dirante ke, antaŭe, por 3 aŭ 5 dekonoj da poento ili disputis ruĝiĝinte ĝis la oreloj, kaj nun ili kaŝe faras pezajn laborojn sen mencio al la aliaj. Antaŭe ili partoprenis fruan labordeĵoron por akiri pli da poentoj, sed nun ili tion faras volontule kaj senpage. Kial ili ŝanĝiĝis? Ĉar en ilia kapo estas "tri homoj": lernante de Ĝang Side, ili malŝatas profitemon kaj egoismon; lernante de Bethune, ili plu ne disputas por poentoj; lernante de la Malsaĝa Avo, ili kuraĝas sturmi ĉiujn malfacilojn. Su Hujliang, membro de la 6-a grupo falĉis kelkcent ĝinojn da herboj en unu tago por la grupo. Elakvigante riverŝlimon, li plenumis laboron de du personoj. Li diris: "Lerninte la 'tri malnovajn artikolojn', mi havas tute malsaman celon en mia laboro ol antaŭe. En la pasinteco, mi laboris unu tagon nur por gajni 20 laborpoentojn, sed nun mi komprenas, ke ankaŭ terkulturistoj devas servi al la popolo 'komplete' kaj 'senrezerve'."

Ne nur la 6-a grupo sed ankaŭ ĉiuj aliaj grupoj havas siajn Su Hujliang. Ĉen Ĝaŭjing de la 8-a grupo estas pensiulino de iu ŝpina fabriko. En la pasinta jaro ŝi laboris en valoro de pli ol mil laborpoentoj, sed ŝi akceptis nenion. En la sezono, kiam la agrikulturo ne okupas multajn homojn, ŝi iris al la fabriko por labori tie senpage. Kial ŝi rifuzas ĉian rekompencon? Jen estas ŝia respondo: Studinte verkojn de Prezidanto Maŭ mi nun komprenas, ke homo ja devas vivi por "komplete" kaj "senrezerve" servi al la popolo. La ŝtato pagas al mi pension, kial mi bezonas plian pagon? Ne estas vera feliĉo, ke nur mia familio estas riĉa, estos feliĉo nur tiam, kiam la kolektivo kaj la ŝtato estos riĉaj kaj la popoloj de la tuta mondo estos liberigitaj! Kvankam ŝi prenis nenian rekompencon, tamen ŝi laboris tre energie. Post la fino de kotonkolektado de sia grupo, ŝi tuj rapidis helpi la 13-an grupon. Post la fino de la laboro de la 13-a grupo, ŝi ree rapidis al la 17-a grupo, la 1-a grupo....

La batalo inter "egoismo" kaj "kolektivismo" pli kaj pli profundiĝas, la pozicio de la penso de Maŭ Zedong en la kapo de homoj pli kaj pli etendiĝas, kaj la spirita mondo de homoj pli kaj pli disvastiĝas. Kamparanoj de Hongging diras: "Antaŭe, starante ĉe la dompordo, ni vidas nur nian privatan parcelon kaj terkulturas nur por vivteni; sed nun, starante ĉe la dompordo, ni vidas Tiananmen kaj rigardas al la tuta mondo kaj kulturas teron por revolucio."



Gu Ataŭ, aktivulino en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, interŝanĝas sperton en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kun PLA-anoj, kiuj ŝin vizitas.

La ŝanĝo de mondkoncepto kaŭzis ĉenreakcion en la vivo de la malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de Hongging. La rilatoj inter la homoj, inter la grupoj kaj inter individuo kaj kolektivo estas ĉiuj en ŝanĝo.

Per la revolucio en la fundo de animo kaj la ŝanĝo de "egoisma koro" per "ruĝa koro", la hongging-anoj faris al si bonegan bazon! Tiu ĉi bazo fariĝas pli solida kaj pli granda per la hardado de la ondegoj kaj ventegoj.

En la tempo de intensa batalo, kamarado Ŝen Hjuelin estis tre okupata kaj, tutan tagon, tutan nokton, eĉ tutan semajnon, ne povis reveni hejmen. Lia patro multfoje petis lin helpi en riparo de la domo, sed li respondis: "Tio estas nia familia bagatelo, dum la granda proleta kultura revolucio estas granda afero de la ŝtato. Mi devas zorgi unue pri la ŝtata afero."

Ven Ĝongjing, juna malriĉa kamparanino, estis elektita kiel vicestro de la brigada komitato de la kultura revolucio, ĉar la klasaj gefratoj fidas ŝin. Komence ŝi ne kuraĝis akcepti tiun pezan respondecon kaj timis, ke la amasoj ribelos kontraŭ ŝi, se ŝi malbone plenumos sian taskon. Tre akra batalo okazis en ŝia penso. Ŝi konsultis la verkojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ montris al ŝi: **"Estas ne malmultaj homoj, kiuj ne konscias sian devon al la laboro, preferante la malpezan kaj evitante la malfacilan, ŝarĝante aliajn per pezaj taskoj kaj elektante por si la facilajn...."** Ŝi ekkonsciis, ke ne kuraĝi preni sur sin pezan taskon estas erare en ordinaraj tempoj, kaj des pli erare estas nun tiel agi. Antaŭ granda malamiko, kiel ŝi povas esti timigita de la malfaciloj? kiel ŝi povas timi revolucion en si mem? Ŝi faris firman decidon, forte batali kontraŭ la "egoismo" kaj preni sur sin la pezan taskon. En ŝia kapo la "kolektivismo" fariĝas pli kaj pli potenca.

TUTKORE KAJ PLENANIME SERVI AL LA POPOLO

Revoluciaj kadroj de Hongging kun emocio diris: "Ke ni povis fari unu paŝon antaŭen sur la navigacia linio de servo al la popolo en la grandaj ventegoj kaj pluvegoj de tiu ĉi amasa movado, tion ni dankis al Prezidanto Maŭ, kiu montris al ni la direkton!"

Je la komenco de la granda kultura revolucio, Jang Mingŝeng, la sekretario de la Partia Filio de la brigado, pensis: "Pasis nur unu jaro post la fino de la socialisma eduka movado, en kiu mi jam kontrolis mian agadon, kritikis la erarojn kaj ilin korektis. La kultura revolucio certe ne multe tuŝos min." Sed ne atendite, multaj dazibaŭ-oj aperis unu post alia. Jang Mingŝeng estis tute konfuzita. Li pensis: "Mi laboris kiel kadro jam pli ol dek jarojn, komencadis labori frumatene kaj ripozi noktmeze. Se mi ne havas meritojn, mi faris almenaŭ mian plejeblon. Kial do nun mi ankoraŭ rikoltas 'bombardon' kaj 'bruligon' el dazibaŭ-oj? Jen vana klopodado sendanka!"

Ju pli meditis Jang Mingŝeng, des pli li ne povis konvinkiĝi. Li maldormis turniĝante sur la lito.

Subite lia rigardo venis al la portreto de Prezidanto Maŭ, kiu ridetis mansvingante sur la muro kun signo de la ruĝa gvardiano sur la brako. Kaj sur la bildo estas la vortoj: "Aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ; sekvu la direkton de la Kompartio". Li rigardis kaj rigardis, kaj fine li ekpensis: "Vidante, ke la ruĝaj gvardianoj kuraĝas sturmi kaj agi, Prezidanto Maŭ sentas grandan ĝojon, dum mi sentas nur antipation al la amaso. Ĉu tio montras ke mi aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ?"

Ĉe la oreloj de Jang Mingŝeng eksonis la intima instruo de Prezidanto Maŭ: **"Sennombraj revoluciaj martiroj oferis sian vivon por la interesoj de la popolo, tiel ke ĉiu el ni vivantoj estas plena de doloro en la koro kiam ni ekmemoras ilin — ĉu povas esti ia ajn persona intereso, kiun ni ne povas oferi, aŭ ia ajn eraro, kiun ni ne povas forĵeti?"** Ekheliĝis lia koro: la dazibaŭ-oj de la amasoj, kiuj kritikas nin, montras, ke la amasoj estas movitaj. Pro la kritikoj de la amaso ni perdos nur niajn mankojn kaj erarojn, sed akiros la grandan penson de Maŭ Zedong.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ li kuraĝe iris en la amason, dediĉis sin al la revolucio forĵetinte la personajn kalkulojn, aktive prizorgis la produktadon rektigante sian talion, tiel ke li akiris la fidon kaj subtenon de la amaso.

Brigadestro Sun Hiaŭguan diris en la komenco de la movado: "Ĉiuj dazibaŭ-oj direktitaj al mi estos bonvenaj." Sed, kiam vere aperis dazibaŭ-oj direktitaj al li, li ektimis: "Ĉu oni kaptos miajn malfortaĵojn kaj ne plu forlasos min dum mia publika memkritikado? Jen certe perdiĝos plene mia prestiĝo." Kun la maltrankviliga demando li konsultis la verkojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ montris: **"Oni parolas ĉiutage pri 'vekado de la popolamaso', sed oni morte teruriĝas, tuj kiam la popolamaso vere vekiĝas — kia diferenco estas en tio kompare kun la ŝato de Je-gong al drako?"**

"Timo" kaj "kuraĝo" ekbatalis en la kapo de Sun Hiaŭguan. Timi la amason aŭ fidi la amason? Li ree konsultis la verkojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ instruas: **"Ni devas fidi la amasojn." "Se ni nur persistas en ĉio bona kaj korektas ĉion malbonan por la interesoj de la popolo, niaj trupoj sendube prosperos."**

Kiel hela lampo, la instruoj de la granda gvidanto lumigis lian koron kaj ankaŭ la vojon antaŭ li. Sun Hiaŭguan decideme rektigis sian talion. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, li faris ege sinceran memkritikon antaŭ la amaso. Kiam li finis sian memkritikon, li haltigis ĉiujn kaj distribuis la produktajn taskojn inter ili.

Sub la granda ruĝa standardo de la penso de Maŭ Zedong, unuiĝis la revolucia amaso kaj la revoluciaj kadroj de Hongging.

TURNIĜO DE SPIRITO EN MATERION — RIĈA SOMERA RIKOLTO

En la kantado pri la sinsekvaj venkoj de la granda proleta kultura revolucio, venas ĝojiga informo pri plena riĉa rikolto de someraj plantaĵoj de Hongging. Kamparanoj de Hongging diris: "Dank' al la studo de 'tri malnovaj artikoloj' grave ŝanĝiĝis nia penso, la revolucio kaj produktado havas direkton kaj kreskis al ni forto por batali kontraŭ la ĉielo kaj tero."

La riĉa rikolto de la someraj plantaĵoj de Hongging-brigado estis akirita sub malfavoraj naturaj kondiĉoj. Kio gvidis ilin en la batalo kontraŭ la naturo, estis la penso de Maŭ Zedong. Uzante la dialektikan penson de Prezidanto Maŭ, Hongging-brigado turnis la malfavorecon en favorecon, turnis la pasivecon en aktivecon kaj plene disvolvis la subjektivan aktivecon de la revolucia amaso. En la pasinta jaro, la rizo maturiĝis malfrue, sekve la rikoltado estis prokrastita je unu semajno ol en la pli fruaj jaroj, sed dank' al la obstina klopodo de la malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, la semado de hordeo, tritiko kaj sekalo finiĝis je du tagoj pli frue ol en la pli frua jaro. Post la fino de semado, ili tuj komencis kolektadon de sterko. Kiam la riveroj glaciiĝis pro frosto, ili rompis la glacion por elakvigi riverŝlimon. Multaj virinoj unuafoje partoprenis la laboron de ŝlimkolektado sur boatoj. Ili pene laboris du monatojn kune kun viroj. Rezulte de tio pli ol mil muoj da tritikkampoj estis plie sterkitaj per ŝlimo, tiel ke la tritikoj kreskis rapide kaj bone.

La malriĉaj kamparanoj, malsuperaj mez-kamparanoj kaj milicanoj fariĝis ĉefa forto kaj sturmantoj en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto. Ekde la mezo de marto, pluvadis pli ol unu monaton. Por ke la tritikoj ne suferu de pluvinundo, pli ol tri cent milicanoj fosis kanalojn por defluigi la akvon kaj per tio garantiis la normalan kreskon de la tritikoj. Poste ili ankaŭ ekstermis arme-vermojn per koncentritaj fortoj.

Nun la revoluciaj kadroj kaj vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, kvazaŭ kuntordinte sin en unu ŝnuregon, kiu kunigas ĉiujn fortojn, unuanime kaj plenenergie tenas revolucion kaj stimulas la produkton, por batalakiri riĉan rikolton de aŭtunaj plantaĵoj kun plena fido.




Per aktiva kolektado de sterko la komunumanoj senŝanceliĝe plenumas la grandan alvokon "teni la revolucion kaj stimuli la produktadon".

Firme tenante la pafilojn, milicanoj studas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.



Ĝajli-brigado Akiris Abundan Rikolton de Tritiko



Sekigado de tritiko sur draŝejo



Membrinoj de Ĝajli-brigado lernas Vortojn de Prezidanto Maŭ *dum laborpaŭzo.*

EN la tritikaj kampoj de Ĝajli-brigado, Songĝuang-komunumo, Tonghian, Pekino, kiu akiris grandan venkon post serioza batalado en la granda kultura revolucio, ruĝaj flagoj flirtas, la tritikaj spikoj rulas orajn ondojn, kaj homoj streĉe svingas siajn falĉilojn dum rikoltado. La granda armeo, kiu ĉi tie helpas en la somera rikolto, konsistas el komandantoj kaj batalantoj de PLA, junaj ruĝaj gvardianoj, membroj de literaturaj kaj artaj organizoj kaj medicinaj trupoj ktp., kiuj venas al la kamparo por helpi tritikan rikolton responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ.

La tritikoj de Ĝajli-brigado kreskis bonege kun grandaj spikoj kaj dikaj grajnoj. La tri mil muoj da tritikoj de la tuta brigado donas senprecedence abundan rikolton, kiu superos, laŭtakse, je pli ol 10% la rekordan rikolton de la jaro 1966. La komunumanoj diras, ke tio estas frukto de la granda proleta kultura revolucio kaj venko de la granda alvoko **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** farita de la estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ.

La irigaciaj kondiĉoj de Ĝajli-brigado estis ne bonaj, kaj al ĝi mankis akvo por irigacio. Printempe de tiu ĉi jaro, post kiam la proletaj revoluciuloj jam prenis al si la potencon post akra luktado, ili renkontis ree seriozan sekecon. Dum la tuta printempo oni havis neniun satan pluvon, kaj la tritikidoj kreskis flavaj kaj malgrandaj. Minacis la danĝero de malabunda rikolto, se oni malsukcesus solvi la problemon de irigacio. Kion fari? La Revolucia Komitato de tiu ĉi brigado tuj alvokis la tutan membraron fosi unu kanalon per ĉiuj fortoj por alkonduki la akvon de la rivero Ĉaŭbejhe, kiu kuŝas en la nordo de la vilaĝo, kaj tiel komplete



Poŝtmarkoj kun la Bondeziro "Longan Vivon al Prezidanto Maŭ"

Memore al la 46-a datreveno de la naskiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu estas granda, glora kaj ĝusta, la Ministerio de Poŝto kaj Telekomunikado komencis emisii, je la 1-a de julio, serion da memorigaj poŝtmarkoj kun la surpresita bondeziro "Longan Vivon al Prezidanto Maŭ". Ili surhavas profilan portreton de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en armeana uniformo (en lignogravuro). Varias iliaj koloroj je bruno, skarlato, teobruno, oranĝkoloro kaj rozkoloro laŭ la kvin malsamaj valoroj.

solvis la irigacian problemon de la tuta brigado. La tempo antaŭfiksita por la laboro estis 20 tagoj, kaj la tuta projekto estis 50,000 kubmetroj da tero. La tasko estis sufiĉe peniga.

En printempo ĉiu tago estas kara. Aprilo estas ja en okupata sezono de printempo. Tiam iuj ekblovis malvarman venton, dirante: "Ĉu vi unu brigado sukcesos fosi tian grandan akvokondukan kanalon?" "Ĉu 20 tagoj sufiĉos al vi por 50,000 kubmetroj da tero?" Sed, la vasta malriĉa kaj malsupera meza kamparanaro neniom ŝanceliĝis antaŭ tiu malvarma vento. Ili organizite studis la "tri malnovajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ kaj liajn instrukciojn koncernantajn supervenkon de malfaciloj. Ili diskutis dum lernado, kaj ilia menso fariĝis ĉiam pli hela. Ili diris: " **'Teni la revolucion kaj stimuli la produkton'** estas granda alvoko farita de Prezidanto Maŭ, kiun ni devas komplete plenumi!" "Ni havas kuraĝon detronigi la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj ankaŭ decidemon supervenki ĉiujn malfacilojn en produktado! Kaj ni nepre donos bonan ekzemplon en tio."

La vasta malriĉa kaj malsupera meza kamparanaro tuj startis kaj tagnokte batalis streĉe sur la laborejo de la kanalo, kun *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj sekaj manĝaĵoj. Kiam ili laciĝis, ili kune voĉlegis la vortojn de Prezidanto Maŭ aŭ laŭte kantis revoluciajn kantojn, reciproke kuraĝigante kaj helpante unu la alian. Kaj fine ili sukcesis fini la laboron antaŭ la templimo. La akvo de Ĉaŭbejhe komencis alruliĝi laŭ la kanalo, kaj la soifantaj tritikidoj akiris ĝustatempe akvon, tiel ke la abunda rikolto de tritiko estis garantiata.


Sed, la malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj kaj la revoluciuloj de Ĝajli-brigado ne kontentas sole pri siaj jam akiritaj sukcesoj. Ili ĉiam memoras en si la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **"Vi nepre devas prizorgi la ŝtatajn aferojn kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino!"**

Dum streĉa somera rikoltado, ili samtempe kondamnas kaj kritikas per buŝo kaj plumo la plej grandan enpartian potenctenanton irantan la kapitalisman vojon kaj kondukas batalon, kritikon kaj transformadon lige kun la praktiko de la klasbatalo de sia brigado. Ili ĉiam tenas en si gardemon kaj faras pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la klasaj malamikoj. Dum streĉa rikoltado de tritiko, perdante neniun momenton, ili atente flegas la aŭtunajn plantaĵojn por akiri abundan rikolton en la aŭtuno.

La Kuna Prezentado de Revoluciaj Artaj Batalantoj de la Ter-, Mar- kaj Aer-trupoj Garnizonantaj en Pekino

Revoluciaj artobatalantoj de la tera, mara kaj aera trupoj garnizonantaj en Pekino prezentas la grandtipan kantodancon Kantoj pri la Revolucia Historio.





Revoluciaj artobatalantoj de la tera, mara kaj aera trupoj garnizonantaj en Pekino prezentas la grandtipan kantodancon Celebre al la 25-a Datreveno de la Publikigo de la Brila Verko de Prezidanto Maŭ "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunveno en Jan-an".

OKAZE de la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, revoluciaj artaj batalantoj de la ter-, mar- kaj aer-trupoj garnizonantaj en Pekino kune prezentis revoluciajn artajn programerojn ĉirkaŭ la 1-a de aŭgusto al la ĉefurbaj laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj alia vasta spektantaro.

Tiun kunan prezentadon partoprenis pli ol 1,600 artaj batalantoj. Inter ili troviĝis veteranaj aktoroj, kiuj iam faris prezentadon surfronte dum la militaj jaroj, kaj junaj revoluciaj sturmantoj plenkreskiĝintaj sub nutrado de la penso de Maŭ Zedong. Dum la bonega prezentado, kun senkompare profunda amo ili prikantis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kaj la mastron de la historio, la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, tiel ke la vasta spektantaro ricevis tre grandajn inspiron kaj edukon.

La prezentado komenciĝis per la grandatipa kantodanco *Celebre al la 25-a Datreveno de la Publikigo de la Brila Verko de Prezidanto Maŭ 'Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an'*. Ĝi konsistas el kantoj kun teksto de vortoj de Prezidanto Maŭ kaj kolorriĉaj dancoj, profunde enkorpigas la brilan penson en la *Paroladoj* pri la batala rolo de literaturo kaj arto, pri ilia servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj pri la profundiĝo de literaturaj kaj artaj laborantoj en la amason de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ĝi ankaŭ elmontras la firman volon de la proletaj revoluciuloj nepre okupi la literaturajn kaj artajn scenejojn.

Alia grandatipa kantodanco *Vivu la Venko de la Revolucia Literatura kaj Arta Linio de Prezidanto Maŭ* entuziasme prikantas la datrevenon de la publikigo de la *Resumo de la Kunsido pri la Literatura kaj Arta Laboro en la Armeo, Kunvokita de Kamaradino Giang King laŭ la Komisio de Kamarado Lin Biaŭ* kaj aklamas la grandan venkon de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ. Ĝi prenis al si po elstaran fragmenton el la pekina opero *La Ruĝa Signal-lanterno*, la simfonio *Ŝagiabang* kaj la baledo *Blankhara Knabino* el la 8 revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj figure prilaŭdas la eminentan kontribuon de kamaradino Giang King en plenumo de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

La danco *Faru Fortan Atakon kontraŭ la Enpartia Potenctenanto N-ro 1 Iranta la Kapitalisman Vojon* elmontras la senliman malamon de centmilionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia lando kontraŭ la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, kaj ilian firman decidon por lin tute faligi.

Krome, prezentiĝis ankaŭ kantodanco *Alveno de Prezidanto Maŭ al Nia Militŝipo*, kiu elmontras la tagnoktan sopiron de niaj popolaj mararmeanoj al Prezidanto Maŭ, grandatipa kantodanco *Kantoj pri la Revolucia Historio*, kiu prikantas la penson de Prezidanto Maŭ pri armita batalo kaj popola milito, solo-kantoj kun teksto de poemoj kaj vortoj de Prezidanto Maŭ, kunludo de armea orkestro kaj aliaj programeroj.






Revoluciaj artobatalantoj de la tera, mara kaj aera trupoj garnizonantaj en Pekino prezentas la dancon Faru Fortan Atakon kontraŭ la Enpartia Potenctenanto N-ro 1 Iranta la Kapitalisman Vojon.

Ĝojinda estas la impeta kreskado de la armeaj artaj batalantoj. Ili ĉiuj estas energiplenaj kaj kun alta batalvolo. Multaj programeroj prikantantaj Prezidanton Maŭ estas kreitaj kaj provluditaj en tre mallonga tempo. Ekzemple, nun oni sukcesis surscenigi en du-tri tagoj la grandatipan kantodancon *Celebre al la 25-a Datreveno de la Publikigo de la Brila Verko de Prezidanto Maŭ 'Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an'*, kies kreado kaj provludo bezonus unu aŭ duonan jaron en la pasinteco. Multaj personoj, kiuj antaŭ unu jaro ankoraŭ estis "malgrandaj homoj" malestimataj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj reakciaj "aŭtoritatuloj", nun sukcesis prezenti distingindajn programerojn dank' al la penso de Maŭ Zedong kaj sia klassento de senkompare arda amo al Prezidanto Maŭ. Tion montris la 25-jara Liu Sujuan, revolucia sturmantino de la Ensemblo de la Politika Departemento de la Aerarmeo per sia persona sperto.

Liu Sujuan pasigis sian infanecon en almozpeto kun sia patrino. En la jaro 1948, la Popola Liberiga Armeo gvidata de Prezidanto Maŭ liberigis ŝian hejmlokon kaj savis ŝin el pereo. Poste ŝi partoprenis la armeon kaj fariĝis membro de ensemblo. Kiel ŝi deziris plengorĝe prikanti Prezidanton Maŭ dum sia unua surscenigo! Sed la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ne permesis ŝin fari tion, tial ŝi ĉiam sentis sin premata. La arde brulanta fajro de la granda kultura revolucio prilumis ŝian batalan vojon kaj komprenigis al ŝi, ke ŝi alfrontas batalon de la proletaro kontraŭ la restarigo de la burĝaro. Tra furioza batalo, la revoluciaj amasoj faligis la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj la deziro de Liu Sujuan prikanti la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ realiĝis finfine. Nun ŝi estas elektita kiel respondeculo de la revolucia komitato de tiu ensemblo. Dum la kuna prezentado, ili ankaŭ reformis la grandatipan kantodancon *Kantoj pri la Revolucia Historio*.

En la programero *Vivu la Venko de la Revolucia Literatura kaj Arta Linio de Prezidanto Maŭ*, Li Hujli, kiu ne estas baleda aktorino, akiris sukceson en rolado de Hi-er en la moderna revolucia baledo *Blankhara Knabino*, dank' al sia tagnokta diligenta ekzercado.

La armeaj revoluciaj artaj batalantoj, kiuj sukcesis fari kunan prezentadon en la granda proleta kultura revolucio, firme tenas en memoro la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj"**, ili kondukas la revolucion kaj faras prezentadon samtempe. Ili, kun granda revolucia pasio, suriris stratojn kaj profundiĝis en fabrikojn, kazernojn kaj kamparon por servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj per sia prezentado kaj ricevis de ili varmajn aplaŭdojn.



Longa Marŝo, *unu el la* Kantoj kun Poemoj de Prezidanto Maŭ, *Prezentata de la tera, mara kaj aera trupoj en Pekino.*

Artobatalantoj de la tera, mara kaj aera trupoj helpis la Komunumon de Ĉini-Albania Amikeco en la somera rikoltado kaj prezentis kantojn kaj dancojn por la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj dum laborpaŭzo.



Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio Vizitis Albanion

EN junio kaj julio de la kuranta jaro, la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio, estrata de kamarado Jaŭ Venjuan, faris amikecan viziton al Albanio laŭ la invito de la Kvina Kongreso de la Ligo de Albana Laboranta Junularo.

Transportanta la gratulon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la Kvina Kongreso de la Ligo de Albana Laboranta Junularo, la Delegacio de ĈRG esprimis al la Kongreso en la nomo de la ĉinaj ruĝaj gvardianoj proletan batalsaluton kaj plej varman gratulon, kaj samtempe esprimis plej altan kaj plej varman saluton al la albana popolo kaj albanaj junuloj, al la glora Albana Partio de Laboro kaj al kamarado Enver Hoxha, la granda gvidanto de la albana popolo kaj plej intima amiko de la ĉina popolo.

En la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio, sub la instruado de Prezidanto Maŭ kaj nutrado de la penso de Maŭ Zedong, la ĉinaj ruĝaj gvardianoj jam havas batalhistorion de unu jaro kaj grandegan, neforviŝeblan meriton por la revolucia afero de la proletaro. Nun, la ĉinaj ruĝaj gvardianoj sendis delegacion al alilando por ĉeesti kunvenon, kaj tio estis la unua fojo en la historio de ĈRG. Sed de kia granda signifo!

La heroa popola Albanio, kiun la delegacio vizitis, estas granda brilega lampo de socialismo en Eŭropo!

Sub la gvido de la Albana Partio de Laboro estrata de kamarado Enver Hoxha kaj alte tenante la grandan revolucian standardon de marksismleninismo, Albanio majeste staras kvazaŭ nubopikanta monto en la sieĝo farita de imperiismo kaj moderna reviziismo tavolo post tavolo kaj fariĝis fortika citadelo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo.

En la Kongreso Jaŭ Venjuan, estro de la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio, varme gratulis pro la gigantaj atingoj akiritaj de la albana popolo kaj albanaj junuloj sub la ĝusta gvido de la glora Albana Partio de Laboro estrata de la granda komunisma batalanto kamarado Enver Hoxha. Alte tenante la revolucian standardon kontraŭimperiismo kaj kontraŭreviziismo kaj standardon de ideologia kaj kultura revolucio, la albanaj junuloj plue atakas la ideologiojn de la burĝaro kaj aliaj ekspluataj klasoj, energie disvolvas lernadon de la teorio de marksism-leninismo kaj intensan batalon kontraŭ la reakciaj religiaj fortoj, forbalaas ĉiujn religiajn superstiĉojn kaj postiĝintajn kutimojn kaj morojn, kiuj venenadis homan menson dum miloj kaj centoj da jaroj, donas fortajn batojn al la malnovaj postrestintaj feŭdismaj fortoj, kiuj faras diskriminaciojn kaj subpremojn kontraŭ la virinoj, kaj kritikas la burokratismon, kiu izoligas kadrojn de la amaso kaj atencas ties interesojn. En la amasa revolucia movado, la demokratio sub proleta diktaturo estas plie disvolvita, la proleta diktaturo estas firmigita, kaj la ideologia revoluciigo de la vasta junularo estas akcelita.

Jaŭ Venjuan diris: La ĉinaj ruĝaj gvardianoj estas produktaĵo de la senprecedenca granda proleta kultura revolucio. La kampanjo de la ruĝa gvardio estas tute nova organizformo de revoluciaj gejunuloj, konforma al la kondiĉoj de revolucio sub la proleta diktaturo. La ruĝaj gvardianoj estas sturmantoj de la granda proleta kultura revolucio.

Prezidanto Maŭ estas la ruĝa komandanto de ni ruĝaj gvardianoj kaj ni estas liaj ruĝaj soldatetoj.



Enver Hoxha, la granda gvidanto de la albana popolo kaj intima amiko de la ĉina popolo, Agim Mero (la unua dekstre), la unua sekretario de la Centra Komitato de la Albana Unio de Laboranta Junularo kaj Jaŭ Venjuan, la estro de la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio, kune levas la manojn kaj huraas pro la revolucia amikeco kaj la batala unuiĝo de la popoloj de Ĉinio kaj Albanio.

Ni havas senliman amon, senliman kredon, senliman fidon kaj senliman adoron al Prezidanto Maŭ. Li estas la plej plej ruĝa suno en nia koro. La slogano de ni ruĝaj gvardianoj estas la eldiro de kamarado Lin Biaŭ: "Studu la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn instruojn, agu laŭ liaj instrukcioj kaj estu liaj bonaj batalantoj." Nun en la tempo de granda revolucia kritiko, leviĝas en nia lando senprecedence granda amasa movado de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Maturiĝas en batalo grupo post grupo tute novaj, junaj proletaj revoluciaj batalantoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong.

La granda amikeco inter la ĉinaj ruĝaj gvardianoj kaj la albanaj gejunuloj estas nerompebla per ĉia ajn forto. De nun en la granda revolucia batalo, la ĉinaj ruĝaj gvardianoj nepre sekvos la instruon de Prezidanto Maŭ serioze lerni vian proletan revolucian spiriton kaj resti ĉiam kun vi en unuiĝo, batalo kaj venko.

Dum sia restado en Albanio, la Delegacio de ĈRG ricevis treege varman kaj amikecan bonvenigon de la Ligo de Albana Laboranta Junularo. La 8-an de julio, la granda gvidanto de la albana popolo kaj plej intima amiko de la ĉina popolo kamarado Enver Hoxha akceptis la delegacion kaj faris kun ĝi tre intiman, amikan interparolon. Krome, en Tirana, Shkoder kaj aliaj lokoj estis okazigitaj grandaj mitingoj por bonvenigi la Delegacion de ĈRG.

La Delegacio de ĈRG krome multfoje kunsidis kun albanaj laboristoj, agrokulturaj kooperativanoj, instruistoj kaj lernantoj. Dum la vizito al lernejo Naim Frasheri de dekdujara sistemo, la anoj de la delegacio tre intime interŝanĝis spertojn de revolucia batalo kun la instruistoj kaj lernantoj de la lernejo kaj rigardis la unuan opini-afiŝon faritan de la lernejo en la tutlanda movado por plua revoluciigo. Estas ĝuste tiu ĉi lernejo, kiu la unua elmetis en la tuta lando la proponon pri opono kontraŭ la religiaj superstiĉoj kaj postiĝintaj kutimoj kaj moroj.

La batalcelo de la ĉinaj kaj albanaj junuloj estas sama. Floros por ĉiam la batalamikeco inter la ĉinaj kaj albanaj popoloj kaj junuloj!

Ni Varme Bonvenigas Vin, Ruĝaj Soldatetoj de Prezidanto Maŭ!

— Pri la vizito de la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio al Albanio

DE la 21-a de junio ĝis la 10-a de julio la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio vizitis la heroan Albanion. Tio estas la unua fojo, ke la ĉinaj ruĝaj gvardianoj sendis delegacion por viziti alilandon. La vizito de la delegacio skribis novan paĝon en la historio de amikeco inter la popoloj kaj junuloj de Ĉinio kaj Albanio.

LA ĈINAJ KAJ ALBANAJ JUNULOJ INTERLIGIĜAS KORO KUN KORO

En Tirana, la ĉefurbo de Albanio, en Durres, la "Haveno de Ĉina-Albana Amikeco", en Vlora, heroa urbo en suda Albanio, en Shkoder, grava urbo en la nordo, kaj en Berat, urbo de mil fenestroj en meza Albanio, la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio ĉie ricevis varman bonvenigon kaj akcepton de la albanaj popolo kaj junuloj. Ĉie, kie venis la delegacio, leviĝis la huraoj "Enver — Maŭ Zedong!" kaj "Vivu la ruĝaj gvardianoj!"

Dum la Kvina Kongreso de la Ligo de Albana Laboranta Junularo, en ĉiuj paŭzoj la kongresanoj ĉiam dense ĉirkaŭis la ĉinajn gastojn, intime interparolis kun ili kaj kune fotografiĝis por konservi la memoron. La kongresanoj soife petis de la junaj ruĝaj gvardianoj insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj manskribon de eldiroj de Prezidanto Maŭ, kiujn ili petis la interpretistojn traduki en la albanan lingvon por faciligi ilian studadon.

Multaj albanaj laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj studentoj surpaperigis varmajn kaj emociajn vortojn en la taglibroj de la ruĝaj gvardianoj. Iu laboristo de ŝtata terkulturejo en Elbasan skribis: "Kvankam inter ni estas longa distanco geografie, tamen niaj koroj interligiĝas. La ĉinaj junuloj, kiuj sekvas la instruojn de Prezidanto Maŭ, estas veraj revoluciaj junuloj. Vivu Prezidanto Maŭ!" Kelkaj komandantoj kaj batalantoj de la landlima gvardio en Librashdi-regiono skribis: "La albanaj junuloj havas senliman amon al la eminenta marksist-leninisto Maŭ Zedong, via kara gvidanto kaj direktilisto, kiu gvidas nun la grandan proletan kulturan revolucion de Ĉinio, kaj al lia intima batalamiko Lin Biaŭ." "Vi, ĉinaj ruĝaj gvardianoj, konduku la grandan proletan kulturan revolucion de Ĉinio ĝis la fino. Ni deziras al kamarado Maŭ Zedong sanon kaj longan vivon, kian havas la altaj montoj en Albanio!"

Iu junulino el montregiono diris tre sincere kaj emocie al la membrino de la ĉina delegacio Tan Hoŭlan: "Mi tre varme amas Prezidanton Maŭ kaj liajn ruĝajn gvardianojn. Tamen la sidlokoj de la ruĝaj gvardianoj estas tro malproksime de la mia. Ĉu iu ruĝa gvardiano ne bonvolus sidi apud mi dum la kunveno?" Kamaradino Tan Hoŭlan fotografiĝis kun tiu junulino kaj alpinglis unu ore brilantan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ sur ŝian bruston. Premante kun emocio la manon al kamaradino Tan Hoŭlan tiu junulino alte kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

En Junufer, en la solena bonveniga mitingo organizita de la direktejo de iu konstruejo, T. Antoni, studento de pedagogia gimnazio, plenvoĉe deklamis sian memverkitan poemon titolitan "Saluto al la Ĉinaj Ruĝaj Gvardianoj", en kiu estas skribite:

Jen la ruĝa suno pendas sur la vasta sennuba ĉielo,
Ĝi dissendas nenombreblajn orajn lumradiojn al la tero.
Ruĝaj gvardianoj — batalantoj per la pens' de Maŭ Zedong armitaj,
Mi salutas vin elkore!
Ruĝaj gvardianoj!
Vi ja estas laboristoj, kamparanoj kaj revoluciaj, neflekseblaj batalantoj.



Enver Hoxha, la saĝa gvidanto de la albana popolo kaj kamarado Jaŭ Venjuan, la estro de la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio, varme ĉirkaŭbrakas unu la alian.

Ruĝaj gvardianoj!
Vi ja estas batalantoj de la granda Maŭ Zedong.
Ruĝaj gvardianoj!
Mi salutas vin elkore!

Por multaj albanaj kamaradoj, kiuj iam vizitis Ĉinion, la intervido kun la ĉinaj batalamikoj sentigis apartan intimecon. Behali, membrino de la Albana Ŝtata Kant-danca Ensemblo kaj laboristino de Durres-a Cigaredo-fabriko, kiu vizitis Ĉinion en la pasinta jaro, foje kaj refoje kantis kun la membrinoj de la delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio mano en mano *Ruĝas la Oriento*, *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto*, *Kanto de Partizanoj* kaj *Kanto de la Ĉina-Albana Amikeco* kaj kantojn kun teksto el vortoj de Prezidanto Maŭ.

LERNI DE LA ALBANAJ JUNULOJ

Ĉie en Albanio oni povas konstati, ke la albanaj junuloj kaj popolo, starante ĉe la plej antaŭaj vicoj en la batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, akiris grandajn sukcesojn en la aktiva efektivigado de la rezolucioj de la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro, en la plua intensigado de la ideologia revoluciigo, en la firmigo de la diktaturo de la proletaro kaj en la antaŭenpuŝo de socialisma konstruado.

Ĉe la naĝargano, kie la granda komunisma batalanto Adem Reka luktis antaŭ sia morto, la batalamikoj de Reka rakontis liajn heroaĵojn al la junaj ruĝaj gvardianoj de Prezidanto Maŭ. Kaj en la loko, kie batalis la heroo antaŭ sia morto, la lastaj kune voĉlegis la vortojn de Prezidanto Maŭ: **"Kie estas lukto, tie estas vivofero, kaj mortoj de homoj okazas konstante. Sed, pensante pri la interesoj de la popolo kaj pri la suferoj de la plejparto de la popolo, ni trovas, ke ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo." "Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidas faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam esti subigita de malamikoj. En kiel ajn malfacilaj kaj penigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu sola homo, li batalos plu."**

La ĉinaj ruĝaj gvardianoj kunsidis kun la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la lernejo "Naim Frasheri" en Durres por lerni de ili la revolucian spiriton aktive disvolvi la batalon kontraŭ religiaj superstiĉoj, malnovaj kutimoj kaj moroj kaj burĝa ideologio, responde al la alvoko de la Albana Partio de Laboro kaj kamarado Hoxha.

En Junufer-montareo de Vlora-regiono kaj en la konstruejo de fervojo de Fieri-regiono, la Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio vidis, kiel la albanaj junaj studentoj klopodas efektivigi la kombiniĝon de junaj intelektuloj kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, de cerba laboro kun fizika laboro kaj de edukado kun produkta laboro. La delegacianoj esprimis, ke ili serioze lernos de la albanaj junuloj ilian revolucian spiriton kaj revolucian energion.

LA ALBANA POPOLO VARME AMAS PREZIDANTON MAŬ

La albanaj popolo kaj junuloj senlime amas, estimas kaj adoras la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Ĉie estas aŭdebla la varma laŭdo pri la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

Por la albanaj kamaradoj la ore brilantaj insignoj kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj la silkaj brokataj portretoj kaj fotoj de Prezidanto Maŭ estas la plej plej altvalora donacaĵo. Ricevinte insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ, oni tuj alpinglis ĝin sur sian bruston kaj, firme ĉirkaŭprenante la junan ruĝan gvardianon, alte kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Akirinte foton de Prezidanto Maŭ iu juna laboristo en Shkoder tre emociite diris al ĉinaj kamaradoj: "Mi tre amas Prezidanton Maŭ. Mi gluos tiun foton sur la muro ĉe mia lito apud la foto de kamarado Enver Hoxha, por ke mi vidu ilin kaj pensu pri ili ĉiutage."

En la konstruejo de Vau-dje-a Hidroelektra Centralo en Shkoder iu juna laboristo uzis du semajnojn de sia libertempo por zorgeme pentri portreton de Prezidanto Maŭ kaj donacis ĝin al ĉina specialisto. Kiam la delegacio vizitis la konstruejon, la ĉina specialisto petis kamaradon Jaŭ Venjuan transdoni tiun portreton al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kamarado Jaŭ Venjuan kun emocio akceptis la pentraĵon kaj certigis, ke la delegacio nepre portos al la patrio la profundan, senliman amon, kiun la albana popolo kaj la ĉinaj specialistoj havas por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, por ke la granda amikeco inter la du partioj, du popoloj kaj la junuloj de Ĉinio kaj Albanio forĝita de kamarado Maŭ Zedong kaj kamarado Enver Hoxha donu pli abundajn kaj grandajn fruktojn.

NEFORGESEBLA INTERVIDIĜO

La 8-a de julio estas neforgesebla dato por la delegacio de Ĉina ruĝa Gvardio. Kamarado Enver Hoxha, la amata kaj estimata granda gvidanto de la albana popolo kaj intima amiko de la ĉina popolo, akceptis la junajn ruĝajn soldatetojn senditajn de Prezidanto Maŭ. Kamarado Hoxha havis ekstreme intiman interparoladon kun la membroj de la delegacio. Li esprimis altan laŭdon pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio kaj la movado de ruĝaj gvardianoj kaj deziris, ke la ĉinaj ruĝaj gvardianoj faros pli grandan kontribuon al la granda proleta kultura revolucio.

Kamarado Hoxha petis la delegacion transdoni la plej altan revolucian saluton de la albana popolo al kamarado Maŭ Zedong, la plej supera kaj ruĝa komandanto de la ĉinaj ruĝaj gvardianoj.

Kamarado Hoxha dufoje fotografiĝis kun la membroj de la delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio. Kiam la delegacio diris al li adiaŭon, kamarado Hoxha foje-refoje varme premis la manojn al ĉiuj membroj de la delegacio, firme ĉirkaŭprenis ilin kaj levante sian brakon entuziasme kriis: "Vivu la ruĝaj gvardianoj!" La junaj ruĝaj gvardianoj ankaŭ emocie kriis ĥore: "Vivu kamarado Hoxha!" Kaj kamarado Hoxha denove kriis levante sian brakon: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

La Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio estis varme bonvenigata de la instruistoj kaj lernantoj dum sia vizito al la Lernejo Naim Frasheri en Durres, Albanio.







Kamarado Ju Minŝeng kunvokis gazetaran konferencon de en- kaj ekster-landaj ĵurnalistoj, ĉe kiu li indigne kondamnis la reakcian birman registaron de Ne Vin, pro ĝiaj planitaj krimagoj.

Paroloj de Ju Minŝeng en la Gazetara Konferenco (Ekstrakto)

JE la 28-a de julio en Pekino, Ju Minŝeng, raportisto de la Ranguna Filio de la Hinhua-a Novaĵ-agentejo okazigis gazetaran konferencon por ĉinaj kaj fremdlandaj ĵurnalistoj. Ju Minŝeng estis senkulpe elpelita de la birma reakcia Ne Vin-registaro dum la kontraŭ-ĉinaj kaj ĉinekskluzivaj tumultoj, kreitaj de la lasta en Birmo lastatempe, kaj revenis en gloro al Pekino je la 19-a de julio.

En sia parolado li varme aklamis la fakton ke la armita batalo de la birma revolucia popolo senĉese disvolviĝas kaj plifortiĝas sub gvido de la Komunista Partio de Birmo, kiu alte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong. La reakcia Ne Vin-registaro trovas sin en sieĝo de popola milito, kaj la tagoj restas al ĝi jam malmultaj.

En sia parolado Ju Minŝeng esprimis plej plej fortan kondamnon kaj proteston kontraŭ la reakcia Ne Vin-registaro, kiu instigis perfortulojn ofendi la plej plej ruĝan sunon en nia koro, la grandan gvidanton de la monda popolo Prezidanto Maŭ, fabrikis sangajn faŝistajn perfortaĵojn kontraŭĉinajn kaj ĉinekskluzivajn, direktis perfortulojn ataki la ĉinan ambasadorejon en Birmo, la Rangunan Filion de la Hinhua-a Novaĵ-agentejo kaj aliajn ĉinajn instituciojn, bate vundi niajn diplomatojn kaj mortigi nian specialiston senditan por helpi la konstruadon de Birmo, faris ĝisĉielajn krimegojn de amasaj buĉado, aresto, bruligo kaj prirabado kontraŭ niaj patriotaj elmigrintoj en la tuta Birmo, praktikis kontraŭleĝan militan kontrolon kontraŭ la ĉina ambasadorejo kaj loĝkvartalo de la elmigrintaj ĉinoj en Ranguno kaj blokadis la ĉinan ambasadorejon per multaj trupoj por senigi la personaron de nia ambasadorejo je libereco de irado. Ju Minŝeng montris, ke ĉiuj faktoj pruvas, ke Ne Vin, la faŝista ĉefo de Birmo kaj birma Ĉiang Kajŝek, estas la ĉefa krimulo de tiuj kontraŭĉinaj kaj ĉinekskluzivaj agadoj.

Ju Minŝeng montris, ke la frenezan oponadon kaj ekskluzivadon kontraŭ la ĉinoj fare de Ne Vin-registaro decidas ĝia reakcia klasa naturo. Li diris, ke la reakcia Ne Vin-kliko ekstreme kaj morte malamas kaj timas la grandan influon de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio kaj la disvastiĝon de la senlime brila penso de

Maŭ Zedong en Birmo, precipe post la disvolviĝo de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. Ili tre timas, ke posedante la penson de Maŭ Zedong, imitante la ekzemplon de ĉinaj ruĝaj gvardianoj, la birma revolucia popolo leviĝos por fari revolucion kaj ribelon kontraŭ ili sub gvido de la Komunista Partio de Birmo. Pro tio, la birma reakciularo ĉiurimede kalumnias kaj atakas la ĉinan grandan proletan kulturan revolucion, vane provante rezisti kontraŭ la influo de tiu granda revolucio kaj obstrukci la disvastiĝon de la penso de Maŭ Zedong en Birmo. Sed tio estas nenio alia ol la klopodo de manto por bari ĉaron kaj la provado de formiko por skui arbon. Kiam la ĉina granda proleta kultura revolucio pli kaj pli disvolviĝas en triumfo, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon estas eltrenita, kaj en nia tuta lando leviĝas amasa kritiko kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov, Ne Vin, tiu birma faŝista ĉefo, plene elmontras sian veran vizaĝon, malgaje lamentante ke li "perdis peranton de kontaktiĝo kun Ĉinio" pro la falo de la ĉina Ĥruŝĉov. Li timas, ke la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ venkos, ke Ĉinio plifortigos sian subtenon al la revoluciaj bataloj de la mondaj popoloj, kaj ke la Komunista Partio de Birmo akiros grandan disvolviĝon.

Ju Minŝeng diris, ke la frenezaj kontraŭĉinaj kaj ĉinekskluzivaj agadoj de la birma faŝista ĉefo Ne Vin kaj lia reakcia registaro okazas absolute nehazarde, sed laŭ la bezonoj de iliaj internaj kaj eksteraj politikoj — enlande por turni la rigardon de la birma popolo for de la pli kaj pli akriĝantaj enlandaj klasaj kontraŭdiroj kaj eksterlande por kontentigi la bezonojn de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo. Tiuj agadoj formas konsistigan parton de la internacia kontraŭfluo oponanta Ĉinion kaj estas rezulto unuflanke de la longtempa plenumado de la kontraŭkomunismaj kaj kontraŭpopolaj enlandaj politikoj fare de la reakcia reganta kliko de Ne Vin kaj aliflanke de ĝia praktikado de la reakciaj eksteraj politikoj de sindependigo al la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo kaj komploto kun diverslandaj reakciuloj.

Li diris, ke la reakcia reganta kliko de Ne Vin levas la kontraŭĉinan kaj ĉinekskluzivan tajdon ĝuste en la tempo, kiam ĝi bankrotas en milito, politiko kaj ekonomio. La popolaj armitaj fortoj gvidataj de la Komunista Partio de Birmo kreive studas kaj aplikas la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj la verkon de kamarado Lin Biaŭ *Vivu la Venko de Popola Milito*; aplikante la strategion kaj taktikojn de gerila milito, ili ĉie atakas kaj ekstermas la malamikojn lerte kaj vigle, senĉese disvolvas kaj fortigas siajn fortojn, kaj jam fariĝis la ĉefa forto minacanta la ekziston de la militista reĝimo de Ne Vin. Laŭ nekompleta statistiko, en 1966 la revoluciaj armitaj fortoj de la birma popolo faris pli ol 400 batalojn, pliigis siajn fortojn je 50 procentoj kaj iliaj batalregionoj ampleksas 60% de la teritorio de la tuta Birmo. La reakcia Ne Vin-registaro falis en sieĝon de popola milito kaj suferas pli kaj pli pezajn batojn. La vasta birma popolo jam plene travidis kaj forkraĉis la falsan socialismon de Ne Vin kaj plene ekkonis la naciperfidulan vizaĝon de la birma Ĉiang Kajŝek — Ne Vin. La reakcia Ne Vin-kliko nun alfrontas la kontraŭstaron de la tuta popolo kaj politike perdis la koron de la popolo kaj estas ekstreme izola. La falsa socialismo praktikata de la reakcia reganta kliko de Ne Vin jam delonge alportis al Birmo seriozan ekonomian krizon. Nun la reakcia Ne Vin-registaro kvazaŭ sidus sur vulkano, kaj tre malfacilaj estas iliaj tagoj.

Ju Minŝeng montris, ke nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **" 'Levi ŝtonegon kaj ĝin faligi sur siajn proprajn piedojn' estas ĉina popolđiro por priskribi la konduton de iuj stultuloj. La reakciuloj en diversaj landoj ĝuste estas stultuloj de tia speco. Iliaj diversaj persekutoj kontraŭ la revoluciaj popoloj, finfine, servas nur por akceli la popolan revolucion al pli granda vasteco kaj intenseco."** La enlanda politiko kontraŭ komunismo kaj popolo kaj la eksterlanda politiko amika al la usona imperiismo, interliga kun la sovetunia reviziismo kaj malamika kontraŭ Ĉinio praktikataj de la reakcia Ne Vin-registaro povas atingi nur sinbruligon per fajroludado, kiu plirapidigos ĝian propran pereon.

Ni devas serioze averti la reakcian Ne Vin-registaron, ke la 700-miliona ĉina popolo armita per la penso de Maŭ Zedong ne permesas sin kaj siajn elmigrintajn gefratojn esti ofendataj. La sangaj ŝuldoj estos nepre ĝisfunde likviditaj kaj ĉiuj kontraŭĉinaj homoj absolute ne havos bonan finon. Nepre malvenkos Ne Vin, nepre venkos la Komunista Partio de Birmo!

Dum sia respondado al demandoj faritaj de ĉinaj kaj eksterlandaj ĵurnalistoj, Ju Minŝeng per granda kvanto da emociaj faktoj prezentis la senliman amon, kiun havas la birma popolo por Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong, kaj la influon, kiun havas en Birmo la granda proleta kultura revolucio kaj la movado de ruĝa gvardio de Ĉinio. Li diris, ke la vasta birma revolucia popolo senlime amas kaj estimas nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj senlime adoras kaj kredas la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong. Oni ne povas facile priskribi ilian senlime profundan amsenton al Prezidanto Maŭ. Ili diras: Ĉiun ajn libron oni povas ne legi, sed oni ne povas ne legi la librojn verkitajn de Prezidanto Maŭ; ĉion ajn oni povas forĵeti, sed oni ne povas forĵeti la penson de Maŭ Zedong. Iu amiko el eduka rondo diris: "Hodiaŭ la revoluciaj popoloj de la mondo ĉiuj sopiras kaj rigardas al Pekino, tiu sankta loko de la monda revolucio, kaj al Maŭ Zedong, tiu ruĝa suno prilumanta la tutan teron. Hodiaŭ, ĉiuj popoloj, kiuj volas revolucii, batali kaj oponi kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj, nepre devas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Liaj libroj estas neelĉerpebla trezorejo de teorioj; ĉiu frazo el liaj verkoj estas vero!" Iu verkisto diris: "Prezidanto Maŭ estas la plej estimata kaj amata, granda gvidanto de la mondaj revoluciaj popoloj, ĉiu venko gajnita hodiaŭ de la mondaj revoluciaj popoloj en la bataloj kontraŭ imperiismo kaj reviziismo estas neapartigeble ligita kun la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. En la nuna mondo, kiu subtenas la penson de Maŭ Zedong, estas vera revoluciulo; kiu oponas la penson de Maŭ Zedong, estas malamiko de la revolucia popolo."

Laboristoj de Birmo diras: La verkoj de Prezidanto Maŭ estas netaksebla trezoro por la mondaj revoluciaj

popoloj, orientilo en ilia agado kaj potenca ideologia armilo en ilia revolucia batalo. Navigadon en la maro oni dankas al la direktilisto, kaj la granda direktilisto por la monda revolucia ŝipego estas ĝuste la granda Maŭ Zedong! Ni devas antaŭenmarŝi ĉiam laŭ la revolucia direkto montrita de Prezidanto Maŭ!

La vasta revolucia popolo de Birmo soife studas la verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili rigardas ĉiun akiritan verkon de Prezidanto Maŭ, ĉiun lian portreton aŭ insignon kun lia portreto kiel plej grandan feliĉon kaj signifohavan memoraĵon. Multaj birmaj amikoj organizite kaj laŭplane studas la verkojn de Prezidanto Maŭ en ĉiu tago. En okazo de manko de libroj, ili do mane kopias ilin. En la hejmoj de multaj birmaj amikoj pendas portretoj de Prezidanto Maŭ kaj tabuloj kun liaj eldiroj. Multaj birmaj amikoj portas kun si *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj ĉe apero de malfacilo ili serĉas ĉiam el ĝi solvon. Multaj amikoj povas bone reciti vortojn de Prezidanto Maŭ. Dum intervidiĝo kun ĉinaj kamaradoj, ili ripete petas la ĉinajn kamaradojn transdoni ilian elkoran bondeziron al Prezidanto Maŭ kaj deziras al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ senlime longan vivon!

Ju Minŝeng diris ke la senprecedenca, mondskua, granda proleta kultura revolucio de Ĉinio havas grandan, profundan kaj vastan influon en Birmo kaj ludos netakseblan grandan rolon en la revolucia batalo de la birma popolo.

La vasta revolucia popolo kaj la progresemaj amikoj de Birmo varme aklamas kaj laŭdas la ĉinan grandan proletan kulturan revolucion, de kiu ili estas senlime entuziasmigitaj kaj kuraĝigitaj. Ili diras, ke tiu granda revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la monda popolo, estas granda iniciataĵo en la internacia komunisma movado kaj la plej granda, plej elstara kontribuo farita de Prezidanto Maŭ al la internacia komunisma movado kaj la revolucia afero de la monda popolo, kaj ke ĝi ludos grandan rolon de akcelado kaj antaŭenpuŝado al la revolucia afero de la tutmonda popolo. Multaj birmaj amikoj opinias, ke la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio ĝisfunde frakasos la sonĝon de la imperiistoj kaj reviziistoj pri restaŭro de kapitalismo en Ĉinio, ke ĝi garantias ke la ĉina proleta ŝtato neniam ŝanĝos sian koloron tra senfinaj generacioj, kaj ke ĝi certigas ke Ĉinio, la centro de la monda revolucio, pliforte subtenos la revoluciajn batalojn de la birma popolo kaj diverslandaj popoloj tra la mondo. Pro tio, tiu granda senprecedenca revolucio koncernas ne nur la estontecon kaj sorton de Ĉinio, sed ankaŭ tiujn de la monda revolucio. La birma revolucia popolo varme kaj tutforte subtenas tiun grandan revolucion. Multaj birmaj amikoj aktive partoprenas la amasan kritikon kontraŭ la *Memkulturo* de la ĉina Ĥruŝĉov, malkaŝas kaj akuzas la grandan malutilon alportitan de la *Memkulturo* al la birma revolucia afero. Ili montras, ke ju pli solide oni kritikas la ĉinan Ĥruŝĉov kaj senkreditigas lin kaj ju pli ĝisfunde oni kritikas lian *Memkulturon*, des pli bone estos por la afero de la monda revolucio.

Ju Minŝeng diris, ke la vastaj birmaj amasoj de laboristoj, junuloj kaj lernantoj senlime admiras la revolucian ribelan spiriton de la junaj ĉinaj ruĝaj gvardianoj kaj unuanime opinias, ke la lastaj starigis brilan modelon por la revoluciaj junuloj de la mondo. Unuj post aliaj ili esprimas, ke la birmaj junuloj devas lerni de la ĉinaj ruĝaj gvardianoj, leviĝi por ribelo kontraŭ la faŝisma reĝimo de Ne Vin sekvante la Komunistan Partion de Birmo, decideme faligi kaj renversi ĝin ĝisfunde kaj fari Birmon nova lando flagranta per la brilo de la penso de Maŭ Zedong.

Ju Minŝeng emfaze diris: Mi devas raporti al vi ĉiuj bonan novaĵon, ke en la liberigitaj regionoj sub la gvido de la Komunista Partio de Birmo oni jam komencis organizi ruĝan gvardion.

Kiam li parolis pri la disvolviĝo de la revolucia armita batalo de la birma popolo, li diris, ke la Komunista Partio de Birmo kun kamarado Thakin Than Tun ĉe la kapo nun gvidas la birman popolon entrepreni grandan popolan militon. Depost 1948, la Komunista Partio de Birmo ĉiam alte tenas la grandan standardon de popola revolucia milito kaj persistas en revolucia armita batalo; la gvidataj de ĝi popolaj armitaj fortoj plifortiĝas tagon post tago kaj rapide disvolviĝas precipe en la lastaj pli ol unu jaroj. Nun, la areo, kie la armitaj fortoj de la birma popolo aktivas, jam etendiĝis al plejparto de la teritorio de Birmo.

Li diris, ke la popola revolucia milito de Birmo peze batas la kriman regadon de la reakcia Ne Vin-registaro, la usonan imperiismon kaj sovetunian reviziismon. Tio estas alia majesta triumfa kanto de popola milito sonanta tra la sudorienta Azio kaj alia brila ruĝa standardo de marksism-leninismo, la penso de Maŭ Zedong flirtanta super la azia kontinento.

Ju Minŝeng diris, ke la Komunista Partio de Birmo firme kredas la grandan veron montritan de Prezidanto Maŭ, ke **"el la pafilo venas ŝtatpotenco"**, kaj ke **"sen popola armeo la popolo havas nenion"**, kaj konstruas novtipan popolan armeon laŭ la armekonstrua penso de Prezidanto Maŭ. La armitaj fortoj de la birma popolo prenas la militan penson de Prezidanto Maŭ kiel la orientilon de sia agado, la verkojn de Prezidanto Maŭ kiel sian ĉefan studobjekton kaj la tri ĉefajn regulojn de disciplino kaj la ok punktojn de atentigo difinitajn de Prezidanto Maŭ persone kiel konscie observatan disciplinon por ĉiuj komandantoj kaj batalantoj. En batalado ili paŝon post paŝo lertigis sin en aplikado de la teorio de Prezidanto Maŭ pri popola milito kaj de la tuto de ĝiaj strategio kaj taktikoj.

En batalado, la Komunista Partio de Birmo persiste sinapogas sur la popolamasoj, starigas kamparajn bazlokojn kaj senĉese fortikigas kaj disvastigas la bazlokojn. La longa historio de batalado de la Komunista Partio de Birmo montras al la tuta mondo, ke la popola milito posedas senlime grandan vivforton. Estas sendube ke ĝi povas fariĝi des pli forta ju pli ĝi batalas, kaj fine ĝi faligos la reakcian Ne Vin-registaron kaj gajnos la plenan liberiĝon de la birma popolo.

La paroloj de Ju Minŝeng ricevis varman aplaŭdon de la konferenco.



La bravuloj sur la Dekbravula Altaĵo firme gardas sian batalpozicion kaj pretas solide bati la usonajn agresantajn banditojn.

Dek Bravuloj sur Sennoma Altaĵo

Raporto el Vjetnamio

SUDE de la monto Co-dinh kaj nordokcidente de la rivero Cam-lo en la norda parto de Quang-tri-provinco de suda Vjetnamio troviĝas sennoma altaĵo. Antaŭ nelonge, kiam dek batalantoj de la Liberiga Armeo tie plenumis sian taskon, ili frakasis dekkvin atakojn de pli ol ducent soldatoj de usona markorpuso, mortigis kvardek unu el ili kaj tiel faris brilan kontribuon por la realigo de grava batalplano. Kaj pro tio ĉi tiu subplotono estas honorita de la Komandejo de Liberigaj Armitaj Fortoj en la suda parto de Vjetnamio per Duagrada Ordeno de Meritoj en Liberiga Milito kaj la sennoma altaĵo estas nomita la Dekbravula Altaĵo.

Iun vesperon, la dek batalantoj venis, laŭ ordono, sur la sennoman altaĵon por pretigi batalkampon de grandskala surpriz-atako. Apenaŭ la batalantoj tie haltis, ekmuĝis super iliaj kapoj malamika rekognoska aviadilo L-19, kaj tuj post kiam ili metis la alportitajn obusojn, ektondris kanonoj de la malamiko. En la komenco ili neniom ĝeniĝis de tio. Tamen pli kaj pli intensiĝis la kanonado kaj kelke da obusoj eĉ eksplodis en la ĉirkaŭaĵo de ilia batala pozicio, kio vekis ilian gardemon — kredeble la malamiko baldaŭ komencos traserĉadon per siaj infanterianoj.



Kvar heroaj batalantoj sur la Dekbravula Altaĵo mokas la usonan imperiismon pro ĝia papertigra malfortikeco, montrante kun rido la pafilon, kiun ili batalakiris el la manoj de jankio.

La dek batalantoj firme decidis, ke en kia ajn situacio, ili nepre senkompate ekstermos la malamikon per siaj armiloj por gajni la venkon.

La dek bravuloj havis sian pozicion sur malgranda ebena montodeklivo, antaŭ kiu kuŝas transverse vojeto. Ĉirkaŭ la pozicio troviĝas kvin oblongaj altaĵoj tre favoraj por kunagado en batalo. Por krei pli bonajn kondiĉojn, la batalantoj streĉe fosis pliajn tranĉeojn kaj ilin kamuflis per foliriĉaj branĉoj ĝis profunda nokto, spite bombardadon fare de la malamiko.

En la frua mateno de la sekvinta tago, subite ĉesis la kanonpafado de la malamiko. Tuj sekve, usonaj agresantoj elŝovis unu post alia la kapon el la arbetaro fronte de la pozicio. Trovinte ke la malamikoj komencas ŝteliri sur la altaĵon, la batalantoj tuj sin ĵetis en la tranĉeojn kaj pretiĝis por batalo. Tute ne rimarkinte la pozicion de la Liberiga Armeo, la malamiko rampis plue supren sen halto.

Ta-ta-ta... klakis mitraletoj de la batalantoj de la Liberiga Armeo kaj salvoj da malamaj kugloj flugis al la malamikoj. La usonaj diabloj amase falis kun kriaĉoj trafite de la kugloj. Sub la furioza fajropafado de la batalantoj la malamikoj retiriĝis en konfuziĝo. La vunditaj diabloj surventre kuŝis sur tero, blekis kaj ploregis.

Silentiĝis denove la batalpozicio. Profitante la paŭzon en la batalo, la batalantoj okazigis grupan kunvenon en tranĉeo. Ĉiuj opiniis, ke la malamiko ankoraŭ ne bone konas la pozicion kaj forton de la Liberiga Armeo, kaj ili ankoraŭ devas bone kamufli la pozicion por ĝin teni en sekreto kaj forte bati la malamikon plue.

Momenton poste, la malamiko denove komencis drastan atakon per aviadiloj, kanonoj kaj pezmaŝinpafiloj kontraŭ la monteto firme tenata de la dek bravuloj. Ne forlasante sian intencon la usonaj diabloj organizis novan ofensivon. Sin ŝirmante per la kadavroj de siaj kolegoj, ili rampis supren unu post alia kvazaŭ helikoj. La batalantoj de la Liberiga Armeo atendis aplombe, kaj nur tiam ekpafis furioze, ĝis la malamikoj alproksimiĝis. Kugloj trafis la malamikojn en la antaŭaj vicoj. La usonaj agresantoj en la posto plue sin ŝovis antaŭen pelate de la komandanto, sed estis tuj repuŝitaj de la batalantoj de la Liberiga Armeo.

Dekkvar atakojn la sinjoraj soldatoj el Usono faris kontraŭ la monteto, sed neniel sukcesis ĝin konkeri.

Post iom da tempo, la pezaj maŝinpafiloj de la malamikoj denove ekfajfis, ili lanĉis la dekkvinan atakon. La agresantoj faris la lastan atakon kontraŭ la montpinto sin aranĝinte en duoncirklon. Batalanto Luong Van Tam longe fiksis sian rigardon sur la usonan komandanton kiu tenis revolveron, kaj per unu pafo lin falĝis surteren. Perdinte la komandanton, la malamikoj konfuziĝis kaj malordiĝis kvazaŭ formikoj. Multaj diabloj forĵetis la pafilon kaj en paniko fuĝis returnen. Ankaŭ la lasta atako de la malamiko estis tiel repuŝita.

Tra la intensa batalo dum la tuta tago, la dek bravuloj sur la sennoma altaĵo fine frakasis la dekkvin atakojn de la malamiko kaj sukcesis firme teni la pozicion en siaj manoj. Nelonge poste, la Liberiga Armeo komencis bombardi furioze iun bazlokon de la usona markorpuso per siaj kanonoj.

Kultura Vivo

Literatura kaj Arta Propagandsemajno en Pekino

Ekde la 23-a de julio, la vastaj amasoj de revoluciaj laborantoj de la literaturaj kaj artaj institucioj rekte sub la municipalo Pekino, okazigis literaturan kaj artan propagandsemajnon por pli bone konduki la revolucian amasan kritikadon en la granda proleta kultura revolucio.

La partoprenintaj organizoj formis dekkelkajn taĉmentojn kiuj kreis kaj prezentis rondire al la publiko en la urbo kaj ĉirkaŭurba kamparo teatraĵojn, ĉiuji-ojn, poemdeklamojn, lumbildojn ktp. kaj faris karikaturojn kaj grandtipajn propagandajn tabulojn por forte ataki la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la kontraŭrevolucian reviziismanklikon de Peng Ĝen.

Malfermiĝis la Bild-ekspozicio de Vjetnamio en Pekino

Por celebri la datrevenon de la publikigo de la *Alvoko* de Prezidanto Ho Chi Minh, malfermiĝis la Bildekspozicio pri la Batalo de la Vjetnama Popolo kontraŭ la Usonaj Agresantoj en la Pekina Ekspoziciejo je la 25-a de julio. Ĝi estas aranĝita de la Komisiono por Eksteraj Kulturaj Rilatoj, la Komitato de la Ĉina Popolo por Defendo de la Mondpaco kaj la Asocio por Amikeco inter Ĉinio kaj Vjetnamio.

La ekspozicio konsistas el kvar partoj, kaj en ĉiu el ili troviĝas citaĵoj el verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong kaj multaj diroj de vicprezidanto Lin Biaŭ pri popola milito. En la enkonduka parto estas montrataj foto pri la intervidiĝo de Prezidanto Maŭ kun Prezidanto Ho, *La Deklaro kontraŭ la Agreso de la Usono-Diem-kliko al Suda Vjetnamio kaj Ĝia Buĉado al la Popolo de Suda Vjetnamio*, publikigita de Prezidanto Maŭ en aŭgusto de 1963, kaj la *Alvoko* de Prezidanto Ho Chi Minh publikigita je la 17-a de julio, 1966.

La ekspozicio forte malkovras la damnindajn krimagojn de la armita invado de la usona imperiismo en Vjetnamio, konigas la brilajn venkojn en nacisava batalo kontraŭ Usono akiritajn de la armitaj trupoj kaj popolo de la norda kaj suda partoj de Vjetnamio per la forto de popola milito sub la gvido de Prezidanto Ho Chi Minh, kaj samtempe spegulas ankaŭ la subtenon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ĉina popolo al la vjetnama popolo en ĝia nacisava batalo kontraŭ Usono.

Prezentado de la Somalia Artista Delegacio en Pekino

Vespere de la 24-a de julio, la Somalia Artista Delegacio al nia lando okazigis en Pekino la unuan prezentadon kaj ricevis varman aklamon de la spektatoroj de la ĉefurbo.

Dum la prezentado, svingante la ruĝan libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ili kantis foje kaj refoje kun emocio la kantojn *Ruĝas la Oriento* kaj *Navigadon en Maro Oni dankas al la Direktilisto*, por esprimi la varman amon de la somalia popolo al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj prikanti la amikecon inter la popoloj de Somalio kaj Ĉinio. Krome, ili prezentis la kanton *Himno al Prezidanto Maŭ* kaj mallongan dramon *La Amikeco inter Ĉinio kaj Somalio*, speciale verkitajn por ĉifoja vizito al nia lando. Kaj estis prezentitaj ankaŭ popolaj kantoj kaj dancoj, kiuj spegulas la batalon de la somalia popolo por nacia sendependeco kontraŭ koloniisma regado.

Heroaĵo de Vej Ĝongji



1. En la jaro 1960, Vej Ĝongji aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo.



2. Vej Ĝongji senlime kaj arde amas Prezidanton Maŭ kaj decidis fariĝi lia bona batalanto.



3. Kun klasa sento li kreive studas kaj aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj decidis fariĝi proleta revolucia batalanto de la tipo de Lej Feng kaj Vang Gie.



4. Kiam la ruĝaj gvardianoj de la ĉefurbo iris el siaj lernejoj en la socion, li skribis leteron kune kun siaj batalkamaradoj al la junaj ruĝgvardiaj batalantoj, kun la ĝojkrio: "Vivu la proleta revolucia spirito de la ruĝaj gvardianoj!"



5. En varmega somero, Vej Ĝongji kaj liaj batalkamaradoj starigis trinkostacion por la ruĝaj gvardianoj ĉe vojrando, por esprimi sian profundan klasan amon al la proletaj revoluciuloj.



6. Kun la penso de Maŭ Zedong kiel sia batalilo, Vej Ĝongji sin ĵetis en la movadon de amasa kritikado kontraŭ la n-ro 1-a enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon.



7. Plenumante sian taskon de subteno al la maldekstruloj kaj milita trejnado, li propagandis al milicanoj al grandan tezon de Prezidanto Maŭ **"El la pafilo venas ŝtatpotenco".**



8. Dum ekzercado, iu milicano, kiu ĵus komencis lerni ĵeti mangrenadon, misagis kaj erare faligis la grenadon je loko nur 1.7 metrojn maldekstre de si.




9. Vej Ĝongji tuj sin ĵetis el la ŝirmejo kaj ŝirmis la milicanon per sia korpo, tiel ke tiu ĉi saviĝis de la danĝero. Vej Ĝongji heroe martiriĝis.



10. Batalantoj de la vasta armeo de proletaj revoluciuloj, lernu la ekzemplon de Vej Ĝongji kaj ĉiam restu fidelaj al Prezidanto Maŭ! Konduku la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino!



Lanco Uzita dum la Ribelo de Aŭtuna Rikolto



EN septembro de 1927, kamarado Maŭ Zedong persone gvidis kamparanojn, laboristojn kaj parton el la trupoj de Norden-ekspedicio fari la Ribelon de Aŭtuna Rikolto en la orienta parto de Hunan kaj la okcidenta parto de Gianghi kaj fondis revolucian armeon. En oktobro de la sama jaro, sub la komando de kamarado Maŭ Zedong, tiu armeo starigis en Ginggang-montaro la unuan kamparan revolucian bazlokon en la lando.

Tiu lanco estis uzata kiel armilo antaŭ 40 jaroj dum la nomita ribelo. Ĝia stango jam perdiĝis antaŭ longe, kaj ankaŭ ĝia pinto estas rustmakulita. Tamen sur unu flanko de la pinto oni ankoraŭ povas vidi klare la ĉizitajn vortojn: "Vivu la Sukceso de la Revolucio". La primitiva armilo kaj ĝia surskribo montras la plenan fidon al nepra venko de la revolucio, kiun havis niaj revoluciaj antaŭuloj en siaj plej malfacilaj tagoj.

En sia *Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan* kamarado Maŭ Zedong montris: **"Revolucio estas ribelo, perforta agado fare de unu klaso por renversi alian. Kampara revolucio estas revolucio de kamparana klaso por renversi la potencon de la feŭda bienula klaso."** Li montris aliloke: **"Sen armita batalo, nek la proletaro, nek la popolo, nek la Komunista Partio havus ian pozicion en Ĉinio, kaj estus neebla triumfo de la revolucio."** La sukceso de la ĉina revolucio estas akirita ĝuste sub la gvidado de tiuj brilaj pensoj de Prezidanto Maŭ, nome: batali armite, fondi en la kamparo revoluciajn bazlokojn, sieĝi urbojn per vilaĝoj kaj tiel kapti la regpotencon tra la tuta lando.

EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 10 (112) 1967

Ĉefa Enhavo

Vortoj de Prezidanto Maŭ pri Popola Milito
La Penso de Maŭ Zedong Lumigas al Nia Partio la Vojon de Triumfa Antaŭenmarŝo
La Proletaro Nepre Devas Firme Teni la Pafilon
Eldoniĝis la Albumo *Prezidanto Maŭ Estas la Ruĝa Suno en Nia Koro*
Prezidanto Maŭ, la Tutmonda Popolo Amas Vin!
Komplete kaj Senrezerve Respondeci al la Popolo
La Armeo kaj la Popolo Interligiĝas Koro kun Koro
Vej Ĝongji — Modela Popolamanto kaj Subtenanto de Maldekstruloj
Bonega Situacio en Nia Industria Produkto
La Revolucio kaj Produkto de Kingdaŭ-a Prestinkturejo en Plena Vigleco
La Penso de Maŭ Zedong Heligas Hongging
Ĝajli-brigado Akiris Abundan Rikolton de Tritiko
La Kuna Prezentado de Revoluciaj Artaj Batalantoj de la Ter-, Mar- kaj Aer-trupoj Garnizonantaj en Pekino
Delegacio de Ĉina Ruĝa Gvardio Vizitis Albanion
Ni Varme Bonvenigas Vin, Ruĝaj Soldatetoj de Prezidanto Maŭ!
Paroloj de Ju Minŝeng en la Gazetara Konferenco (Ekstrakto)
Dek Bravuloj sur Sennoma Altajo
Sur la kovrilo — Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Estas Kune kun Ni
Sur la dorskovrilo — Vespero de Festotago

Revolucia Moderna Pekina Opero "Sagaca Kapto de la Tigra Monto"

En decembro de 1945, Prezidanto Maŭ faris la grandan instrukcion **"starigi solidajn bazlokojn en la Nordoriento"** strikte laŭ la tiea aktuala situacio. K-do Lin Biaŭ firme plenumis kaj efektivigis lian instrukcion, tiel ke ni rapide venkis sur la batalkampo de la Nordoriento. Tio metis bazon por la triumfo de la liberigo de la tuta lando.


La revolucia pekina opero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* prezentita de la Ŝanhaja Pekin-opera Teatro rakontas pri la historio, kiel nia persekuta taĉmento eniris en densan arbaron kaj neĝkovritan stepon sur la batalkampo de la Nordoriento vintre de 1946, mobilizis la amason kaj ekstermis la kuomintangajn banditojn, solidigante la postfronton kaj subtenante la kampan armeon en ĝia frakasado de la atako fare de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek.

Tiu ĉi pekina opero reliefe figurigas la heroojn de revoluciaj batalantoj kaj prikantas la grandan strategian penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito.

Nia persekuta taĉmento antaŭenmarŝas en la densa arbaro kaj sur la neĝkovrita stepo por ekstermi la malamikon.



La ĉasisto kondukas Jang Zijong kaj aliajn por kapti la malamikojn.





Ŝaŭ Gianbo kaj Jang Zijong, estroj de la taĉmento, interkonsiliĝas pri la plano por ekstermi la malamikojn.

La armeo kaj la popolo leviĝas por ekstermi la malamikojn ŝultro ĉe ŝultro.







Jang Zijong penetras alivestite en la neston de la malamikoj.



La kuomintangaj banditoj estas sukcese ekstermitaj, kaj estro de la banditoj Monta Aglo estas kaptita viva.


中国共产党万岁！
毛主席万岁！